



Ziko Marcus Sikosek

**ESPERANTO
SEN MITOJ**

DUA PRILABORITA ELDONO

FEL

Esperanto sen mitoj

Esperanto sen mitoj

Ziko Marcus Sikosek

Dua prilaborita eldono

Esperanto sen mitoj

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro estas nur parto de la vera verko kaj rajtas esti libere kopiata.

Skizo el mia propagandista vivo

Kontribuo de E. Wende al *La Ondo de Esperanto*, Rusio, el la jaro 1913:

Dum la lasta somero mi neatendite trafis en tute fremdan vilaĝon, kie mi devis pasigi kelke da tagoj. Por ne perdi la tempon, mi decidis tuj ekpropagandi nian karan lingvon. Nature, mi unue direktiĝis al s-ro poŝtestro, kiel persono ordinare ĝuanta libertempon, ĉar la vilaĝanoj ne estas korespondemaj: la plimulto ja scias nek skribi, nek legi. Nu, ĉar la poŝtestro estis polo, mi pole klarigis al li la teorion perfektecon de Esperanto.

– Tak, tak, – li diris, – bone, sed ĉu Esperanto estas disvastigita? ĉu Esperanto estas praktike utiligebla nun? Jen la demando plej grava!

Tiam mi komencis litanion:

– U.E.A. estas (k.t.p.)... ĝi nun havas proksimume 19.250 membrojn, interalie 1.250 en Saharo. Nur la Norda Poluso ankoraŭ ne havas regionan delegiton de U.E.A... La ĵus okazinta Krakova Kongreso kunvenigis 5.271 personojn... Ni havas 499 gazetojn, ne enkalkulante la 7 ĉiutagajn kaj ĝenerale ne-esperantistajn gazetojn... Nombro de l'Esperanto-libroj atingis jam la 14-an milion... Nia riĉa literaturo originala posedas jam 179 romanojn, k.t.p., k.t.p., k.t.p.

La poŝtestro grandmire rigardis min kaj fine petis, ke mi diru mian nomon. Kompreneble, mi ne sekretigis, ke mi estas la eminenta kaj famekonata en Esperantujo aŭtoro Wende, kaj nur tiam la kanajlo, vipure ridante, sciigis al mi, en perfekta Esperanto, ke li estas esperantisto de 10 jaroj, ke li aŭdis nur pri 8.000 U.E.A.-anoj, ke li partoprenis mem la Krakovan kongreson, ke ni ne havas eĉ unu tagan gazeton, ke li abonas mem 12 gazetojn kaj tamen neniam legis pri la eminenta kaj famekonata Wende... k.t.p.

Kaj... mi foriris de tiu fripono, malbenante la ulojn, kiuj esperantistiĝas mem kaj ne volas atendi, ke ni esperantistigu ilin.

Sinjoro Redaktoro, havu la afablecon ne sendi tiun ĉi No. 1 de „La Ondo de

Esperanto“ en vilaĝon Neekzistovka, al s-ro poŝtestro Abocočovski. ¹

I. Informado sen mitoj

En la jaro 1995 realiĝis la esperanta versio de *Muzzy in Gondoland*, sukcesa lingvokurso de la brita televido BBC. La skatolo *Mazi en Gondolando* enhavas du vidbendojn, akompanan libron kun kasedo kaj varbfoliojn en la angla kaj la germana. Laŭ la fuŝgermana teksto esperanto estas

lingvo, kiu uzas nur 16 gramatikajn regulojn kaj la neriproĉeblan logikon. [...] *La simbolo de la lingvo estas 5-braka verda stelo, kiu reprezentas kvin kontinentojn kun komuna lingvo.* La verda koloro – la koloro de la espero – montras la esperon, ke la celo iam estos realigita, por ke la eterna problemo de la homaro kun la lingva kompreniĝo, kiel la Babel-turo en la Biblio bone reprezentas ĝin, fine estu solvita. La teamo, kiu preparis la esperanto-version, estas certa ke ĉiuj ŝatos la grandan koron de Mazi kaj ke ankaŭ per tio esperanto iĝos la lingvo de la estonteco.“²

Jen tipa ekzemplo de propagando, kiu kunkulpas pri la ofte negativa publika bildo pri esperanto. Tia bildo pri la lingvo kaj ĝiaj parolantoj fontas parte el ĝeneralaj antaŭjuĝoj pri nekonataĵo, sed precipe el malkonvenaj aŭ eĉ falsaj informoj donitaj de esperantistoj. Ivo Durwael, iama UEA-estrarano pri informado, parolis eĉ pri bildo fuŝita.³ Sed kion esperantisto povas respondi por pravigi sian esperanto-uzadon? Kion diri por allogi homojn eklerni esperanton por eviti biologian finon de la komunumo, ne aspektante al siaj amikoj kiel primokinda strangulo?

Kiam mi komencis publik-agadi por Germana Esperanto-Junularo, tiam mi tuj renkontis la problemon ke ĉi-koncerne ne ekzistis taŭgaj aŭ normaj tekstoj kiel bazo por nia agado. Ni uzas kiel fontojn ofte pli-malpli nur tiujn informilojn, per kiuj ni mem varbiĝis. La germana verkisto Erich Kästner esprimis en tiu senco ke niaj lernejoj estas verkitaj laŭ pli malnovaj lernolibroj, kiuj estas verkitaj laŭ pli malnovaj lernolibroj, kiuj estas verkitaj laŭ ... k.t.p. La pola esperanto-pioniro Kabe, kiu forlasis la movadon en 1910, diris en 1931 pri la esperantistoj: „Ili restas la samaj, kvazaŭ mi forlasus hieraŭ Esperanton, nenio ŝanĝiĝis, ili paroladas ĉiam la samon“.⁴ Tiel malnovaj kaj rifuzindaj konceptoj (ekz. logikeco de esperanto, dua lingvo por ĉiu) reproduktiĝas en la esperantaj medioj kaj estas transdonataj al ĉiam novaj generacioj de esperantistoj kaj sekve ankaŭ al interesatoj.

Tiu ĉi libro estas la rezulto de mia esplorado, kiun mi komencis en aprilo 1994 por krei liston de faktoj, proponante diskuti kaj fine konsenti pri ili. Dum la verkado de *Proponaro por la Esperanto-informado* mi komprenis ke la temo estas multe pli ampleksa, komplika kaj postulema. Jen *Esperanto sen mitoj* prezentas la rezultojn de mia okupiĝo. Ĝi ordigu la terenon, kontribuu al la diskuto kaj helpu al aktivulo mem cerbumi kiel plej taŭge prezenti esperanton al sia publiko.

1. La fako informado

„Nu, kiel brazilaj esperantistoj laboras por disvastigi Esperanton? – Ili semas kaj semas konstante. – Ĉu ili plugas? – Ne! Ili semas kaj semas konstante. – Certe ili sterkas, ĉu ne? – Ne! Ili semas kaj semas konstante. – Ili almenaŭ akvumas, mi supozas. – Ne! Ili semas kaj semas kaj semas kaj semas kaj semas kaj semas kaj...“⁵

Ĉu nia komunumo bezonas organizitan informadon? Laŭ diversaj enketoj nur ĉ. la duono de la esperantistoj estas varbita pere de personaj konatoj. Internacia studo el 1927 sciigis ke 49 procentoj el la demanditoj ekinteresiĝis pri esperanto pro amiko, parenco, kunlaboranto aŭ instruisto. Laŭ ĉeĥoslovakia studo el 1980/81 plimulto el la pli malnovaj esperantistoj estis varbitaj de amikoj kaj konatoj, plimulto el la pli novaj pere de skribaj aŭ amas-komunikiloj. Ŝajne viroj preferas presitajn informojn, dum virinoj esperantistiĝas pli ofte pro la influo de homoj persone konataj.⁶ Ankaŭ miaj propraj amatorecaj enketoj supozigas ke nur ĉ. duono estas varbita de amikoj, konatoj, parencoj. Sen la organizita informado mankas minimume la alia duono de la esperanto-komunumo. Plie informado havas la taskon, krom varbi novajn parolantojn, ankaŭ aktivigi kaj kunligi la jamajn en komuna kampanjo.

Informado estas en la vortoj de Mark Fettes „fako kiun oni devas lerni, kaj pri kiu iuj homoj estas pli talentaj ol aliaj. Niaj plej sukcesaj informistoj – kiel niaj instruistoj – meritas rekonon, subtenon kaj trejnadon“. ⁷ Kaj eĉ tiuj samlingvanoj, kiuj ne kunlaboras en informado, bezonas foje bazajn sciojn kiel prezenti esperanton al neesperantistoj: se esperanto-parolanto ne kaŝas sian hobion, li iam estos demandata. Ĉiu parolanto povas vole-nevole fariĝi informanto.

Laŭ Gian Carlo Fighiera la „rezistoj kontraŭ Esperanto eliras ĉefe el manko de informoj ĉe la ĝenerala publiko pri ĝi“. ⁸ Ankoraŭ pli rekte S. N. Podkaminer juĝis: „La kaŭzo de kontraŭstaro al Esperanto estas nescio, ignorado kaj antaŭjuĝoj.“⁹ Tia kritiko atakas precipe la malmultecon de informadaj aktivecoj. Post la facila konstato ke la publiko ne transprenas la tipe esperantistajn ideojn, sekvas kutime plendoj pri la malbona mondo. Ekzistas kritiko ankaŭ pri

informado laŭ enhavaj vidpunktoj. Victor Sadler skribis jam antaŭ jardekoj prave ke ne utilas duobligi la eldonkvanton de ne-konvinka informfolio, ĉar „la duoblo de nulo tamen restas nulo“. Laŭ li informantoj „ofte similas al surdaj oratoroj, kiuj daŭre ripetas la samajn argumentojn en la sama formo“ kaj scias nenion pri la reagoj de la kritiko. „Sed ĝuste tiuj kritikoj, tiuj reagoj de la publiko estas la ŝlosilo por daŭra plibonigo de la informado“.¹⁰

Sed la finan paŝon, kritiki la fonan idearon, niaj diskutantoj ofte timas. Tiu idearo, kiun mi poste en tiu ĉi libro nomos *Tradicia Esperanto-Ideologio*, estas taksata kiel ĝusta sed malbone vendata. Tial la redaktanto de landa esperanto-gazeto ankoraŭ parolas pri „la reguleco kaj logiko de la esperanto-gramatiko“ kaj malaprobas nur tro oftan emfazon.¹¹ Certe, multaj konsilantoj pri informado avertas ke oni „ne troigu“, sed kio estas ankoraŭ vero kaj kio jam troigo? Supozeble ili komprenas sub „troigo“ nur la vere evidentajn mensogojn. Pro tio informado ofte nur transdonas la malnovajn mitojn, eventuale en nova pakaĵo.

Sen profunda rekonsiderado pri informado-enhavo la publika bildo pri esperanto restos fuŝita. Se jam tio, kion oni sciigas, ne taŭgas, tiam ĉiu cetera laboro riskas esti vana. Ekzemple, nia sinprezento estu nur informo kaj sendeviga propono, ni donu al nesciantoj la necesajn informojn por povi mem konstrui sian opinion pri esperanto. Sed se ni jam tuj postulas la lernadon de esperanto, tiam la konversacia aŭ prelega etoso veneniĝas kaj la interesato preskaŭ estas devigata inventi argumentojn kontraŭ esperanto por defendi sin se li ne volas lerni.¹² Ĉu vere iu eklernas esperanton, tion ni povas nur *kun*influi. Eble el centoj nur kelkaj homoj tiom interesiĝas. Nia celo ekzemple ĉe informado-stando ne estu anigi ĉiujn interesatojn, sed fari laŭeble multajn pozitivajn kontaktojn. Krome estas grava tasko ebligi estontan kontakton kun esperanto-asocio; disponigi al interesatoj, kiuj volas pli informiĝi aŭ lerni esperanton, listojn pri kursoj, taŭgaj lernolibroj, renkontiĝoj. Cetere oni fariĝas ano de komunumo nur kun iom da scioj pri ĝiaj kulturo kaj historio – dum haveblas multaj lernolibroj por komencantoj, ankoraŭ maloftas bonaj gvidiloj por progresantoj kaj perfektigemuloj; malmultas ankaŭ informfontoj por ĵurnalistoj aŭ por studentoj kiuj volas verki tezon pri esperanto.

La enhavo de nia informado fine devas atingi la klientojn, do la ĝeneralan publikon resp. elektitajn celgrupojn: jen gravas scii kiel verki taŭgan gazetaran komunikon, kiel organizi standon, kiel aranĝi prelegon, konsideroj pri celgrupoj, kontaktoj kun ĵurnalistoj. Tion oni nomas publika agado resp. varbado, kiam la

proponita objekto estas iom pli konkreta: varbado por kurso, lernolibro k.s. Ekzistas multaj nacilingvaj libroj pri tiu fako, tamen oni sentas foje la mankon de konsilaroj por la specifaj kondiĉoj de esperanto-asocioj: malgrandas la asocioj, homfortoj malmultas kaj loĝas dise, etas celgrupoj, malhelpas internacieco, k.t.p.



La aŭtoro kun Robert von dem Borne en la stando de "Esperanto Nederland" en 2001.

2. Problemoj de esperanto-informado

a) Eksteraj malfacilaĵoj

Kiu jam informadis, tiu certe jam renkontis kritikon kaj skeptikon pri esperanto. Verkantoj pri informado-enhavo kutime okupiĝas nur pri negativaj reagoj, ĉu pravaj ĉu malpravaj, kaj celas disponigi apologiojn kiuj defendas la karan lingvon. Tiuj verkoj kun titoloj kiel *Esperanto sen antaŭjuĝoj*, *Mitoj kaj faktoj pri Esperanto* kaj *Kie la mitoj? Kie la realecoj?* atakas pli-malpli nur neesperantistojn.¹³ Uzante malnovan retorikan trukon, ili citas nur la malfortajn kaj facile rebateblajn kritikojn „kontraŭ esperanto“, tiel ke la kritikoj ĝenerale aspektas malfortaj kaj ridindaj. La leganto povas ricevi la malĝustan impreson ke la tasko de informadanto estas ĉefe „bati malamikojn“, kaj eĉ ke tiu tasko estas facila – ĉar la malamikoj ja estas tiom stultaj.

Tamen ekzistas seriozaj faktoroj ekstermovadaj, kiuj povas ĝeni esperanto-informadon:

Tabuoj pri lingvoj. Regi fremdajn lingvojn kaj specifan varianton de la gepatra, tion oni postulas de inteligenta kaj klera homo, dum oftas moko pri personoj kiuj havas problemon atingi tion. Tial lingvoj ofte ligiĝas al tabuoj, kaj interesato facile povas senti sin humiligita, kiam esperanto-parolanto maldelikate alparolas la temon, ekzemple mokante pri la fremdlingvaj scipovoj de la interesato.

Stereotipoj kun malfavora efiko. La ĝenerala publiko jam havas bildojn pri lingvoj. La franca estas ligata kun la franclingvaj landoj, precipe Francio, francaj kulturo kaj historio, sed ankaŭ kun modo, kuir-arto kaj diplomatio. Multaj eŭropanoj pensas rilate al la ĉina pri tute nekomprenebla strangaĵo skribita en fremdaj ideogramoj.¹⁴ Homoj kutime havas ankaŭ certan bildon pri lingvoj ĝenerale, laŭ kiu normala lingvo estas parolata de popolo, kiu loĝas en unu lando k.t.p., kaj tiu ĝenerala bildo pri lingvoj ofte ne kongruas kun ilia bildo pri esperanto. Pro tiaj stereotipoj povas efiki eĉ negative se oni prezentas nur la eksterordinarecon de esperanto, sed ne ankaŭ ĝian aliflankan lingvan normalecon.

Obstino kaj ignoremo. Seriozaj homoj ĝenerale akceptas faktojn pri esperanto. Tamen, kompreneble ekzistas ankaŭ tiuj kiuj ne pretas konatiĝi kun faktoj sed uzas fantaziaĵojn por subteni siajn ideojn. En popularscienceca libro la brazilano Pablo Rónai plendas ke multaj esperantaj vortoj pro strukturaj kialoj aspektas tro simile, ekzemple *politico* (laŭ li „politiko“) kaj *politica* („politikisto“).¹⁵

b) Internaj malfacilaĵoj

Tiuj ekstermovadaj kialoj ne povas tute klarigi nian malbonan bildon ĉe la publiko. Ankaŭ esperantistaj pekoj kontribuas al ĝi kaj malhelpas al informado:

Sekteca aspekto. La esperanto-komunumo ne estas sekto, sed la konduto kaj idearo de sufiĉe multaj esperantistoj havas sektajn trajtojn resp. aspektas al eksteruloj ofte sektecaj. Al tio apartenas la Zamenhof-kulto, altrudemo kaj maltoleremo pri aliaj opinioj rilate al la mondo kaj ĝiaj lingvoj. Interesatoj facile kredas ke la lingvo de tiuj stranguloj estas mem stranga.¹⁶

Lingvistikaj eraroj. Ankaŭ esperantistoj povas erari pri lingvoj. Kvankam la celgrupo de esperanto-informado normale ne estas lingvistoj, multaj interesatoj tamen estas „lingvemuloj“ kun speciala interesiĝo pri lingvoj. Tial esperanto-informado estu lingvosciencigita ĝusta.

Troa espero pri problemsolvado. Foje esperanto-parolantoj supertaksas la socian rolon de lingvoj kaj sekve ankaŭ la rolon de esperanto. Ili faras el esperanto la solvon de ĉiuj, aŭ almenaŭ pluraj, problemoj de la mondo, ĉar se la popoloj resp. la gvidantoj povus komuniki senpere, tiam – laŭ ili – ne plu okazus miskomprenoj. Ofte temas pri pacistoj, kiuj kredas ke la plej granda kaŭzo de internaciaj konfliktoj estas simplaj miskomprenoj, kaj ne eble la malbonvolemo de fiuloj aŭ bataloj pri ideologioj kaj materiaĵoj. Kun tute serioza intenco la revuo *La Praktiko* en 1938 prezentis foton de Chamberlain kaj Hitler dum la konferenco de Bad Godesberg, kaj oni subtitolis ke tiu foto – ĉar ĝi montris ankaŭ interpretiston – „servis kiel tre efika propagandilo por Esperanto“ dum ekspozicio en Hago. Poste *La Praktiko* liveris karikaturon, en kiu ponto kun la nomo esperanto kunligas la britan ĉefministron kun la nacisocialisma diktatoro.¹⁷ En diskuto el 2001/2002 nederlanda esperantistino esprimis la tezon ke se la tuta mondo parolos unu lingvon tiam la bonfarto enorme progresos.¹⁸ (Vd.

ankaŭ la ĉapitron [Simboloj](#))

Utopiismo. Ekzistas informantoj kiuj ne sufiĉe klare distingas inter la reala Esperantio kaj iu utopio. Ne malofte oni propagandas esperanton kiel savilon por lingvaj minoritatoj aŭ komunikilon por „homoj lingve malprivilegiitaj“; la unuan funkcion esperanto nuntempe evidente ne plenumas, la duan apenaŭ. Ambaŭ funkcioj do apartenas ne al estanteco, sed nur al ebla estonteco. Povas esti ke la interesato metas ĉion rilate al esperanto en la utopian ujon, ne komprenante ke tiu lingvo estas tamen jam aplikata. Kaj ĝenerale, multaj esperantistoj ligas la lingvon al certaj ideoj aŭ postuloj („interna ideo“, „dua lingvo por ĉiu“). Precipe en informado, sed ankaŭ en movadaj diskutoj, necesas ĉiam eviti konfuzon inter la lingvo esperanto kaj tiuj ideoj ligataj al esperanto. Multaj interesatoj ja povas konvinkiĝi ke esperanto estas funkcia kaj praktike uzata lingvo, sed ne ke ĉiu homo devas lerni ĝin. Aparta problemo estas se religiaj grupoj uzas esperanton en sia propagando en tia maniero ke la interesato kredas ke nia lingvo apartenas al la kosmologio de Martinus, al la spirit-sanigo de Bruno Gröning aŭ al bahaismo.

Manko de esperanto-konoj. Oni ĉiam denove trovas kazon ke homo kun tre malbonaj scipovoj de esperanto varbas. Ivo Lapenna kritikis tion tiel: se iu alvokas lerni esperanton, sed mem ne aŭ nur malmulte regas ĝin, tiam „li aŭ ŝi povas esti tre honesta en la privata vivo, sed tamen al tia persono mankas la oratora honesteco.“¹⁹ Tre normalas cetere ke ĵurnalistoj petas diri ion en esperanto aŭ traduki. La intenco estas ne nur ricevi sonan impreson, sed ankaŭ ekzameni la lingvokonon de la informadanto aŭ eĉ la taŭgecon de esperanto (ĉ)ion esprimi.²⁰ Homoj, kiuj tre malbone parolas la lingvon sed kiuj volas helpi, certe trovos ankaŭ aliajn interesajn taskojn ekster informado.

Katenita en rutino. Kiam oni aktivadas longan tempon pri la sama afero, tiam oni riskas fariĝi viktimo de rutino. En marto 2002 mi trejniis danojn pri informado kaj dividis ilin en *ĵurnalistojn* kaj *esperantistojn* por simulludaj intervjuoj. En la fina diskuto multaj *ĵurnalistoj* menciis siajn problemojn ludi alian ol la kutiman rolon, nome pensi kaj demandi kiel ĵurnalisto, kiu ja ne konas esperanton kaj volas verki justan sed ankaŭ kritikan artikolon. Rilate al kelkaj partoprenantoj oni certe rajtis supozi mankon je empatio. Aliflanke, mi demandis *esperantiston* ĉu estis al li facile aŭ malfacile reagi en la intervjuo. „Jes, esperanto estas facila lingvo“, li respondis, ankaŭ post du redemandoj kaj revertumado miaflanke. Kvankam temis pri inteligenta kaj matura sinjoro, li aŭdinte la radikon *facil-* tute aŭtomate laŭtigis tiun propagandan frazon.

Eblas prezenti tiun zorgindaĵon pli ĝenerale. Normale, unu problemo de publika agado kaj merkato jenas tiel: la informadanto estas la sola kunlaboranto de kompanio aŭ asocio kiu rigardas la produkton el la vidpunkto de la kliento. Tial li ŝajnas esti stranga al la aliaj kunlaborantoj, ekz. teknikistoj, administrantoj aŭ financuloj. Tamen la informadanto devas teni la kontakton kun tiuj aliaj kunlaborantoj, ĉar li bezonas ilian helpon. Sed en Esperantio tiu problemo apenaŭ ekzistas, ĉar ofte la informadantoj ĝuste *ne* rigardas la produkton el la vidpunkto de la kliento. Tio estas nia problemo.

c) Propagando, agresemo, truka argumentado

„Tio estas la sekreto de propagando: tute penetri per la ideoj de propagando tiun, kiun la propagando volas kapti, sen ke li eĉ rimarkas, ke oni penetras lin.“

(Joseph Goebbels, 1933)

Multaj aktivuloj pri informado ankoraŭ nomas sian laboron propagando, ²¹ malgraŭ la enorma malbonfamiĝo de tiu esprimo en la 20a jarcento, almenaŭ en multaj eŭropaj kulturoj. La baza signifo de la latina *propagare* estas disvastigi, plimulti, kaj *propaganda* mem venas el la katolika eklezio, el la titolo de la papa asocio *Congregatio de propaganda fide*, fondita en Romo en 1622 por disvastigi la katolikan kredon. Ekde la 19a jarcento la esprimo estis uzata en varbado precipe por politikaj doktrinoj. ²² Pro la nacisocialismo ĝi fariĝis, en multaj eŭropidaj lingvoj, fivorto por pompa, trompa kaj perfida misinformado.

En esperanto-vortaro *propagando* aperis unuafoje jam en 1889. ²³ Ekzistas pluraj avertoj kontraŭ ĝi depost 1945, el kiuj la plej grava supozeble estas tiu de Ivo Lapenna en la Principaro de Frostavallen (1956). ²⁴ Tamen oni ankoraŭ ofte aŭdas la vorton, eĉ ekzistadas *Propaganda Konto* de UEA. Eblas vidi en tio signon de certa tradiciismo.

Interesatoj spertas la esperanto-informadon foje kiel „propagandon“, ĉar esperantistoj povas esti sufiĉe agresemaj prezentante la lingvon aŭ „defendante“ ĝin kontraŭ „atencoj“. Kiam la germana verkisto Martin Walser en tutlanda gazeto en 2001 polemikis kontraŭ la eŭro, li nomis ĝin *malmono*, kiel esperanto

estas laŭ li *mallingvo*. Rudolf Fischer, la redaktanto de la landa esperanto-organo, reagis al tio nacilingve per tre akraj kaj fortaj vortoj kaj postulis de la verkisto hontoplenan pardonpeton ĉe la esperantistaro. Sed plej verŝajne Walser uzis esperanton kiel simplan metaforon por artefaritaĵo, sciante ne multon pri ĝi. La grandan ekscitiĝon de Fischer neesperantistoj povas nur malfacile kompreni. Estus pli adekvate kaj publike taŭge se oni afable atentigus pri tiu bedaŭrinda metafora uzo kaj klarigi la veran kompareblecon inter la eŭro kaj esperanto. Malgranda lingvokomunumo povas per agresemo eble fortigi ni-senton inter la anoj, sed apenaŭ pozitive aspekti al la publiko. Kaj multaj homoj ne ŝatas okupiĝi pri konflikto-plenaj, disputataj temoj. Ili estas pli bone alparoleblaj per pozitiva kaj ne negativa mesaĝo. Tial necesas por niaj informantoj la ŝajne banala konsilo de Marc van Oostendorp: „Disradiu optimismon kaj ĝojon!“ ²⁵

Ĝenerale, kiam oni observas esperantistojn en kontakto kun interesatoj, oni povas havi la impreson ke kelkaj ne alstrebas gajni la simpatian de interesato, sed „venki“ en diskuto. Por tio ili – ĉu konscie aŭ subkonscie – utiligas argumentajn trukojn, ekzemple:

Pridubi saĝon kaj kapablojn. „Ĉu vi tiom bone regas la anglan, ke vi facilanime povas akcepti la nunan lingvan ordon?“ La esperantisto pridubas certan kapablecon de la interesato, supozigante ke la angla de la interesato malbonas. Sekve la interesato naivas kaj agas kontraŭ sia propra bono, se li ne subtenas esperanton.

Pridubi moralecon. „Ĉu vi ne volas justecon en internacia komunikado?“ La esperantisto komprenigas ke la interesato subtenus maljustecon, se li havus alian opinion.

Malfavore kompari. „La historio konas multajn malbonajn homojn kiel Hitler kaj Stalin, kiuj estis kontraŭ esperanto“, kaj se la interesato estas „kontraŭ esperanto“ aŭ ne subtenas la postulojn de la esperantistoj, tiam la propagandisto havas la rajton nomi la interesaton malbona homo – simila al Hitler kaj Stalin, ĉu ne?

Subŝovi opinion. „Eble pedantulo trovas ion ne tute perfektan en la esperantogramatiko, sed ĉu vi konas iun ajn lingvon kiu estas perfekta?“ Kompreneble la interesato ne volas esti pedantulo, kaj perfektan lingvon ankaŭ li ne konas. Sed li ja neniam asertis, ke la franca, angla, ĉina, rusa k.t.p. estas perfektaj.

Per tia argumentado esperantisto sentas sin forta kaj nevenkebla en konversacio, sed la interesato iam perdos la nervojn kaj foriros. En li restos la malagrabla sento ke oni manipulis lin kaj ne akceptis lin kiel kleran kaj maturan partneron en konversacio. Se la celo estas varbi novajn esperantistojn aŭ simple krei simpation por esperanto, tiam tia informado en la plej multaj kazoj ne sukcesas.



Diskuto kun regiona ministrino Kuppe pri familio kaj junularo, IJK 1996.

3. Ĝusteco en informado

„Oni povas mensogi unufoje. Aŭ du- aŭ trifoje. Sed ne ĉiam. Paroligu la murdinton, kaj vi aŭdos de li ĉion, kion vi volas scii.“

(laŭ la fikcia detektivo Hercule Poirot)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

4. Resumo de informado sen mitoj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

II. Komunumo sen mitoj

1. Bazaj konsideroj kaj karakterizaĵoj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

2. Ideologia kaj lingva komunumoj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

a) Sektismo kaj sektaj trajtoj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

b) Esperantio kiel maldekstra movado

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

c) Esperantio kiel pseŭda etno

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

ĉ) Personkulto pri fruaj pioniroj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

3. Esperantistoj

a) Nombro

„Ĉiuj milionoj konsistas el milonoj.“

(Zamenhofa proverbo.)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de
www.retbutiko.be

b) La nombro en informado

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

c) Disvastiĝo – eŭropeco

„La esperanto-lingvo estas nuntempe disvastigita en la tuta mondo. Krom en Afriko en kelkaj regnoj de negroj [...].”

(La aŭstriano Hanns Sappl, ĉ. 1922) ⁹⁰

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

ĉ) Denaskuloj kaj infanoj

„Ne ekzistas problema infano, nur problemaj gepatroj.“

(Alexander Sutherland Neill)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de
www.retbutiko.be

d) Stranguloj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

4. Asocioj

„Sola la homo ne povas bone ekzisti, tial li ŝatas aliĝi al komunumo, ĉar li trovas tie, se ne kvieton, almenaŭ trankviligon kaj sekurecon.“

(Johann Wolfgang Goethe)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

a) Tabelo pri historio

„Ju pli junas popolo, des pli ĝi penas havi historion.“

(Friedrich Siebel)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de
www.retbutiko.be

b) La Nurenberga Klubo kaj la frua historio

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

c) Universala Esperanto-Asocio

„1. Kaj estis unu viro en la lando svisa kaj lia nomo estis Hodler. 2. Kaj la Sinjoro inspiris lin, dirante: arigu la verdulojn el ĉiuj flankoj de la mondo kaj mi faros vin forta kaj universala ligo. [...] 9. Kiel firma Roko restis tiu templo ĝis la nunaj tagoj kaj ĝis la fino de ĉiuj generacioj.“

(El la Verda Biblio de Izrael Lejzerowicz ¹⁴⁶)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

ĉ) Sennacieca Asocio Tutmonda

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

d) La loka grupo de Gladbeck

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

5. Simboloj

„La stelo restos en Esperantujo same kiel la kruco de la kristanoj kaj la heksagramo de la judoj. Provu anstataŭigi ilin per pilkoj kaj ovoĵ!“

(Bernard Golden ¹⁷⁰)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

6. Esperanto kaj politika ekstremismo

„Libereco havas multajn malfacilaĵojn, kaj demokratio ne estas perfekta. Sed ni neniam devis konstrui muron por teni niajn homojn, por malebligi al ili forlasi nin.“

(John F. Kennedy, okcidenta Berlino, 1963)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

a) Marksistoj pri esperanto

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

b) La „verda bolŝevismo“ de Ivo Lapenna

Kelkaj fundamentaj tezoj de Ivo Lapenna

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de
www.retbutiko.be

7. Resumo de komunumo sen mitoj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

III. Strategioj sen mitoj

1. Tradicia Esperanto-Ideologio

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

a) Nepra „fina venko“

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

b) Imagitaj kaj veraj persekutoj

„Esperanto, ĉu ankoraŭ nuntempe danĝera? El la eldiroj de multaj politikistoj de ĉiuj partioj oni povas konkludi tion.“

(Munkena Esperanto-Grupo, en 2001 germanlingve sur la hejmpaĝo, prezentante la libron de Lins)

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

c) Lernejoj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

2. Dokumentoj de la movado

a) Principaro de Frostavallen (1956)

Bazaj principoj de informado pri Esperanto

I Celo

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

b) Deklaracio de Tyresö (1969)

Plivastigi la dimension de la individuo

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

c) Manifesto de Prago (1996)

Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo Esperanto

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de
www.retbutiko.be

ĉ) Gvidlinioj por informado pri Esperanto (2000)

Gvidlinioj por informado pri Esperanto

Celoj

Konsciigi la publikon pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de
www.retbutiko.be

3. Kritikoj pri la Tradicia Esperanto-Ideologio

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

b) La raŭma kromvojo kaj la „Civito“

Manifesto de Raŭmo

1. Krizo de identeco

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro. Ĝi estas alirebla de www.retbutiko.be

c) Pliaj kritikoj kaj alternativaj ideoj

Sed kritiko pri la Tradicia Esperanto-Ideologio estas pli malnova ol la raŭma jaro 1980, kaj ankaŭ poste ne ĉesis:

La aŭstra inĝeniero kaj esperantologo Eugen Wüster skribis jam en 1931 ke eĉ post eventuala fina venko daŭrus plurajn generaciojn ĝis „ĉiuj sciencaj laboraĵoj publikiĝus en ĝi.“²⁶⁷ En 1968 li aldonis ke la enkonduko de esperanto en la lernejojn, la kerno de la fina venko, „ne estas atendebla post la spertoj el ĉ. 75 jaroj. Kelkaj seriozaj provoj tiurilataj fiaskis.“²⁶⁸

La nederlandano Willem Manders en sia disertacio de 1947 nomis la ŝancon pri ĝenerala enkonduko „tre malcerta“.²⁶⁹ Priskribante en 1950 la taskojn de esperantologio, li emfazis ke estas nescience simple *kredi* ke esperanto estas kontentiga solvo de la planlingva problemo,²⁷⁰ kaj ke

„[...] mi laŭeble evitis konsideri la faktojn tra esperantista vitro. Al ŝovinismaj samideanoj tio eble ne plaĉos, sed ne por ili mi verkis. Mia libro estas destinita por tiuj esperantistoj, kiuj [...] estas sufiĉe larĝmensaj por ne indigne skandaliĝi, kiam la enhavo ne kongruas kun la konataj propagandaj reklamoj.“²⁷¹

David K. Jordan el Usono, recenzante la libron *Bona Ŝanco* de Werner Bormann, forte kritikis la tradiciajn ideojn kaj dubis pri la bonaj ŝancoj, nomante la libron „speco de apologio de la esperanto-ideologio“.²⁷² Por ilustru kiel TEI povas kabeigi, Jordan citis el letero de anonima Ian:

„Min ne ĝenas la fakto ke la ŝancoj por tutmonda akceptiĝo de esperanto estas praktike nulaj, sed la fakto ke la esperantistoj malakceptas agnoski tion kaj anstataŭe trumpetas siajn frapfrazojn [...]. Ilia azeno certeco ke ili ĉiuj subtenas (eĉ se ili ne parolas) la lingvon de la estonteco malplaĉas al mi kaj embarasigas min. ... Ni estas eta dise loĝanta popolo kun la arogo de armeo konkeranta la mondon. Mi amas la lingvon kaj multajn esperantistojn..., sed por mia sano mi ne povas resti multe pli longe en la movado.“²⁷³

Helmut Welger opiniis ke „ni ĉiuj“ pensadas pri la fina venko kaj ke eseroj pri ĝi estas „bone bazitaj kaj raciaj“. Tamen li emfazis ke ni ne scias *kiam* aŭ eĉ nur *ĉu* la „fina venko“ okazos. Tial „psikologia ekkono devigas nin supozi ke ni ĉiuj devas havi pli proksimajn motivojn por okupiĝi pri Esperanto.“²⁷⁴

Nikola Raŝiĉ, konstatinte per enketo el 1985 ke preskaŭ duono de la demanditoj „eĉ ne trovas la finan venkon necesa“, defendis tiun grupon. Ĝi ne estas nepre renegata, memsufiĉisma kaj memizolisma, kaj ne nepre forlasas la „altajn idealojn“ favore al harmonio kaj etoso: „Ĉu scie ĉu subkonscie ili eble sentas ke malpravus Zamenhof kredante ke la tuta mondo fariĝos unu familio nur pro la uzo de la komuna lingvo.“ ²⁷⁵

La germana informado-aktivulo Louis Ferdinand von Wunsch-Rolshoven skribis en 1993 ke esperanto dum la venontaj dek aŭ dudek jaroj verŝajne ne faros esencajn progresojn sur la vojo al oficiala agnoskiĝo. Almenaŭ ne, se la esperanto-asocioj nomas sin civitanaj iniciatoj, kiuj volas solvi la lingvan problemon. Tiam ili restos en konkurenco al grupoj por ekologiismo, paco aŭ homaj rajtoj. Kaj la esperanto-asocioj alfrontas la fakton ke la plej multaj homoj taksas tiujn problemojn pli gravaj ol la „lingvo-problemo“; tiel pensas cetere ankaŭ li. Propagandi dum jardekoj celon kiu ne alproksimiĝas estas ne tre kuraĝige. Se Wunsch-Rolshoven rigardas ĉion ĉi tiel negativa, kial li aktivis por esperanto? Por liesperanto estas realaĵo de hodiaŭ. En renkontiĝoj li spertis, kion esperanto kapablas nuntempe: pliproksimigi homojn de diversaj gepatraj lingvoj. Plimulto en la socioj ne necesas por la pligrandigo de la komunumo de esperanto-parolantoj, ĉar temas pri la disvastigo en eble tre malgranda celgrupo. ^{276a}



Louis Ferdinand von Wunsch-Rolshoven

Aleksander Korĵenkov postulis ke „por preventi frustracion, oni evitu blagon kaj demonstribu la realajn valorojn kaj aplikeblojn de Esperanto“ kaj esperis ke rezulte malpli da homoj aliĝos, sed ke el ili pli da restos. Lerninto certe foriras, se li sentas sin trompita, ĉar oni promesis al li malmultekoste vojaĝi, sed post la kurso li kotizu, abonu kaj propagandu, dum lerninton de la angla oni neniam taskigas propagandi aŭ „labori por la movado“, ²⁷⁷ atentigis Korĵenkov. Ĉu serioza informado kaj la reala esperanto-mondo fine povos vere teni pli da

homoj, ne estas certe. Eble ĝuste la mitoj kaj la sektaj ecoj tenas la homojn ĉe esperanto, ĉar la esperantisto povas senti sin honorinda batalanto por la bono, persekutata de nekomprenebla kaj malica plimulto. Sed certe serioza informado kaj la rezigno pri nerealistaj postuloj forprenos psikan premon de la esperantistoj kaj helpas al pli pozitiva bildo pri esperanto. Al bildo pri interesa, ĉarma hobbio, anstataŭ pri kompatinda donkiĥotaĵo.

La Tradicia Esperanto-Ideologio do plurmaniere damaĝis kaj damaĝas al la publika bildo de esperanto:

– La prezento de ĝenerala „monda lingvo-problemo“ kun simpla esperanta solvo ŝajnigas ke esperanto-parolantoj estas *kontraŭ aliaj lingvoj* aŭ celas eĉ ilian forigon. Kalle Kniivilä, estante UEA-estrarano pri informado, avertis en 2001 ke ni ne konduku kiel la perfortemaj manifestaciintoj okaze de la monda ekonomia forumo en la sveda Göteborg tiujare, „kiuj deziris unue detrui la tutan ekzistantan ordon, kaj nur poste elpensi kion konstrui en ĝia loko“. La esperantistoj ne „desupre ordonu al la mondo simplisman ĝeneralan solvon de ĉiuj mondaj lingvaj problemoj, solvon al kiu ni apenaŭ mem povas firme kredi.“

[278](#)

– La TEI kreas tre apartajn ideojn kaj mistifikas temojn, kiujn oni devas pristudi science, kaj eĉ malhelpas racion rigardon pri lingvistikaj kaj socilingvistikaj temoj. La anoj de la TEI aspektas kaj parte kondukas kiel sekto aparta de la ekstera mondo.

– „Dua lingvo por ĉiu“: tiu frapfrazo povas esti tiel komprenata ke ĉiuj nepre lerni esperanton. Tial homo kiu povus simpatii al esperanto, eble kontraŭas ĝin, ĉar li mem ne havas aŭ tempon aŭ okazon aŭ emon lerni ĝin. Tiu homo ricevas motivon inventi argumentojn kontraŭ „esperanto“, ĉar li ne volas esti devigita lerni ĝin. Kniivilä metis demandosignon malantaŭ la frapfrazon, priskribis la plurlingvan situacion ekz. de migranto kaj juĝis ke „apenaŭ fariĝas klare kiel rolu ĉies dua lingvo en tiu situacio“.

[279](#)

– Por la TEI gravas esence nur la fina venko, tial „esperanto“ estas prezentata ĉefe kiel „ideo“. Sekve ankaŭ interesatoj rigardas esperanton ne kiel seriozan realaĵon de hodiaŭ, sed kiel utopion de postmorgaŭo aŭ neniamo. Se la vera celo de esperanto estas la ĝenerala enkonduko, tiam esperanto ja malsukcesis kaj demandendas kial la proponanto ankoraŭ okupiĝas pri ĝi. – Claude Piron plendis ke homoj, kiuj estas demandataj pri la bulgara aŭ la indonezia, akceptas tiujn

lingvojn kiel faktojn; sed se oni demandas ilin pri esperanto, tiam ili kredas ke ili devus diri sian opinion pri ĝi. Kvazaŭ esperanto estas propono kaj ne fakto.²⁸⁰ Jen kialo.

– Strebi dum jardekoj al celo, kiu ne proksimiĝas, estas tre seniluziige. La TEI kaŭzis multfoje tragikan doloron: homoj, kiuj jam kiel infanoj lernis esperanton, maljunaĝe mortis nevidinte la finan venkon. Rilate al la troigita facileco de esperanto, Blanke avertis ke „se la varbitoj poste konfrontiĝos kun la realeco, ili povos forte seniluziiĝi. Realisma informado donas pli solidan bazon por atingi kaj *teni* homojn.“²⁸¹ Tio validas ankaŭ rilate al la celoj.

4. Resumo de strategioj sen mitoj

En la komunumo konstateblas ideologio, kiun mi nomas pro praktikaj kialoj Tradicia Esperanto-Ideologio“, TEI, por eviti aliajn, jam diverse uzatajn kaj tial miskomprenablajn esprimojn kiel ekz. finvenkismo. Laŭ tiu idearo ekzistas en la mondo „lingva problemo“ kiun oni solvu per la „enkonduko de esperanto“. Esperanto fariĝu „dua lingvo por ĉiu“. Pro sia „facileco“ kaj „neŭtraleco“, kaj per sia „interna ideo“ ĝi pacigos la mondon. TEI enhavas racian kernon, ĉar lingvaj problemoj ja ekzistas. Tamen, en sia tuto ĝi ne estas pravigebla kaj kontribuis al la malbona publika bildo pri nia lingvo. Bonŝance jam antaŭ jardekoj troviĝis kritikoj kontraŭ la plej multaj elementoj de la ideologio, kaj ankaŭ ne ĉiuj ideologianoj jesas al ĉiuj ekstremismaj facetoj.

La malsamaj sintenoj kaj tendencoj en la esperanto-komunumo „pace kunekzistas kaj pruvas ke oni povas konsideri la movadon laŭ pluraj vidpunktoj. Ili ne diserigas ĝin, sed kombiniĝas por krei diversflankajn altirpovon kaj riĉecon“, laŭ Pierre Janton.²⁸² Tamen, ĉi ĉio havu, almenaŭ en informado, siajn limojn: la plej ekstremaj absurdaĵoj de la Tradicia Esperanto-Ideologio (historia determinismo, savo de la mondo per esperanto) forte kontribuis al la „fuŝita bildo de esperanto“. Krome, ankaŭ troa emfazo de malkonsento en nia komunumo povas ĝeni. Esperanto-asocio devas decidi ĉu ĝi volas postuli de registaroj la tujan oficialan enkondukon de esperanto aŭ ĉu ĝi volas fariĝi serioza partnero en kultura kaj junulara agadoj. La strategiaj diskutoj en la komunumo restos, ĉar ili respegulas realajn malkonsentojn malfacile venkeblajn.

Literaturo:

Th. Bormann: Ne hieraŭ aŭ postmorgaŭ!, 1987;

Dahmann: Esperanto en la lernejoj – io inter revo kaj koŝmaro, 1989;

Durwael: Kiel rekrei la bildon de Esperanto, 1991;

Flugel: Men and their motives. Psycho-Analytical Studies, 1947

Lindstedt: Intelekta, jes – banka aŭ rota, ne, 1982;

Révész: Esperantio. Sociologilingva meditaĵo, 1985;

Tonkin: Strategio por UEA: niaj celoj, 1997;

Welger: Überlegungen zur Argumentation für Esperanto, 1982;

Wunsch-Rolshoven: Realität von heute und nicht Utopie für übermorgen, 1993.

IV. Subtenantoj sen mitoj

1. Subtenantoj

Subtenantoj de esperanto povas esti diversaj specoj de homoj kiuj helpas al la disvastigo aŭ apliko de tiu ĉi lingvo, kvankam ili mem ne estas esperantistoj: la gepatroj kiuj ebligas al sia infano iri al renkontiĝo, la fratino kiu helpas dum aranĝo gastumi, ankaŭ ili estas tiaj subtenantoj. Kutime, kaj precipe en informado, oni komprenas sub *subtenanto* faman personon kiu diris ion pozitivan pri esperanto.

Teorio pri varbado nomas tiun informadan strategion *atesto*. Homo kun taŭgaj ecoj atestas la indecon de la proponata varo. „Apliku esperanton, ĉar ĝi lavas pli blanka ol volapuko“, ridetas la kontenta dommastrino en la filmilon, kaj la grizbarba profesoro subskribas ke eksperimentoj kun bestoj pruvis la nedanĝerecon de esperanto. Dum la dommastrinoj kaj la profesoroj en televido estas aktoroj, esperantistoj prezentas verajn parolantojn kaj lingvistojn. Gravas kompreneble certaj taŭgaj ecoj de famuloj, la konateco, la fakuleco, kaj la rilato al esperanto. Por pli facila orientiĝo oni povas surbaze de tiuj konsideroj karakterizi famajn subtenantojn laŭ du principaj parametroj. Unue, la rilato al esperanto.:

- a) La persono mem parolas esperanton, kiel ekz. la iama sveda parlamenta prezidento Ingemund Bengtson. La subtenantoj de esperanto prezentas ĝin kiel facila kaj lerninda, se ne eĉ lernenda lingvo, dua lingvo por ĉiuj. Tion povas postuli kredinde nur homo kiu mem jam lernis. Oni povas imagi nur kelkajn esceptojn, ekz. ke maljunulo postulas de junuloj lerni la lingvon, ĉar junuloj lernas pli facile.
- b) Iom profunda okupiĝo pri esperanto. Kelkaj famuloj ne scipovas nian lingvon, sed scias pli pri ĝi ol normalaj homoj kaj eble iam eklernis. Ofte temas pri parencoj de esperantistoj, kiel la verkistino Isabel Allende, nepino de esperantisto.
- c) Pozitivaj eldiroj. La plej granda grupo sur listo de subtenantoj nek parolas ĝin nek scias superaveraĝe multe pri esperanto sed nur diris iometon pri ĝi, kion oni povas taksi „pozitiva“. Foje tiu takso fare de esperantistoj estas nefidinda, ekz. kiam ironio ne estas bone komprenata. Per nur-vorta subtenanto oni povas plialtigi la reputacion de esperanto, sed apenaŭ varbi por aliĝo. Tiaj eldiroj venas

ofte de politikistoj kaj socie engaĝitaj famuloj, kiuj ĝenerale ofte lasas verki salutvortojn por similaj kluboj, movadoj kaj kongresoj.

Due, la fameco:

a) Ĝenerala fameco.

Filmsteluloj, astronautoj, sciencistoj aŭ sportuloj estas pli konataj ol aliaj homoj, sed rilate al esperanto ne pli aŭtoritataj. Tamen la publika eĥo povas esti granda, kiel en la kazo de Michael Jackson kiu uzis iom da esperanto en la albumo *HIStory*.

b) Grava ofico, pozicio, honoriĝo. Politikistoj kaj aliaj oficialaj reprezentantoj havas superaveraĝan decidpovon kaj gravan opinion en publiko. Distingitoj kiel la gajnintoj de la Nobelpremio estas rekonataj kiel ĝenerale saĝaj. Al esperanto plej rilatas la Nobelpremio pri paco, kiu en 1911 estis aljuĝita al la aŭstriano Alfred Hermann Fried (1864-1921, kaj al T. M. C. Asser), verkinto de esperanto-lernolibro.



Alfred Fried

c) Faka rilato, eksperteco. Speciale interesigas kompreneble apogo de persono, kiu per sia fako devus esti tre kompetenta pri esperanto. Unuavice temas pri lingvistoj kiel Umberto Eco, kiu ĉefe estas konata kiel verkisto. Kaj verkistoj formas plian grupon de homoj profesie spertaj pri lingvoj. Ankaŭ specialistoj pri internaciaj rilatoj impresas, direktoroj de internaciaj institucioj, aŭ mondvojaĝantoj aŭ famuloj kun multetna fono. Sir Peter Ustinov estus ideala varbanto por esperanto – se li parolus ĝin.

Bedaŭrinde esperantistoj ofte ne klare indikas la rilaton inter koncerna famulo kaj esperanto. La tiama prezidanto de la EU-parlamento, José María Gil-Robles, iam letere respondis al esperantisto:

„Mi konsentas kun vi pri la avantaĝoj kiujn Esperanto alportas al universala lingva kompreniĝo, tamen mi opinias ke ĝian disvastigon kaj konon malfaciligas la fakto ke ĝi

ne estas lingvo nature naskiĝinta el la popolo, transdonata de gepatroj al gefiloj. [...] Esperanto povas esti mirinda kompletigo al la kono de diversaj lingvoj, sed hodiaŭ ĝi kapablas anstataŭigi neniun el ili. Malgraŭ tio, mi kuraĝigas vin al ĝia disvastiĝo, kaj mi fidas ke, en ne tro malproksima estonteco, la homaro alvenos al la sole dezirinda lingva kompreniĝo.“ ²⁸³

Li do malgraŭ kelkaj afablaj koncedoj esprimis ĉefe negativan sintenon al esperanto, tamen la revuo *Esperanto* nomis tion „Apogo de EP-estro“. Oni pli konscie aplikis la esprimojn konanto, simpatianto, amiko, subtenanto de esperanto, por eviti miskomprenojn.

Multaj propagandistoj interesiĝas pli pri la kvanto de eminentuloj ol pri la „kvalito“ de la eldiroj. Ili mencias homojn sen indiki kia estis ilia „aprobo“ aŭ „simpatio“. Foje propagandistoj eĉ tiom fuŝas ke necesas supozi trompointencon. Certe pravus la berlina aktivulo Jean Borel ke „multaj, eble la plimulto, ne estas konsciaj mensoguloj, ili nur laŭnature emas kredi, ke iliaj deziroj estas realaĵoj kaj puŝitaj de ekscita entuziasmo ili predikas tion, kion ili kredas vera“ (1910). ²⁸⁴ Tamen tiuj propagandistoj montras mankon da sento de respondeco, kaj tio povas kolerigi, ĉar bonintencaj aktivuloj fidis al la propagandistoj kaj riskas disvastigi fuŝinformojn kaj mem kompromitiĝi.

Ankaŭ esperantaj moŝtoj foje riskas esti misuzataj kiel „subtenantoj“ por esperanta publiko. Iom antaŭ la unua mondmilito Zamenhof skribis saluto al nova laborista esperanto-gazeto ke esperanto estontece „eble“ plej utilos al la laboristoj, kaj ke ankaŭ la laboristoj plej bone komprenos la esperantismon. ²⁸⁵ Pro tiu eta letero laboristaj esperantistoj, resp. iliaj moŝtoj, konkludis ke Zamenhof havis specialan simpatian por la laborista klaso. La ĉefo de la sovetia asocio Drezen asertis eĉ ke pluraj „praktikaj konkludoj“ el la zamenhofs homaranismo estis realigitaj en Sovetunio. Tamen la burĝo Zamenhof havis kompreneble nekompenseblan deficiton laŭ la vidpunkto de la komunisto Drezen, ĉar la varsovia kuracisto metis „la klasdiferencon apud diferencoj gentaj, lingvaj kaj religiaj“. ²⁸⁶

Kiam oni petas salutvortojn kaj altan protektadon de famulo, oni faru tion iom pli pripensite ol iu aktivulo de la Universala Kongreso en Dresden. La reĝa-saksa ĉambelano Von Griegen skribis la 18an de aŭgusto 1908 ke Lia Majesta Moŝto ne povis tuj respondi telegramsaluton, ĉar bedaŭrinde tiu telegramo estis redaktita en esperanto. ²⁸⁷

La verko *Pri internacia lingvo dum jarcentoj*, kolekto de eldiroj de pli aŭ malpli famaj homoj, speciale taŭgas por montri problemojn de la prezentado de famuloj. ²⁸⁸ Ĝia aŭtoro Isaj Dratwer, kiun jam la *Enciklopekio* nomas „fervora prop[agand]isto“, ²⁸⁹ ofte ne donis sufiĉajn fontindikojn, kaj ankaŭ pro cetera malprecizeco estas konsilende ne uzi la libron sen propra kontrolo de la fontoj. Jen kelkaj ekzemploj kiuj montras ankaŭ ĝeneralajn problemojn:

1. Malĝusta profesia indiko: Louis Couturat kaj Léopold Leau estis laŭ Dratwer „lingvistoj“, ²⁹⁰ anstataŭ vere logikisto resp. matematikisto.
2. Neindiko de „kontraŭ-esperantisteco“: Dratwer citis fondintojn de aliaj planlingvoj kiel la supre menciitaj Couturat kaj Leau, aŭ Otto Jespersen, ²⁹¹ sed forsilentas tiun kontraŭ-esperantan agadon.
3. Neindiko de fontoj, malĝustaj fontoj, netaŭgaj fontoj: Jean Jaurès laŭ Dratwer diris: „Esperanto – latino de la demokratio“. ²⁹² La indikita fonto, *Historio de la mondolingvo* de Drezen, fakte menciis la faman francan socialiston, sed ne tiun frapfrazon. Waringhien neis ke ĝi venas de Jaurès, eltrovinte ke unuafoje la esperantisto Emile Boirac uzis ĝin: „Ĝi estis cetere nur transpono de tiutempa konata ŝerco (*le poireau est l'asperge du pauvre*) pri kiu iu mokis, ke oni ne povas scii, por kiu ĝi estas pli insulta, por la poreo aŭ la malriĉulo.“ ²⁹³
4. Ne eminenteco: Pri la konateco de personoj oni povas disputi; la eminenteco parte ja varias de lando al lando. Ĉiukaze Ivo Lapenna kaj Eugène Lanti, kiujn menciis Dratwer, estis famuloj nur en Esperantio.



Isaj Dratwer

Kiam William Solzbacher recenzis la libron en *Esperanto*,²⁹⁴ li plendis pri manko de pli detalaj klarigoj pri certaj citaĵoj, pri pluraj prezeraroj de propraj nomoj, malaktualeco de titoloj kaj oficoj,²⁹⁵ kritikebla traduko de Unesko-rezolucio, nerektaj fontoj „en sufiĉe multaj kazoj“. Solzbacher miris pri la aserto ke la itala verkisto Salvatore Quasimodo estis esperantisto.²⁹⁶ Li cetere ne nomus Albert Einstein „hebrea fizikisto“, kion faris Dratwer. Tamen, Solzbacher laŭdis la libron kaj esperis pri pluaj ĝisdatigitaj kaj plibonigitaj eldonoj. Ulrich Matthias tre avertis kontraŭ la Dratwer-libro: oni estu singarda ankaŭ pri kelkaj papaj eldiroj.²⁹⁷

2. Pri internacia lingvo tra jarcentoj

Ne ekzistas taŭgaj pruvoj pri planlingvoj aŭ cerbumado pri planlingvoj antaŭ la 17a/18a jarcentoj. La prauloj en antikvo, mezepoko kaj frua novepoko ŝajne estis kontentaj kun tre disvastigitaj lingvoj kiel la greka kaj la latina. Ĝisnunaj mencioj en propagando dokumentas fantaziojn de esperantistoj, kiuj deziras pruvi la eternan neceson de internacia planlingvo.

a) Biblio

„[...] la Majstro el Nazaret estis tro saĝa, por ignori la danĝeran soifon pri certeco, kiu loĝas en la animo de la homoj [...]. Tial, ne nur li unu tagon avertis nin, ke ‚ĉe la domo de mia Patro estas multe da loĝejoj’ (Joh. XIV 2), sed li ĉiam zorgis, ke liaj konsiloj iomete kontraŭdiru unu al la alia, kvazaŭ por malpermesi al ni trudi ilin dogmisme al aliaj.“

(Gaston Waringhien ²⁹⁸)

En kelkaj libroj de la Biblio lingvoj ludas rolon, kaj esperantistoj provis utiligi tion por informado. Temas pri la turo de Babelo, la profeto Cefanja kaj la pentekosta miraklo okazinta al la Apostoloj.

Laŭ la libro *Genezo* iam „sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero“, sed kiam la homoj komencis konstrui turon por akiri gloron, Dio „konfuzis“ ilian lingvon, „por ke unu ne komprenu la parolon de alia“ (Gn 11, 1-9). Tiu rakonto sufiĉe maltaŭgas por nia informado, ĉar laŭ ĝi la diverslingveco de la homaro estas justa puno por homa orgojlo. Maksimуме oni povas diri ke tia unulingveco estas granda valoro, tamen la esperantistoj ja ne volas forigi la diverslingvecon, sed nur mildigi la sekvojn.

„Tiam Mi redonos al la popoloj lingvon puran, por ke ĉiuj vokadu la nomon de la Eternulo kaj servu al Li unuanime“ (Cef 3,9). Tiel la Zamenhof-Biblio, finredaktita de pastro Rust, vortigas la profeton Cefanja, kiu agadis ĉ. 640 jarojn antaŭ Kristo. Cefanja estas la naŭa el la t.n. malgrandaj profetoj, eble samtempulo de Jeremia. Kiel multaj el siaj kolegoj, Cefanja avertas la Jerusalemanojn kaj anojn de Juda kiuj laŭ li ne agas konforme al la volo de Dio, pli konkrete: li kondamnas transpreni nejudajn kondutojn kaj identigi la judan dion Javeo kun Baalo. ²⁹⁹

Iom simile kiel Zamenhof-Rust tradukis anonimulo en 1910: „Mi altornos al la popoloj lingvon purigitan“ kaj konkludis ke Cefanja antaŭanoncis esperanton.³⁰⁰ Same faris Drezen, kiu menciis en la *Historio de la mondlingvo* la profeton ĉe la „unuaj provoj kaj projektoj de universala lingvo“. Kuznecov komentas en apendico: „Temas ne pri la redono de iu komuna 'purigita' lingvo, sed pri ‚lipoj puraj‘, per kiuj oni voku la nomon de Dio. Estas dubinda la aparteneco de tiu profetaĵo al la ‚historio de la mondlingvaj provoj‘.“³⁰¹ Waringhien supozis ke la inventinto de tiu ĉi mito estis L. Einstein (1884),³⁰² kiu verŝajne servis kiel nemenciita fonto al Drezen, ĉar Drezen uzis similan germanecan nomformon. La orientalista Eldad Salzman retroŝtis al mi ke la koncerna hebrea vorto povas signifi aŭ „lingvo“ aŭ „lipo“. Tio klarigas la foje malsamajn tradukojn. Cetere, jam la pli frua profeto Jesaja havis la saman problemon, kiam li renkontis Javeon: li timis ke liaj lipoj malpuras, sed anĝelo alflugis kaj per ardanta karbo purigis lian buŝon (Jesaja, 6,5-7).³⁰³ Tio helpas kompreni ankaŭ kion Cefanja celis diri.

La mito pri Cefanja reaperis, kiam en la UEA-Jarlibro de 2001 la *Hotelo Cefanja* varbis por si kaj per la frapfrazo „La plej bona hotelo en Jerusamo“ kaj per la supre citita Biblia frazo.³⁰⁴ Esperinde la kontaktpersonoj Freddi kaj Jeremi pli toleremas al fremdaj kulturoj ol la nomdoninto de la ejo.

Alia Biblia libro gastigata en nia informado nomiĝas *Agoj de la Apostoloj*. La aŭtoro, eble identa kun aŭ almenaŭ proksima al la evangeliisto Luko, rakontas ke dum la pentekosta festo post la morto de Kristo „subite venis el la ĉielo sono kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenis la tutan domon“ kie la adeptoj de Jesuo sidis, kaj

„al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon. Kaj en Jerusamo tiam loĝis piaj Judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo. Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al alia: Rigardu! Ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj tiuj parolantoj? Kiel do ni aŭdas ĉiu ĉiun? en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis? [...] ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj la mirindaĵojn de Dio“ (Ag 2, 1-11).

Iuj mokis ke la Apostoloj drinkis tro multe da dolĉa vino, kion Petro povis kontraŭi krom citante profeton nur per la atentigo, ke estas ja nur la naŭan horon antaŭtagmeze, ke do estas tro frue por drinki (Ag 13-16). Nia franca lingvisto kaj religisciencisto Gaston Waringhien atentigis pri pluraj strangaj elementoj de tiu

ĉi „elpensita, redakcia miraklo, kies detalojn oni ne povas iom serioze esplori sen malkovri erarojn aŭ preteratentojn“. La Biblia aŭtoro ekzemple skribis ke tie en Jerusalemo ĉeestis anoj el ĉiu nacio, sed laŭ Waringhien li menciis eksplicite nur dek kvin popolojn, kiuj entute parolis eble nur tri malsamajn lingvojn: la aramean, la latinan kaj la helenan. Kaj „kial la loĝantoj de Judujo [...] tiom ekmiras kompreni la lingvon de la galileanoj, t.e. la sian propran?“³⁰⁵ Ankaŭ ĉi tiu Biblia rakonto ne vere rilatas al esperanto, ĉar la multlingveco venkiĝas ne per unu komuna lingvo, sed per parolado en malsamaj lingvoj, ne per lernado, sed per unufoja Dia miraklo.

Resume, la propagandistoj uzis Bibliaĵojn netaŭgajn, dum ili preteratentis la solan iel konsiderindan informon el la Libro de la Libro. Laŭ *Genezo* (2,19) ne Dio sed Adam donas nomojn al la bestoj en ĝardeno Eden, do homo povas mem konscie kaj intence inventi lingvon. Ĉu tio taŭgas en informado restas tamen tre dubinde, precipe se oni scias pri postaj diskutoj ĉu Adam inventis jam la ĝustajn – hebreajn? – vortojn. Ulrich Matthias en sia esperanto-informlibro por kristanoj povis prezenti nur kelkajn tre ĝeneralajn citaĵojn, nome ke paco dependas de justeco (Jes 32,17), ke la homoj havu pacon inter si (Mk 9,50) kaj ke Jesuo petas Dion pri unuiĝo de la kredantoj (Jn 17).³⁰⁶

b) Antikvo

Cato. Wilhelm Groth skribis iam en *Germana Esperanto-Revuo* ke la romiano Cato la pli aĝa „rimarkigis pri la utileco de artefarita lingvo“.³⁰⁷ Konsulo Marcus Porcius Cato Censorius vivis de 234 ĝis 149 antaŭ Kristo. La verkanto pri agrikultura ekonomio kaj multaj aliaj temoj fariĝis konata kiel malŝatanto de ĉio greka kaj kiel malamanto de Kartago.³⁰⁸ Lia lingvaĵo estis multgrade originaleca. En sia disertacio pri la lingvaĵo de Cato la historiisto Till skribis pri Cato kiel „lingvokreanto“ kaj tuj konkretigis: „Je 'lingva kreado' ni komprenas ĉian ŝanĝon, kiu bazas sin sur la kreanta povo de individuo.“³⁰⁹ Ekzemploj estas neologismoj, ŝanĝoj de vortsignifoj, novaj sintaksaĵoj k.s. Eble Groth aŭ ties fonto pensis pri tiuj kvalitoj de la lingvaĵo de Cato. Planlingvotio ne estas.

Galenus. Laŭ Drezen „ekzistas historiaj fontoj“ ke la filozofo kaj kuracisto Claudius Galenus „konstruis iun sistemon de signoj por preciza komuniko de diversaj ideoj“³¹⁰. Barandovská-Frank supozis ke temis verŝajne pri pazigrafio, do sistemo kun bildoj aŭ skribitaj signoj.³¹¹

La heleno Galenos (129-199 p.K.) estis konata kiel kuracisto. La grandfamilia nomo *Claudius* ne estas historie dokumentita. Liaj filozofiaj, gramatikaj kaj retorikaj verkoj grandparte perdiĝis, sed laŭ la konataj titoloj ili estis „diletantaj ekskursoj“, juĝis la prilaboranto en renoma fakenciklopedio.³¹²

c) Mezepoko

Hildegardis de Bingen. Rilate al la eŭropa mezepoko oni kutime mencias la *Lingua Ignota per simplicem hominem Hildegardem prolata* de Hildegardis de Bingen (1098-1178), benediktano kaj mistikulo en Germanio. La informoj ekzemple de Drezen pri Lingua Ignota tute malĝustas, kiel riproĉis Willem Manders. Ne temas pri ellaborita sistemo: Lingua Ignota estis nur vortaro de substantivoj kaj kelkaj adjektivoj, tial oni povis uzi ĝin nur surbaze de alia lingvo. Ne primitiva provo de universala lingvo ĝi estis, sed sekreta, privata lingvo kiu mortis kun Hildegardis. Ŝi cetere ne alvokis aliajn lerni ĝin. Laŭ la vortaro ĝi servis ne nur por religiaj kantoj, sed ankaŭ por profanaj celoj, interalie botaniko kaj medicino.³¹³

Frideriko la Dua de Ŝtaŭfen. Artur Bormann skribis ke jam la egipta faraono Psametiĥ kaj la mezepoka imperiestro Frideriko la Dua de Ŝtaŭfen (reg. 1210-50) okupiĝis pri la „problemo de monda lingvo“. ³¹⁴ Sed vere ili interesiĝis pri la unua, di-donacita lingvo de la homaro. Ili lasis kreski infanojn kiuj ne aŭdu ajnan vorton de sia ĉirkaŭo. La infanoj de la eksperimento de Psametiĥ diris *bekos* (Psametiĥ opiniis ke tio estas vorto el la frigia lingvo), la friderikaj infanoj mortis.³¹⁵

Folengo, Teofilo Hieronimo. Drezen prezentis eĉ la *latino macaronico* de Teofilo Hieronimo Folengo (1491-1544) kiel planlingvan projekton kaj provon firmigi la pozicion de la latina. Laŭ Drezen la monaĥo

„simpligis skolastikan latinon, kompletiginte ĝin per ĉiutage uzataj popolvortoj, vulgaraĵoj kaj ordinaraĵoj esprimoj. [...] Ĝi estis kvazaŭ – provo refirmigi la pozicion de la latina lingvo, kiel 'lingvo monda'. Estis provo ĝin adaptigi al la bezonoj de la XVI. jarcento.

Tamen la provo neniel sukcesis kaj estis forgesita.“³¹⁶

Kuznecov avertis en la komentario al la verko de Drezen ke la *latino macaronico* estas literatura burleskaĵo, sed ne mondlingva provo.³¹⁷ Manders, instruisto pri la latina kaj la greka, plie klarigis ke Folengo enkondukis multajn vortojn el la itala kaj fleksiis ilin kvazaŭ ili estus latinaj. Folengo per „latino makaronika“ ne intencis ion religian, lia lingvaĵo tute ne rilatas al skolastiko, male, ĝi havis burleskajn, satirajn aŭ komikajn celojn: „La miksaĵo de Folengo estas nur ŝerco kaj neniel pretendas esti nova lingvo [...] makaronikaĵojn oni

trovas en la literaturo de multaj lingvoj kaj en multaj epokoj.“ [318](#)

ĉ) 19a jarcento

Tolstoj, Lev. El la frua tempo de esperanto la plej fama kaj plej uzata „subtenanto“ de esperanto estis la rusa verkisto Lev Tolstoj, kiu en aprilo 1894 sendis leteron al la esperantistoj.³¹⁹ Oni sciigis interalie ke Tolstoj laŭ propra eldiro lernis legi esperanton en du horoj. Ne estiĝu konfuzoj, tiu letero estis tradukita el la rusa, kaj ne originale en esperanto verkita de Tolstoj.³²⁰ Cetere, Tolstoj ne simple nur laŭdis esperanton, sed skribis samletere ankaŭ ke por neeŭropanoj necesas alia lingvo. La rusa verkisto rekomendis lerni *nepre* la francan kaj germanan, kaj *eble* la anglan kaj esperanton.³²¹ En informilo el 1896, redaktita de Trompeter, Tolstoj estis la sola vere tre konata eminentulo el pluraj cititaj; la kritika parto – pri la bezonoj de neeŭropanoj – mankas.³²²

d) 20a jarcento – politikistoj

Esperantistoj pensas rilate al influhavaj personoj precipe pri parlamentanoj, registaranoj kaj aliaj politikistoj. Kaj se oni taksas esperanton tiom grava rimedo por plibonigi la mondon, tiam estas logike postuli efikajn agadojn ĝuste de politikistoj. En aktuala diskutrondo pri la estonteco de landa asocio ³²³ ĉiam denove revenis la ideo ke oni kontaktu politikistojn, ke oni konsciigi ilin pri la lingva problemo, ke oni invitu lokajn politikistojn al renkontiĝoj, aŭ esperantistoj kiuj samtempe membras en partio ree kaj ree alparolu sampartianojn pri la temo. Plej ofte grandas la naiveco pri la eblecoj de unuopa politikisto, la funkciado de parlamenta laboro, la interesiĝo de partio k.t.p. Sekve inter jenaj esperanto-agantoj grandas ankaŭ la senluziigo pri „la politiko“ aŭ „la mondo“ ĝenerale.

Tia nekompreneo videblis ankaŭ dum prelego de la ĵurnalisto David Ferguson en la aprila Malferma Tago de la Centra Oficejo, 2002. El la publiko daŭre venis postuloj kiel interalie: fari unujaro-planon por „konvinki“ definitan kvanton da homoj, re-„bati“ post „nefavoraj“ artikoloj, decidigi la EU-organojn pri esperanto kiel solvo de la lingva problemo. Ĝuste la taskoj de Ferguson en la nova komunikad-centro en Bruselo povas bone servi kiel ekzemplo por senchava lobiumado. Ferguson kontaktos unuopajn ĵurnalistojn-kolegojn kaj parlamentanojn, ne pri esperanto, sed pri eventualaj komunaj temoj rilate lingva politiko. Li konstruos kontaktreton por laŭ-evente informi pri tiaj temoj, kaj povos eventuale aldoni sciigon pri konkretaj agadoj de la esperanto-komunumo. Por tia delikata laboro necesas prepariĝo, sed oni ne povas plani kaj mezuri tion kiel la produktadon de lernolibroj aŭ la okazigon de kursoj.



David Ferguson

Sun Yat Sen. La kuracisto kaj fondinto de la Ĉina Respubliko en 1912 estis laŭ Dratwer „estro“ de Ĉina Esperanto-Federacio.³²⁴ Sed Dratwer ne indikis ĉu Sun Yat Sen (1866-1925) estis esperantisto kaj aktivis en la Federacio aŭ ĉu tiu estreco estis (pli verŝajne) nur honora ofico. Nenie oni mencias Sun Yat Sen kiel esperantiston. Se li estus esperantisto, tiam la ĉinaj esperantologoj certe tion estus raportintaj, retleteris al mi Liu Haitao.³²⁵

Stalin. En artikol-serio pri „ĉarlatana lingvoscienco“ Solzbacher menciis ankaŭ Josif Visarionoviĉ Stalin (1879-1953), kiu eble iam estis esperanto-lernanto. Solzbacher havas la koncernajn informojn el la biografio verkita de Leo Trockij: *Stalin – An Appraisal of the Man and His Influence*. Tie iu Semen Vereŝĉak, social-revoluciista sammaliberulo, atestis ke Stalin lernis esperanton en malliberejo de la urbo Baku, en 1910. La posta diktatoro „estis konvinkita ke Esperanto estas la internacia lingvo de la estonteco.“ Lia konkurenculo Trockij opiniis ke Stalin tamen ne sufiĉe lernis por povi praktiki la lingvon: „Kvankam li

pasigis pli ol ok jarojn en malliberejoj kaj en ekzilo, li neniam sukcesis lerni eĉ unu fremdan lingvon, eĉ ne kun la escepto de lia malbonŝanca Esperanto.“³²⁶ Solzbacher supozis certe prave ke la celo de la ekzilito Trockij estas precipe montri la intelektan malsuperecon de Stalin, kiu provis lerni ankaŭ la germanan por legi Marx originale, sed Stalin eĉ la facilan esperanton ne kaptis. Krome, Stalin estis prezentata kiel naivulo ĉar li kredis pri la fina venko de esperanto. Trockij mokis ankaŭ pri la atestanto Semen Vereŝĉak, ĉar tiu kiel eksa *narodnik* (socie engaĝita intelektulo) kaj „etika“ socialisto kritikis precipe moralajn kaj karakterajn misojn de Stalin (unuflankeca, sen principoj, sen profunda edukiĝo, sed kun alte evoluita ruzeco).³²⁷

Ĉio ĉi ne tre fidindigas la informojn de Trockij, kaj la „esperantisteco“ de Stalin devas resti historie malhela. Tamen tute kredindas ke Stalin legis mallibereje multajn librojn kaj inter ili ankaŭ unu pri esperanto. Pro lia fifamo ne necesas la averto ne mencii lin en informado, kaj ankaŭ sovetiaj esperantistoj ŝajne neniam uzis la informojn. Kiel ajn, tiutempe ne estus bona ideo citi la ŝtat-malamikon Trockij.

Drees, Willem. La esperantaj fontoj ne estas sufiĉe precizaj pri la demando ĉu Willem Drees (la pli aĝa) vere parolis esperanton aŭ ĉu li nur ŝatis ĝin. Revuo *Esperanto* informis ke la nederlanda ĉefministro de 1948-58 partoprenis esperanto-kongresojn, propagandis por esperanto, kaj oni nomis lin „esperantisto“,³²⁸ „movadano“, „kredanto je Esperanto kaj batalanto por egaleco tra sia tuta vivo“. ³²⁹ Alia gazeto citis lian salutmesaĝon al GEJ-renkontiĝo, sen indiko ĉu la esperanto-teksto estas la originalo.³³⁰ Ankaŭ *Esperanto en Perspektivo* nomis lin „Esperantisto“. ³³¹ GEA-gazeto *La Ponto* raportis en 1949 ke la socialdemokrato „lernis esperanton en sia ofico kaj praktike uzas ĝin. Li mem verkis en iom longa esejo en esperanto pri la problemo ĉu la indonezia konflikto estas solvebla pace.“³³² Drees mem, efektive entuziasma propagandanto por esperanto, skribis nederlandlingve en 1961 pli modeste: „Mia simpatio neniam pli antaŭenigis min ol ke mi facile legas ĝin; pro la cirkonstancoj mi ne havis la tempon sufiĉe ekzerci“. ³³³



Memorstatio pri Willem Drees en Hago

Stammerger, Wolfgang. Por la liberala partio FDP Stammerger fariĝis en 1961 germana ministro pri justico kaj engaĝiĝis precipe pri civitanaj rajtoj. En oktobro 1962, dum la *Spiegel*-skandalo, li volis rezigni pri sia posteno, sed devis ĉiu-kaze eksministriĝi pro serioza vundiĝo en trafika akcidento. Du jarojn poste li transiris al la socialdemokrata partio kaj fariĝis urbestro de Coburg. Li mortis en 1982. *Germana Esperanto-Revuo* en 1961 raportis ke li estas esperantisto; Isaj Dratwer nur redonas tre pozitivan longan citaĵon, sen fonto. ³³⁴ Dratwer resp. lia kunlaboranto aŭ forĝis aŭ eble trovis ne oportune mencii la esperantistecon por ke la eldiro aspektu pli neŭtrala. Kompare al aliaj salutvortoj la eldiro de Stammerger vere elstaras, li skribis eĉ pri la „enkonduko“ de esperanto. Tiutempa GEJ-aktivulo rakontis al mi ke li kaj plia aktivulo iam vizitis Stammerger. Oni parolis germane, ĉar la du junuloj ne kuraĝis ekzameni pri la esperanto-konoj de la eksa ministro. Tamen, Stammerger asertis eĉ ke li parolas esperanton al siaj infanoj.

Jonas, Franz. La plej eminenta esperanto-parolanto en Eŭropo estis eble Franz Jonas, la aŭstria ŝtatprezidanto de 1965 ĝis 1974. Antaŭ la dua mondmilito li aktivis en la laborista esperanto-movado, kaj en 1970 la socialdemokrato fariĝis Alta Protektanto de la Universala Kongreso en Vieno kaj salutis la kongreson esperantlingve. ³³⁵

La ekzemplo Jonas montras ke eĉ esperantisto en tiom altranga pozicio ne esence antaŭenigas la esperanto-movadon, eĉ ne almenaŭ en la koncerna lando. La varbo-efiko simple ne estas tia kiel esperantistoj emas kredi. Oni imagu, kiel averaĝa aŭstro legis gazete en 1970 ke Vieno gastigas esperanto-kongreson kaj ke prezidento Jonas alparolas ĝin en tiu lingvo, kiun li iam lernis. Tiu leganto eble pensis: „Nu bone, nia prezidento havas iun strangan hobion, kaj do? La

antaŭa ŝatis ŝakon kaj ludis kiel junulo piedpilkon. Tio ja ankoraŭ ne estas kialo ke mi mem faru tion.“

Kohl, Helmut. Ulrich Matthias ankoraŭ en 1991 skribis pri „iom pozitiva ³³⁶ opinio“ de la longjara germana ĉefministro (reg. 1982-98) rilate al esperanto, sed en 1995 Helmut Kohl diris en Roterdamo: „Ni ne volas esperanto-Eŭropon, sed Eŭropon, kie ĉiu povas konservi sian identecon.“ El tio oni ne legu precipan „kontraŭ-esperantistecon“ de Kohl. La informo de Matthias sonas kiel tipa troiga interpreto de kelkaj vortoj, per kiuj la ĉefministro supozeble volis senigi sin de GEJ-aktivuloj kiuj iam alparolis lin dum evento en Bonn. Aliflanke oni ankaŭ ne troigu la pezon de la roterdama eldiro. Kohl simple uzis la vorton „esperanto“ kiel tre konatan metaforon de kultura miksaĵo. Lia intenco estis emfazi la nacian identecon en unuiĝonta Eŭropo, kaj tio ŝajnis al li esti necesa, ĉar nederlandanoj timas ke ilia influo al eŭropa politiko ne grandas.

e) 20a jarcento – artistoj kaj sciencistoj

Einstein, Albert. La fama fizikisto Albert Einstein (1879-1955) estis en 1923 alta protektanto de SAT-kongreso en Kassel, Germanio, skribis salutvortojn pri la „utilo de komuna lingvo“ kaj montris simpatiojn por esperanto. Laŭ informoj de lia domhelpistino dum 1927-33 Einstein tre ŝatis esperanton kaj multe parolis hejme pri ĝi. Ĉu li mem lernis kaj parolis esperanton, ŝi ne sciis: „Sed mi scias ke sinjoro profesoro tre interesiĝis pri ĝi.“³³⁷ Laŭ Dratwer Einstein diris:

„Por la internacia komunikado la internacia interkompreniĝo helpe de la internacia lingvo ne estas nur neceso, sed memkomprenebla afero.

Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de la lingvo internacia.“³³⁸

En prova eldono el 1970 tiuj du frazoj estas ankoraŭ eĉ en unu paragrafo, kvazaŭ cito el sama teksto. La indikita fonto estas *Germana Esperanto-Revuo (GER)*, sen jaro, sen numero. En *GER* el 1960 fakte troveblas germanlingva eta serio de Wilhelm Groth kun *Eldiroj de eminentaj personoj pri la problemo de la internacia lingvo*.³³⁹ Inter pluraj parte fuŝe cititaj eldiroj, ĉiuj sen fontindiko, troviĝas tie ankaŭ du frazoj de Einstein el la kongresa saluto.³⁴⁰ Sed, unue: en la germanlingva originalo de la salutletero en 1923 Einstein skribis pri la neceso de iu „komuna lingvo“. Tio estis fuŝtradukita per „la internacia lingvo“. Due, la frazo pri la „plej bona solvo“ ne estas konata ĉe Albert Einstein, sed tre similas al la titolo de verko de alia Einstein, nome de la esperanto-pioniro *Leopold Einstein* el Nurenbergo.³⁴¹

En 1950 Einstein skribis en responda letero al William Solzbacher ke li „ne favoras kaj neniam favoris Esperanton“.³⁴² Tion Solzbacher publikigis en 1977, kiam li recenzis la libron de Dratwer. Sed ankaŭ poste Albert Einstein aperadis en la movado kiel subtenanto. Schulz enkondukis unu ĉapitron de sia varbolibro per la citaĵo: „Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de la lingvo internacia.“ (Dr. Albert Einstein, Professor der Physik, Nobelpreisträger.)³⁴³ Tio en germanlingva libro ŝajnigas ke la *esperantaj* vortoj estus originalaj de Einstein. Okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de Albert Einstein la kapo de la fama fizikisto en 1979 ornamas la kovrilpaĝon de la revuo *Esperanto*: „Albert Einstein: Jubileo de amiko“. La redaktisto Simo Milojeviĉ citis la

frazojn el la Dratwer-libro, konfesante ke „mankas klaraj fontindikoj pri tiu eldiro de Einstein“. Tamen Milojeviĉ firme kredis pri la aŭtentikeco de la eldiro, pro la „genieco de Einstein, „ĉar tia revoluciiginto de la homaj konceptoj pri la kosmo kaj pri si mem estis kvazaŭ destinita por kompreni ankaŭ la revolucion en la internacia komunikado.“ ³⁴⁴

Orwell, George. En sia romano *1984* la brita aŭtoro George Orwell (1903-50) priskribis estontecan diktaturan ŝtaton, en kiu ankaŭ la lingvo estos kontrolata. *Newspeak* („novparolo“) limigas la vortaron kaj gramatikon de la lingvo por limigi per tio la pensaron. Kontraŭregistaraj opinioj, la „penskrimoj“, tial ne plu eblas. Supraĵe, pro la simpla gramatiko kaj la malgranda vortaro, *Newspeak* iom similas al (duon)planlingvoj kiel volapuko kaj esperanto. Kun *Newspeak* Orwell ne celis tiom ataki esperanton kiom la normalan anglan mem, kiel Silber skribis: „Mia kolego J. R. Milton, profesia tradukisto, rimarkigis dum interparolo ke la derivitaj adverboj per ~*wise* multiĝis en la angla lingvo mem, specife en la burokrata ĵargono: evidente Orwell, kiu aparte okupiĝis pri neologismoj en la angla, antaŭvidis efektivan tendencon“. ³⁴⁵

Tamen eventuala simileco (ekz. la afiksoj) eble ne estas hazarda. George Orwell estis nevo de la dua edzino de Eugène Lanti. La SAT-estro Lanti parolis en sia hejmo nur esperanton. Orwell loĝis inter la mondmilitoj foje ĉe sia onklino kaj ĉiam disputis kun Lanti pro la lingvo. Waringhien supozis ke el tio Orwell „konservis rankoron kontraŭ nia lingvo, kaj karikaturis ĝin en sia romano“. ³⁴⁶ En informado estas iom nekonsilinde mem ekmencii tiun *Newspeak*. Sed kiam iu interesato diras ke laŭ li esperanto iel similas al *Newspeak*, tiam eblas emfazi ke eventulaj similecoj nur estas unuarigardaj kaj ke la esperantlingvanoj ja ne volas limigi la pensadon. ³⁴⁷

McCallum, David. Verŝajne ne al la kategorio *esperantista trompo*, sed al *nekomprenita ŝerco* apartenas ĉi tiu apogo de la usona aktoro David McCallum. Revuo *Esperanto* informis „por niaj legantinoj“ ke McCallum respondis al ĵurnalista demando, kion li ŝanĝus en la mond-situacio, se li povus tion: „Mi insistus kaj forte proponus, ke oni instruu Esperanton al ĉiu infano en la mondo, por ke en unu generacio ni sukcesu havi plenan interkomprenon.“ ³⁴⁸

Okazas ofte ke verdsteluloj ne komprenas ironion, kiam ili aŭdas ion ŝajne pozitivan pri la lingvo. La nederlanda koruso *Akordo* havas en sia repertuaro la satiran kanton „Venko! Venko!“, kaj entuziasmo-plenaj esperantistoj „estas

kortuŝitaj aŭskultante tiel fervoran verdstelismon de junuloj. Ili tute ne suspektas, ke temas pri satiro.“ Eĉ ne helpas dumkante svingi per esperanto-flaĝetoj aŭ montri Zamenhof-portretojn, rakontis *Akordo*-subtenanto Roel Haveman.³⁴⁹

Beatles. Eble la rekordo en fantaziumado pri esperanto-subtenantoj aperis en la germana infanmagazino *Rate mal*. Naiva propagandeca artikolo rakontas interalie:

„Famaj esperanto-amikoj. ‘Estus bele, se ĉiuj homoj parolus la saman lingvon’, opiniis la *Beatles*, kiam ili post multe da tempo denove koncertis. En Montreal (Kanado) ili ludis nepagite. La monon ricevos sportistoj, kiuj partoprenos la olimpikajn ludojn. Ĉiu sportisto ricevos ĉ. 3.000 markojn. Sed kiu devigas sin lerni samtempe esperanton, tiu ricevos la *duoblon!*“³⁵⁰

Fontindiko kompreneble mankas, sed la simpla fakto ke la *Beatles* disiĝis jam en 1970 strangigas la informon. „Se ĉiuj homoj parolus la saman lingvon“, se vere *Beatles*-ano dirus tion, li celus certe la anglan. – La artikolo supozigas ke ĉiuj esperanto-vortoj finiĝas per -o, tial ĝi estas eble la fonto por la samopinia karto en la germana versio de *Trivial Pursuit* el 1984.

Staller, Ilona. En la revuo *Esperanto* Alberto Menabene kaj Eskil Svane diskutis en 1989 ĉu la movado ĝoju pri la subteno de Ilona Staller. La hungardevena italino konatiĝis kiel pornografia aktorino (Cicciolina) kaj publik-agadis por la Radikala Partio helpe de siaj spertoj kiel filmulino. Ŝi sugestis al la landoj de la Eŭropa Komunumo enkonduki esperanto-instruadon laŭ la hungara modelo.³⁵¹ Oni ĉiam konsideru la celgrupon.

f) Johano Strasser

Internacie apenaŭ konata, sed pli ligita al esperanto ol ĉiuj aliaj ĉi-rubrike menciitaj, estas la germana aŭtoro Johano Strasser. Sian esperantan personan nomon *Johano* li ŝuldas al la fakto ke la gepatroj estis internacia esperanto-paro. Dum seminario pri german-nederlandaj kontaktoj en Bad Münstereifel, novembro 1995, mi demandis lin ĉu tiu nomo iam alportis problemojn al li. Li rakontis ke fine de la 1970aj jaroj la konservativa gazeto *Bayernkurier* skribis pri li, altranga membro de la Socialdemokrata Partio de Germanio (SPD), ke jam la nomo *Johano* indikas proksimecon al sudamerikaj revoluciistoj. Plurajn jarojn poste Strasser volis vojaĝi en la nomo de SPD al Nikaragvo por informiĝi pri la sandinistoj. Ĉar ne ekzistis rektaj fluglinioj el Eŭropo, li devis iri tra Miami. Sed la usonaj aŭtoritatoj ne volis lasi lin pluvojaĝi, sen indiko de kialoj. Eĉ telegrama subteno de la estroj de SPD kaj de la germana federacia registaro ne povis helpi lin. Fine Strasser tamen sukcesis iel atingi Nikaragvon. Multe poste li eksciis ke li estis sur nigra listo de la usona sekretservo CIA. La fonto de CIA estis la supre menciita artikolo en *Bayernkurier*, laŭ lia rakonto.

En 1987 aperis la unua romano de Johano Strasser. *Der Klang der Fanfare*, „La sono de la fanfaro“, trovis certan ĝeneralan atenton ĉar la aŭtoro estis jam konata kiel politika aktivulo kaj redaktinto de kultura revuo. La romano estas parte aŭtobiografia, kaj laŭ multaj esperantistoj havas sufiĉe pozitivan sintenon al esperanto. Tial „vere ŝokita mi estis“, skribis la *GEJ-Gazeto*-redaktanto Thomas Pusch, pro radio-intervjuo de Strasser kun la okcident-germana radio WDR, la 14an de junio 1987. Strasser rakontis ke liaj esperantistaj gepatroj, geedziĝintaj dum la Universala Kongreso 1932 en Parizo, „jam estis pli-malpli rezignintaj pri esperanto kaj ne plu pludonis tiun lingvon al mi kaj miaj gefratoj“. Li kaj la intervjuisto vidis en esperanto ĉefe nerealegeblan ideon kaj mokis pri la multaj planlingvaj projektoj inter si konkurencaj. Pusch komentis pri la intervjuo ke Strasser tie tre negative priskribis esperanton kaj prezentis „sufiĉe stultajn kaj simple neĝustajn opiniojn“. Li trovis domaĝe ke Strasser „ne sukcesis venki tiujn plej elementajn antaŭjuĝojn“. ³⁵² Sed ĉu oni, konsiderante la vivhistorion de Strasser, vere parolu pri *antaŭ*-juĝo? Ĉu ne-laŭdego de esperanto estas aŭtomate *antaŭ*-juĝo?

Post propra legado de la romano de Johano Strasser oni ne plu miras pri la ŝajna kontraŭdiro inter la „pozitiva“ romano kaj la menciita intervjuo. Esperantistoj

havis dum la legado supozeble aliajn sentojn ol la normala leganto. Ekzempla sceno pri la poŝtovicisto Cornelis Schuurman ilustru tion:

„Esperantistoj estas leterverkantoj. [...] Cornelis Schuurman skribas kaj ricevas ĉiutage plurajn leterojn en esperanto. [...] Cornelis Schuurman scias kion signifas esti poŝtisto: Funkciigi tiun reton, kiu kunligas sendintojn kaj ricevontojn de leteroj en la tuta mondo, [...] okupiĝi pri tuja ekspedo, ĉu tio ne estas same grave kiel planti la ideon de esperanto en la korojn, kiel li faras nun jam pli ol tridek jarojn?“

Certaj esperanto-amikoj vidas en tia priskribo belan prezenton de sia esperanto-idealo. Neesperantistoj trovas tion tro sentimentala, sentoplena kaj stranga. Tiel certaj ĝisostuloj legas komforte kelkajn liniojn, rekonas konataĵon kaj ĝojas pri la esperanto-reklamo, dum la neesperantisto havas aliajn sentojn kaj miras pri la foje sektecaj pensoj kaj stranga kondutado de la romanpersonoj. Ni esperantistoj povas bonege lerni el la romano kiel la publiko vidas esperanton. Strasser observis multajn interesajn facetojn, por kiuj estu spaco ĉi tie.

Jen denove pri Cornelis Schuurman, poŝtisto kaj esperantisto en Nederlanda Frislando, kiu volas komence de la 1930aj jaroj presigi *Frisan Esperantistan Informilon*. La loka presisto Jan Markus Moises esperas ke esperanto ne eble estas skribata en cirilaj literoj. Al Schuurman ne sufiĉas simple nei tion, li devas kiel bona esperantisto tuj propagandi pri Zamenhof kaj laŭdi ties elekton de la latina alfabeto. Sed la manuskriptoj kaŭzas problemon al la presisto: „Tiam mi ja devos aĉeti litertiparon por mil guldenoj. Tion mi ne povas elspezi. Estas jam sufiĉe malfacile presi en lingvo kiun neniu komprenas. Se estus almenaŭ la angla.“

Schuurman estas „videble ofendita.“ Li klarigas ke esperanton oni parolas en la tuta mondo, ke ĝi estas la „sola internacia interkompreniga instrumento de vere universala graveco“, ĉiu povas lerni ĝin en plej mallonga tempo kaj baldaŭ oni instruos ĝin ĉie kiel unuan fremdan lingvon. La presisto interrompas lin ke oni devos mendi novan preslitertiparon, ĉar tie ĉi ne estas uzataj la kutimaj literoj, sed: „Schuurman protestas. Laŭ li esperanto estas skribata en la samaj literoj kiel la nederlanda. Je tio nenio nenormalas, krom eble, ke oni povas lerni la lingvon en unu semajno, almenaŭ la gramatikon kaj la bazan vortaron.“ Fine la presisto sukcesas atentigi pri la specialsignoj en kelkaj vortoj: *Luĉio, arĝento, forĵetas, ĝoje*. Tio kostas almenaŭ okcent guldenojn. Tion Schuurman ne povas pagi. La presisto proponas al li iri al pli granda samurba presejo, kiu ja povas elspezi la novajn literojn.

„Sed tiom facile oni ne povas fari tion. Cornelis Schuurman montras vizaĝon de ofendito. Ne sen kialo li venis ĝuste al [la laboristmovada] Jan Markus. Burĝa presejo laŭ lia opinio tiu-kaze ne estas taŭga. La esperanto-movado laŭ li apartenas al la laborista movado, ambaŭ estas internaciismaj, ambaŭ laboras por monda paco.“

Schuurman decidas kolekti monon por la specialsignoj. Li trovas kontakton interalie kun Karel, la filo de la presisto Moises. Karel, la fakta ĉefpersono de la romano, fariĝas la plej persista lernanto de Schuurman. Johano Strasser perfekte priskribas kiel la knabo Karel – kompareble al multaj nunaj samproblemanoj – devas respondi al tipaj demandoj pri esperanto, pri aplikado kaj aro da parolantoj. Kaj kompreneble li tiel troigas kiel li lernis de Schuurman. En normala propaganda konversacio tio estas ankoraŭ sendanĝera, sed ankaŭ poste dum la dua mondomilito la enkapa esperantismo ne estas elŝaltebla. Demandite de germana komisaro Karel fanfaronas ke en Nederlando loĝas dek mil esperanto-parolantoj. La komisaro: „Dek mil esperantistoj en Nederlando. Oni konas unu la alian, oni vizitas unu la alian, oni rekomendas unu la alian. Se iu serĉus dum kelka tempo kaŝejon, tio ne estus problemo, ĉu ne?“

Post la milito Karel Moises vivas en norda Germanio kaj sidas kun iu sinjoro Bursig en la restoracio de la geedza paro Drewes. La mastro subaŭskultas scivoleme kaj reveninte diras al sia edzino ke ili parolas la italan. Ŝi miras, ĉar Karel venas el Nederlando. „Sed la alia“, sinjoro Drewes kontraŭas. La edzino ne kredas tion kaj mem iras subaŭskulti, purigante la tablon apude de la du konversaciantoj. Ree ĉe la edzo ŝi diras: „La hispanan li parolas!“

Tiu sinjoro Bursig, kiun Karel apenaŭ konas, helpas kolekti monon por iu internacia esperanto-centro en malnova kamparodomino en norda Germanio, kun monhelpo de la germana ŝtato. Sed en misfidema momento Karel, lia patrino kaj la aliaj esperantistoj eltrovas ke Bursig malaperis kun 75.000 markoj al komunista oriento. La geedzoj Drewes informas al la polico pri Bursig: „Li estas italo.“ La patrino de Karel

„jam dekomence ne ŝatis lin [Bursig]. Kaj tiun ideon pri la esperanto-centro ŝi neniam taksis serioza. Nur tute fine, kiam Karel montris al ŝi la leteron de la estraro el Roterdamo kaj la raportojn en la gazeto, tiam ŝi lasis sin trompi. Ĉiam la sama eraro: tiu freneza espero, ke iam venos la granda ŝanco.“

La romano ankoraŭ ne finiĝis. En epilogo la rakontisto, nevo de Karel, povas tamen realigi la finvenkisman revon de la onklo mortinta en 1959. La nevo iras

al deputitino de la Eŭropa Parlamento, kiu iam ricevis de Karel kroman instruiĝon plus iom da esperanto:

„Poste en Hamburgo, ŝi diras, ŝi frekventis esperanto-kurson. Ekde tiam ŝi estas registrata kiel esperantistino, regule ricevas informilojn, aktuale eĉ la magazinon *Monato*. Tempon por legi ŝi trovas apenaŭ. Ne, al la Kongreso en Aŭgsburgo ŝi ne veturos. Mankas libera tempo. Bedaŭrinde.“

Fakte ne fiktiva metodo registri pseŭdoesperantistojn, neigo sonanta konate. Konata estas al ni esperantistoj ankaŭ la argumentado de la nevo de Karel por esperanto en Eŭropo: „Sed interpretistaro de preskaŭ mil personoj [...] – tio ja kostas enorman sumon. Tiun oni povus uzi pli bone.“ La parlamentanino kontraŭas: „Por kio? Ĉu por la subvencio de la agrikulturo? Kompare al tio, kion kostas al ni la agrarmerkato, la kostoj por la lingva servo estas nur etaĵo“.

La romano ne temas ekskluzive pri esperanto, Karel interesiĝas dumtempe pri komunismo, prilumata estas la germana okupacio de Nederlando. Sed vere signifan interesecon la libro havas eble nur por la esperantistoj. Multaj detaloj montras la internulan scion de Strasser, kiun li forverkis de sia koro, kiel ekz.: „Internacia Esperanto-Centro. Akcento ĉiam je la antaŭlasta silabo: internacia!“ Aliloke oni tuj korektas „taso de teo“ per „taso da teo“, unuopulo propagandas la „kosman lingvon Lincon“³⁵³. En grupvespero renkontiĝas „esperantistoj de ĉiuj gradoj de ‘lingva perfekteco’“. Informadantoj interesiĝu pri la opinio de eksterulo, la patro de Karel, invitita al esperanta somerfestoj:

„Esperanto? Kaj kion panjo kaj mi faru je tio? Tie ni komprenos ja nenion. [...] Esperanto! Kiel oni nur povas okupiĝi pri tia stultaĵo! Tio ja estas simple malŝparo de tempo. La knabo prefere kolektu poŝtmarkojn aŭ ludu ŝakon aŭ iru al gimnastik-asocio. [...]

Se mi estus poŝtisto aŭ instruisto kaj ricevus mian salajron ĉiu-monate, egale kio okazas, jes, tiam ankaŭ mi havus tempon okupiĝi pri esperanto aŭ io ajn. Sed mi staras de mateno al vespero en la presejo, kuras tra la urbo de unu al alia, por ricevi kelkajn labor-taskojn.“

3. Lingvistoj

Konataj lingvistoj esprimis sin pri planlingvoj kaj esperanto tre malsame. Ĉu oni taksas ies eldirojn „pozitivaj por Esperanto“, tio dependas multe de oniaj propraj opinio kaj atendoj. Ne saĝas atendi de lingvistoj ke ili transprenas tipe esperantismajn propagandaĵojn, sed oni ja rajtas postuli ke lingvistoj kiuj verkas pri esperanto iom konatiĝu kun bazaj faktoj. Serioza homo ja ne verku pri alia lingvo, kaj certe ne malestime, sen scii ion pri ĝi.

Ĝenerale, estas bone en informado laŭokaze mencii pozitivajn eldirojn de lingvistoj pri esperanto, eĉ se lingvistoj kutime famas nur inter kolegoj. Oni iom konsideru tion en informado. Vere internacie famaj lingvistoj nuntempe estas eble Umberto Eco, kiel verkisto, kaj Noam Chomsky, kiel maldekstra socikritikanto. La rilato de lingvistoj al esperanto ne estis ĉiam tre pozitiva, parte pro iu aktuale reganta scienca paradigmo, parte pro esperanta propagando. La riproĉo, ke la lingvistoj ne legu la informilojn „por la simpla popolo“ sed informiĝu pli profesie, ne ĉiam trafas, ĉar tio ne tute facilas por neesperantistoj. Fakaj tekstoj ankaŭ en naciaj lingvoj ne abundas. La troigaj asertoj, per kiuj la esperanto-propagandistoj provis trompi „la simplan popolon“, efikis en la fakula mondo sufiĉe ofte damaĝe. Je tiu fono estas iom impertinente, se radikalaj propagandistoj ĝenerale kalumnias tutan profesian grupon (simile kiel la tradukistojn).

Willem Manders citis el esperantista rondo, en kiu „unu el ni faris la rimarkon, ke sen la interveno de la lingvistoj nia movado verŝajne nun status pli proksime al la venko [...]“, kaj ke lingvoscienculoj „nur povas fuŝi kion homoj malpli sciencaj sed pli praktikaj sukcesis atingi [...]. Ju malpli la lingvistoj sin okupos pri Esperanto, des pli prosperos nia lingvo kaj movado.“ Laŭ Manders tiu „drasta eldiro“ ne reprezentas la ĝeneralan opinion, sed ekzistas tamen granda skeptiko kontraŭ lingvistoj. ³⁵⁴ Pli aktuala ekzemplo estas la ĝenerale relative bona nederlandlingva informlibro de Alberto Fernández el 1995. Lia-aserte oni trovas inter la plej fervoraj kontraŭantoj de esperanto precipe filologojn. Ili estas blindaj por esperanto, dum ili organizas ekspediciojn por studi la lingvon de nove malkovrita papua tribo de kelkcent individuoj. ³⁵⁵ La leganto ricevas la impreson ke *ĉiu* lingvisto estas kontraŭ esperanto kaj ke ĝi ne estas pristudata lingvistike. Sed Fernández ja mem listigas en la bibliografio ekzemple libron de

la fonetikisto John C. Wells, kial li ne citis ion el ĝi? Estas malsaĝe prezenti ĝeneralan konflikton inter „la lingvistoj“ kaj „ni“, ĉar la interesato tiam pli supozeble kredos al la akceptataj fakuloj pri lingvoj kaj ne al la propagandistoj de planlingvo.

Detlev Blanke emfazis ke lingvisto ne estas baze kontraŭ esperanto, almenaŭ ne se li science okupiĝis pri planlingvoj. Li citis Otto Jespersen el 1928: „Estas granda eraro kredi, ke ĉiuj metiaj lingvosciencistoj estas kontraŭuloj de lingvo konstruita; pli ĝuste estas diri, ke tiuj inter ili, kiuj plej multe okupiĝis pri la problemo, plej multe favoras la ideon.“³⁵⁶ (Tio ne tro mirigas, ĉar verŝajne nur tiu, kiu favoras la ideon, volas okupiĝi multe pri la afero.) Inverse, Blanke taksas la etoson en la ĝenerala esperanto-movado „ne estas aparte favora“ por lingvoscienco. Li mencias plurajn kialojn: la gvidantoj de esperanto-asocioj estas ofte t.n. „praktikuloj“, „kiuj ne aparte emas al teoriaj studoj nek komprenas ties signifon“; eble postefikas la „psiko-traŭmaj historiaj spertoj“ kun la Delegacio kaj IALA. Krome niaj propagandistoj timas ke fakaj esploroj „senbazigas, aŭ almenaŭ relativigas, kelkajn disvastigitajn mitojn“. ³⁵⁷ Ne helpas spegulo al malbelulo.

La propagandistoj, kiuj plendas pri lingvosciencistoj ĝenerale, supozeble ne deziras sciencan esploron sed la simplan senkritikan transprenon de la reklamitaj asertoj. Tio fakte foje okazas, sed „pozitiva“ juĝo de lingvisto ja ne estas aŭtomate ĝusta: prof. d-ro Mario Pei asertis ke ekzistas 16 milionoj da esperanto-parolantoj kaj ke la studtempo por sciencisto estas nur 20 horoj por pasiva scio, resp. 40 horoj por ankaŭ aktiva scio. ³⁵⁸

Sekva nekompleta aro da priskriboj eble povas iom ilustrati la rilaton de lingvistoj al planlingvoj ĝenerale aŭ specife al esperanto.

a) 19a jarcento

Alicja Sakaguchi trovis el la postlasaĵo de **Rasmus Kristian Rask** (1787-1832) ke la kunfondinto de la indoĝermanistiko ellaboris skizon de naturalisma planlingva projekto: *Lingua'z universale*.³⁵⁹ Rask enkonduke al traktato el 1823 menciis la problemojn de rusoj lernantaj la germanan aŭ francan, kiuj bezonas jarojn ĝis ili kapablas konversacii kun instruisto. Ne ekzistas dubo pri la utileco de „inventajo kiel la ĝenerala lingvo“. Sed ĉu tia lingvo eblas? La Latinan li rifuzis kiel tro „nenaturan, malfacilan, pezan“. La anglan uzas nur komercistoj kaj maristoj. Bazo de novkonstruinda lingvo devas esti laŭ li la latina kaj la greka, ĉar ili estas plej disvastigitaj kiel bazaj lingvoj. De la latinidaj lingvoj oni transprenu la fleksiformojn, reduktitaj, simpligitaj kaj harmoniigitaj; la vortradiko ne ŝanĝiĝu. Rask pensis ankaŭ pri prefiksoj, per kiuj oni povas esprimi ĝeneralajn nociojn,³⁶⁰ ekz. *-ik* kiel adjektivo: *kritik, medik, historik*.³⁶¹ La komenco de la Patro Nia: *Peter néu ke stá nel celo, sanktifikate o-sé téu nomen, o-advení téu regno, o-fí téu volentá kom nel celo assí ep' el ĝe*.³⁶²

Jacob Grimm (1785-1863), konata kolektinto de fabeloj, estas plia grava pioniro de la lingvistiko kaj patro de la germana filologio. Laŭ la esperantistoj A. Bormann kaj Groth li okupiĝis en 1860 pri „plano de monda helplingvo“.³⁶³ Fontindikoj mankas. Laŭ la konataj verkoj kaj opinioj de Grimm tia ŝatokupo estas sufiĉe neverŝajna. Friedrich Hoffmann solvis la enigmon kaj skribis jam en 1905 pri „eraro“. Ankaŭ li ne povis imagi ke Grimm okupiĝis pri planlingvo, interalie ĉar tiam la 75jara Grimm uzis ĉiujn siajn fortojn por la Germana Vortaro.³⁶⁴ Sed ekzistas „programo por krei ĝeneralan lingvon“ el 1860 verkita de *August-Theodor von Grimm*, fakte ne kiel eldonaĵo, sed kiel parto de privata letero.³⁶⁵ La konfuzo inter ambaŭ nomoj eliris supozeble de Nikolaus Eichhorn, kiu trovis en sia fonto la nomon *von Grimm* kaj kompletigis tion al *Jacob von Grimm*, kvankam Jacob Grimm neniam havis *von* en la nomo.³⁶⁶ Al la multaj disvastigantoj de la eraro apartenas ankaŭ la populariga aŭtoro Frederick Bodmer, kiu eĉ plifantaziumis ke Grimm „kelkajn jarojn antaŭ sia morto rezignis preferi la fleksiajn arbitrecojn de la pli malnovaj eŭropaj lingvoj kaj skizis la esencajn antaŭkondiĉojn de estonta lingvoplanado.“³⁶⁷

Laŭ la oksforda lingvosciencisto **Max Müller** estas malfacile kredi ke artefarita lingvo aŭ universala lingvo povus esti iam aplikata aŭ ke la tuta mondo per ĝi komunikos. Sed tia lingvo estas ebla. ³⁶⁸ Li aperas en pluraj malnovaj esperanto-informiloj, kiuj ne mencias lian skeptikon pri la tutmonda *realigo*. ³⁶⁹ Unu esperantisto skribis eĉ ke „multaj sciencistoj“, inter ili Müller, „esprimis sian konvinkiĝon pri la venonta universala lingvo“. ³⁷⁰ Fakte Müller konfirmis nur ke esperanto estas laŭ li la plej bona el la konkurencaj projektoj, el kiuj ĉiuj havas kaj bonajn kaj malbonajn flankojn. ³⁷¹

b) 20a jarcento kaj nuntempe

Pristudinto de i.a. kreolaj lingvoj, **Hugo Schuchardt**, jam frue simpatiis al planlingvoj. Cetere li emfazis la neceson de taŭga medio kaj de sufiĉa subteno por planlingvo-projekto. ³⁷²

La konataj novgramatikistoj **Karl Brugmann** kaj **August Leskien** polemikis kontraŭ esperanto, en 1907 ili neis esperantan literaturon resp. kulturon kaj kredis je la baldaŭa malsukceso kaj disdialektiĝo de esperanto. ³⁷³

En septembro de la sama jaro la Harvard-a lingvisto **Leo Wiener** (1862 en Bjalistoko – 1939) nomis esperanton lingvo sen spirito kaj miksaĵo el multaj „plifacilitaj“ lingvoj. Cetere laŭ li eblas en esperanto nur balbuti, kaj multaj sonoj estas neprononceblaj por ĉiu popolo. ³⁷⁴ Lia prijuĝo estas eble iomete interesa, ĉar li apartenas al tiuj junuloj kun kiuj Ludoviko Zamenhof festis sian naskiĝtagon en 1878, kantante en praesperanta lingvoprojekto. Leo Wiener estis cetere la patro de Norbert Wiener, la fama matematikisto kaj pioniro de informadiko. ³⁷⁵

La rusiano **Jan Ignacy Baudouin de Courtenay** iom scipovis esperanton sed ne uzis ĝin, kaj eksplicite neis esti ano de la „esperanto-sekto“. ³⁷⁶ Al la supre menciita polemiko de la novgramatikistoj Brugmann kaj Leskien li reagis per samtitola defenda respondo.

Ferdinand de Saussure menciis esperanton nur unufoje, antaŭvidante lingvoŝanĝiĝon kiam esperanto estos uzata. ³⁷⁷ Laŭ Dratwer, Ferdinand de Saussure „tre simpatie rilatis al la Esperanto-movado, tre firme certigis la eblecon de arta internacia lingvo, kaj aprobis Esperanton“. Fonto estas nekrologo verkita de Théophile Cart en *Lingvo Internacia* (1913). ³⁷⁸ Sed ankaŭ la nekrologo, kie Cart skribas ke li iam estis studento de Ferdinand de Saussure en Parizo, ne enhavas taŭgajn neŭtralajn fontojn. Dum pluraj jaroj la frato René de Saussure, matematikisto, estis esperantisto kaj verkis gravajn kontribuojn pri lingvaj demandoj, sed poste publikigis proprajn projektojn. Tial Ferdinand eble sciis pli pri esperanto ol legeblas en lia ĉefverko.

Antoine Meillet konstatis en 1928 ke esperanto pruvite funkcias kaj ke tial *pri*

tio ne plu necesas diskuti.³⁷⁹ Li skribis ĝenerale tre pozitive, foje eble iomete tro optimisme.

André Martinet havis supraĵan kontakton kun Ido, kiu konsciigis al li ke la riĉeco de lingvo ne kuŝas en morfologiaj komplikaĵoj. Li agnoskas ke ekzistas problemo de internacia komunikado, sed dubas ĉu esperanto estas „la solvo“, ĉar „nuntempe la angla lingvo tendencas esti la solvo, eĉ se veras, ke ĝi povas esti nur lama solvo.“³⁸⁰

Eugen Wüster, kunfondinto de terminologio kaj esperantologio, estis dejune esperantisto kaj dediĉis en sia ĉefverko³⁸¹ el 1931 trionon al esperanto kaj multon de sia tempo por Enciklopedia Vortaro. Sed dum la 1930aj jaroj lia rilato al esperanto ekmalvarmiĝis; tion kaŭzis ne nur seniluziiĝo pri esperanto, sed ankaŭ lia interesiĝo pri naturalismaj planlingvo-projektoj. Lia esperantisteco estas foje rigardata kiel junultempa eraro.³⁸² En la Universala Kongreso de 1970 en Vieno li tamen plenumis la kongres-universitatan rektorecon.

En *The Loom of Language* (1943) **Frederick Bodmer** pritraktis la „artefaritajn lingvojn / mondajn helplingvojn“ tre mokeme, ekzemple rilate al volapuko per la esprimoj „naiveco“ kaj „ridinda“. Krom la akuzativo kaj la pluralo de la adjektivo, kiujn li apriore kaj sen argumentoj nomis „morta ŝarĝaĵo“, malplaĉis al li esperanto-radikoj el la germana kaj skandinaviaj lingvoj. Male li rekomendis pli da orientiĝo je la angla. Kiom malmulte Bodmer sciis pri esperanto, kaj kiel li prijuĝis ĉefe el propralingva perspektivo, tion montras jena ekzemplo: „Kiam oni *skuas* botelon, la esperantisto diras 'skui', sed kiam oni *skuas* la manon de amiko, tiam oni diras 'manpremi'.“³⁸³ Bodmer en sia tre sukcesa kaj disvastiĝinta libro ne tuŝis pli interesajn demandojn pri planlingvoj, sed uzis tamen evidente esence pli da materialo ol multaj kolegoj.

Ekde 1992 **Umberto Eco** okupiĝis pri esperanto. Li estas monde konata verkisto kaj profesoro pri semiotiko en la universitato de Bologna. En *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo* li pritraktis en unu ĉapitro ankaŭ la „internaciajn helplingvojn“, el ili ĉefe esperanton.³⁸⁴ El esperanta perspektivo la ĉefa valoro de la esperanto-ĉapitro de *La serĉado* estas ke ĝi atentigas pri esperanto. Eco fakte reagis al argumentoj kontraŭ esperanto, sed entute ne skribis tiom pozitive pri ĝi kiel pluraj esperantistoj opiniis. John C. Wells skribis ke Eco „pledas por ni“,³⁸⁵ sed por kio precize? La finvenkismajn

celojn de la UEA-statuto Eco ne subtenas; lia libro temas pliparte pri teoriaj ebloj, malmulte pri la aktuala realo de esperanto. Eco ne utiligis la modernan esperantologian literaturon, ankaŭ ne la ital-, angla-, franc- aŭ germanlingvan. Lia ĉefa fonto pri planlingvoj ŝajne estis la verko de Couturat kaj Leau el 1903/07. Tial li uzis la klasifikon de aposterioraj kaj aprioraj projektoj, sed ne sufiĉe distingis inter uzata planlingvo kaj projektoj neniam aplikataj. Sekve li skribis pri „nova Babelo de internaciaj helpaj lingvoj“. Eble li taksis la nuntempan esperanto-komunumon tiom malgranda ke ĝi tiu-rilate ne esence malsamas de la projektoj.

La germana lingvisto **Harald Haarmann** en 2001 publikigis *Kleines Lexikon der Sprachen*, en kiu inter multaj aliaj lingvoj, de la albana ĝis la zulusa, aperas la trafvortoj esperanto kaj mondaj lingvoj, kun relative multe da informoj. Haarmann nomas esperanton la sola el la „artefaritaj mondaj lingvoj (planlingvoj)“, kiun lernis ne nur aktivuloj kiel duan lingvon, sed ankaŭ „multaj miloj da homoj“ kiel gepatran lingvon, kiel li skribas certe troigante. „Kvankam esperanto konceptiĝis kiel planlingvo, ĝi nuntempe estas vivanta lingvo, kaj sonas artefarite se oni hodiaŭ difinas ĝin ‚artefarita‘ lingvo. Ne estas strange klasifiki esperanton inter la naturaj lingvoj.“

Li komparas ĝin pro la „nedomineco“ kun kreolaj, minoritataj kaj diasporalingvoj, kiel la jida kaj la romaa (cigana). La rilaton kun Zamenhof Haarmann priskribas sobre, bonvoleme kaj sen mencio de homaranismo k.t.p. Sed li mencias la Unesko-rezolucion de 1985, Universalan Esperanto-Asocion kun membroj en pli ol 100 ŝtatoj, la mondajn kongresojn kun po pluraj miloj da „aktivuloj“, kaj du aferojn pri kiuj ni informadantoj verŝajne eĉ ne pensas: nome ke la londona klubo de 1903 ankoraŭ ekzistas kaj ke la esperantlingva traduko de la Korano estas „agnoskata kiel aŭtoritata eĉ de la islamaj fundamentistoj en Irano“ (?).

La priskriboj de gramatiko kaj vortaro mallongas, kiel ĝenerale en tiu ĉi leksikono, kaj fine de la artikolo li konkludas: laŭ la ampleksa literaturo esperanto pli vivas ol multaj naturaj lingvoj kun simile multaj parolantoj, ekz. la friula en Italio, la kimra en Britio, la frisa en Nederlando aŭ la mordva en Rusio, sed malpli ol la estona. La estonteco de esperanto ne plu dependas de agnoskiĝo kiel oficiala lingvo, ĉar ŝajnas certigita ĝia pludonado de unu generacio al la alia, ĉu kiel unua, ĉu kiel dua lingvo. Sed, Haarmann aldonas, oni povus plialtigi ĝian prestiĝon donante pli valoran statuson al ĝi. Tamen esperanto ne havas realajn ŝancojn kontraŭ la angla, tiel ke la „tutmonda“ utiligo restos verŝajne por ĉiam

revo de la esperantistoj.

Rilate al interlingvistiko (en la artikolo pri *Weltsprachen*, mondaj lingvoj) li sekvas „nian“ terminologion superrigardante la temon, kaj prijuĝas ke malgraŭ kontraŭaj asertoj ankaŭ en la skematismo de planlingvoj ekzistas multaj nekonsekvencaĵoj, kaj ke la ideo kio estas „logika“ aŭ „esprimo-klara“ dependas ĉiam de la unuopaj lingvo-kreintoj. Esperanto „sendube“ estas tiu „artefarita monda lingvo“, kiu havas la plej multajn parolantojn, kaj taŭgas por traduki verkojn de la monda literaturo aŭ produkti originalan sciencan literaturon. „Sed sur la monda politika scenejo ĝis nun tiu lingvo ne sukcesis“, kaj „ĝian veran terenon esperanto disvolvas ne en la praktika komunikado, sed en la rolo de simbol-portanto por la revo pri monda komunikado en sennacieca komunika medio“. ³⁸⁶ La artikoloj de Haarmann estas tre salutindaj, certe kompare al liaj antaŭaj verkoj. Tia prezento de esperanto ŝajne estas la maksimumo da bonvola priskribo, kiun ni legitime povas postuli de neesperanta lingvisto.

4. Oficialaj organizaĵoj

„Sed ĉar mi en tiu rilato mem faris multe da spertoj, mi avertas vin: ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton! Se la Esperantmovado estas forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon.“

(Franz Jonas, prezidento de la Respubliko Aŭstrio, en 1970 ³⁸⁷)

Registaroj foje uzas esperanton en la kadro de publika agado por si resp. por siaj ŝtatoj. Tre konata ekzemplo estas la registaro de PR Ĉinio, kies fremdlingva eldonejo ekde la komenco de la 1970aj jaroj subvencias esperantlingvaĵojn eldonatajn sub ŝtata kontrolo. Tiaj broŝuroj ekzistas de pluraj landoj, demokrataj kaj nedemokrataj, eldonitaj de tiuj ŝtatoj. Tio montras certan rekonon de esperanto. Sed ni mem konsideru ke ili eldonas varbbroŝurojn por si ankaŭ en multaj aliaj lingvoj, kaj ke la preskvanto de la esperantaĵoj estas verŝajne unu el la plej malgrandaj.

Kontaktoj al registaroj aŭ internaciaj oficialaj organizaĵoj estas foje rigardataj laŭ la tradicia skemo de desuprismo kaj desubismo. Tiuj du esprimoj venas el la finvenkisma ideologio kaj signifas du malsamajn vojojn al la fina venko. Desubisme oni konvinku multajn ordinarajn civitanojn postuli „justan solvon de la lingva problemo“ kaj aliĝi al la esperanto-movado, desuprisme oni tuj alparolu la potenculojn de la mondo ke ili zorgu pri la fina venko de esperanto.

Ĝenerale la mencio de ŝtataj aŭ oficialaj rekonoj por esperanto efikas bone en informado, sed atentu ke al vi ne okazos tiel kiel al mi en la okcidentgermana urbo Dortmund: organizanto estis varbinta studentan grupon kaj petis min prelegi al ĝi antaŭ la komenciĝo de la kursserio. Mi ne forgesis informi pri la diversaj ŝtataj moralaj kaj financaj subtenoj en Germanio aŭ aliaj landoj por esperanto-asocioj, pri la du resolucioj de Unesko, pri la esperantisteco de eksa aŭstria prezidento k.t.p. Nur post la prelego la organizanto sciigis al mi ke temis pri studenta grupo de *anarkiistoj*...

a) Ligo de Nacioj

Post la unua mondomilito la venkintoj kunvenis en Versailles apud Parizo, kaj ili ne nur formulis la pac-kondiĉojn por la malvenkintoj, sed fondis ankaŭ Ligon de Nacioj por subteni pacon kaj sekurecon en la mondo. Entute 62 landoj iam membris en la Ligo, sed ĝi neniam fortis, precipe pro disputoj inter la membroj kaj nemembreco de pluraj gravaj ŝtatoj (Usono tute ne, Germanio nur en 1926-33, Sovetunio nur en 1934-1939). En 1946 la Ligo oficiale malfondiĝis.

La Ĝenerala Kunveno de la *Ligo de Nacioj* diskutis pri esperanto jam en 1920.

³⁸⁸ Ĝi taskis la Ligan Ĝeneralan Sekretarion, la japanon Nitobe, pri serioza raporto. Raporto de la Asista Ĝenerala Sekretario estis relative favora por esperanto, sed la posta Ĝenerala Kunveno ne akceptis la „petojn pri la Esperanto-instruado“ (1923). En 1924 la Ĝenerala Kunveno rekomendis al la membroj-ŝtatoj, permesi esperanton kiel „klaran lingvon“ en telegrafio kaj radiotelegrafio. Tio signifas ke oni pagas ne laŭlitere, kiel oni faras por kodoj kaj kio tendence pli kostas, sed laŭvorte kiel ĉe normala lingvo. Do entute, la honorigo de esperanto fare de la Ligo relative modestas; ³⁸⁹ post malsukcesoj la esperantistoj perdis la esperojn pri la Ligo.

b) Unesko

Unesko, *United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization*, estas la eduka, scienca kaj kultura organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj. Al ĝiaj celoj apartenas forigi senalfabetecon, antaŭenigi la interŝanĝon de informoj kaj „Kulturon de paco kaj demokratio“. Ĝi eldonas liston de mondaj kulturaj heredaĵoj kun pli ol 630 monumentoj en 118 landoj. La sidejo de Unesko situas en Parizo.

La organizaĵo rezoluciiis jam dufoje pri esperanto, en 1954 en la urugvaja Montevideo, kaj en 1985 en la bulgara Sofio.³⁹⁰ La unua rezolucio, el 1954, konstatis unue la praktikajn rezultojn de la laboro de UEA: proksimigi homojn el diversaj landoj. Kaj tiuj rezultoj de la laboro de UEA, la rezolucio rekonas, respondas al la celoj de Unesko. Due Unesko petas tiujn ŝtatojn-membrojn, kiuj volas enkonduki aŭ ampleksigi esperanto-instruadon lernejan aŭ universitatan, informi la Ĝeneralan Direktoron pri tio. Tiu direktoro estas komisiita sekvi la kurantan evoluon de esperanto kaj kunlabori kun UEA „en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn“.³⁹¹ La konferencantoj akceptis la rezolucion nur post forigo de „iu kontraŭata punkto 4“, kiu tekstis: „La Ĝenerala Konferenco [...] rekomendas al Ŝtatoj-Membroj kuraĝigi la uzon de esperanto en maniero, kiun ili konsideras la plej taŭga“.³⁹²

La dua rezolucio de 1985 rememorigas pri la rezolucio el 1954, konstatas ke esperanto „intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj“, gratulas al la 100jara jubileo, invitas la ŝtatojn-membrojn marki tion per konvenaj aranĝoj kaj plimultiigi esperanto-instruadon, rekomendas al internaciaj neregistaraj organizaĵoj pristudi la eblon mem uzi esperanton.³⁹³

Kompreneble la esperanto-movado entuziasmas pri la rezolucioj, parte ne maljuste, sed foje tro optimisme.³⁹⁴ Unesko agnoskis la ekziston de esperanto, ke ĝi estas uzata dise en la mondo, kaj Unesko proponas pripensi ĉu iu mem volas elprovi esperanton. Sed la rezolucioj ne akceptis finvenkisman koncepton, kiu faru esperanton lingvo de ĉiuj. En informado tute apuda, kvazaŭ memkomprenebla mencio de la Unesko-rezolucioj bone impresas, ĉar ili

kundonas al esperanto parton de la seriozeco de la monda organizo. Kompare kun la Ligo de Nacioj, la sukcesoj ĉe UN estas do pli grandaj.

En 1950 kaj 1960, okaze de peticioj al Unuiĝintaj Nacioj, UEA povis transdoni

895.432 resp. 925.034 individuajn subskribojn kaj 15.454.780 resp. 72.892.000 kolektivajn. La peticio de 1966 proponis ke UN rekomendu „al la membroj-ŝtatoj, subteni la instruadon [de esperanto] kaj instigi ties aplikadon ĉe la internaciaj rilatoj de la popoloj.“³⁹⁵ „Kolektiva subskribo“ signifas ke subskribis la reprezentantoj de 492 resp. 3.846 organizaĵoj kun tiom da milionoj da membroj.

Janton provis taksu la esperantistaron per la kolektivaj subskriboj el 1966: se el 72 milionoj da homoj „nur“ dudekono lernis esperanton, instigita de la peticio, tiam pli ol 3,5 milionoj da homoj fariĝis esperanto-parolantoj.³⁹⁶ Sed supozinde la plimulto el la kolektivaj subskribintoj eĉ ne sciis kion kelkaj reprezentantoj (kiuj ekzakte?) „subtenis“, aŭ ili ne sciis multon pri esperanto. Pri la unua UN-petskribo ankaŭ Solzbacher kritikis malsufiĉan distingon inter la du specoj de subskribintoj: „Se ekzemple en iu lando instruista asocio kun tri mil membroj kaj 235 individuaj instruistoj subskribis la Petskribon, la statistiko simple kalkulis 3235.“ Li konstatis ke inter la t.n. parlamentanoj enkalkuliĝis kelkaj „altaj administraj oficistoj“, kaj foje male. La plej granda parto el la 1.607 lingvistoj konsistis el la kolektiva subskribo de la *Riksmalforenig* de Oslo, kun 1.200 membroj. Sed membreco en tiu asocio signifis nur ke oni preferas unu el la du norvegaj lingvoformoj, do ne temas pri lingvistoj entute. Solzbacher supozis ke cetere la kolektivaj subskriboj de kelkaj esperanto-kluboj plialtigis la nombron de „lingvistoj“.³⁹⁷ Lapenna mem menciis rilate al la kampanjo de 1966 kelkajn el tiaj organizaĵoj, inter ili Unuiĝo de Ligoj por Edukado de Infanoj en Jugoslavio kun kvarcent mil, Universala Homama Asocio en Japanio kun tricent mil kaj Socialdemokrata Partio de Germanio kun sepcent mil membroj.³⁹⁸

La peticio el 1950 estis la bazo por la sukceso en Montevideo, kaj estimindas la laborego kolekti tiom da subskriboj. Sed en informado precipe tiuj „kolektivaj“ subskriboj ne tro imponas. La satiro *Kiel (mal)venkigi Esperanton* atentigis cetere ke UN ne plenumis la rezolucion kaj proponis ke elstaraj esperantistoj protestu malsat-strikante antaŭ la UN-domego en Nov-Jorko. Ili esperinde ne devos elteni ĝis morto, ĉar ja tiom malfacilas akiri novajn esperantistojn.³⁹⁹

c) Konsilio de Eŭropo

En 1949 dek okcidenteŭropaj ŝtatoj fondis en Londono la Konsilion de Eŭropo, kiel politika organizo survoje al unuiĝonta Eŭropo. Nuntempe en la Konsilio membras preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo, por antaŭenigi socialan kaj ekonomian progreson, protekti la homajn rajtojn kaj la pluralisman demokration, kaj precipe por subteni la novajn demokratiojn en centra kaj orienta Eŭropo. La ĉefaj organoj estas Komitato de la ministroj pri eksteraj rilatoj kaj Parlamenta Kunveno el deputitoj senditaj de la parlamentoj en la membro-ŝtatoj. Ekzistas krome Sekretariejo kaj Kongreso de la Komunumoj kaj Regionoj de Eŭropo.

Ekde 1986 UEA havas konsultan statuson ĉe la Konsilio, kio ebligas al UEA partopreni la debatojn de la Konsilio. Rudolf Fischer tiutempe, kiel redaktanto de la GEA-gazeto, troigis ke per tio la Konsilio estas post Unesko „la dua grava organizo, kiu subtenas la celon de [UEA] enkonduki komunan duan lingvon por ĉiuj homoj“.⁴⁰⁰ Sed fakte la esperanto-organizaĵoj sukcesis jam plurfoje kunlabori kun la Konsilio, ekzemple TEJO okazigas regule seminariojn kadre de la junularaj centroj de la Konsilio en Strasburgo kaj Budapeŝto.

5. Privataj kaj religiaj organizaĵoj

a) Amerika Filozofia Societo

Eble la unua organizaĵo kiu okupiĝis pri esperanto estis la *American Philosophical Society* en Philadelphia, Usono. Ekde 1887 komitato, de ĝi elektita, esploris la valoron interalie de volapuko. Fine ĝi prijuĝis esperanton la plej bona el la ekzamenitaj lingvo-projektoj. Sed esperanto estis laŭ la komitato tro fleksia, kaj la komitato decidis krei planlingvon sur hindeŭropa bazo. Pri tio okupiĝu internacia kongreso, sed ĝi neniam okazis. ⁴⁰¹

La societo kompreneble fariĝis mito en la esperanto-historiografio. Privat: la komitato de la societo, kiu ankoraŭ nenion sciis pri esperanto, la 21an de novembro 1887 „alvenis al tiuj samaj konkludoj pri lingvo tutmonda, al kiuj venis ankaŭ Zamenhof.“ ⁴⁰² Pri la posta malkontento de la societo Privat silentis. Simile Adams en la *Enciklopedio de Esperanto* informis ke la komitato, ankoraŭ „scianta nenion“ pri esperanto, kondamnis volapukon kaj formulis la principojn vere necesajn por planlingvo, kaj laŭ Adams ili estis la samaj principoj kiel tiuj de esperanto. ⁴⁰³ Ĉe Schulz oni legas nur ke la societo „favoris“ esperanton al volapuko. ⁴⁰⁴ Dratwer sciigis ke la societo en 1887 malakceptis volapukon kaj volis fondi propran projekton. En 1889 la societo akceptis raporton de komisiono pri esperanto, sed pri la enhavo aŭ la sinteno de la raporto Dratwer skribas nenion. Pri la planita internacia kongreso oni legas ĉe Dratwer nur ke ĝi havus la taskon „pridiskuti la problemon de lingvo internacia“. ⁴⁰⁵ Menciigis plurfoje Henry Phillips, kiu sole el la societo favoris esperanton. Ankaŭ Forster emis ne tro emfazi la faktan malakceptiĝon de esperanto, kiu „trovis multe pli favoran ekzameniĝon [ol volapuko] kiel kontribuo al la problemo.“ ⁴⁰⁶ Sciigo pri la malakceptiĝo de esperanto mankis krome ĉe Manders. Laŭ li la raporto (de 1889?) malakceptis la teoriajn bazojn de volapuko. ⁴⁰⁷

La *Londonan* Filologian Societon oni kutime prisilentas: ĝia prezidanto Alexander J. Ellis, volapukisto, konkludis en 1888 ke volapuko jam fine solvis la problemon de internacia lingvo. ⁴⁰⁸

b) La Delegacio en Parizo

En 1900, okaze de la monda ekspozicio en Parizo, la sciencistoj Léopold Leau kaj Louis Couturat instigis la fondon de Delegacio por la alprenado de internacia helplingvo, *Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale*. Ĝi realiĝis en 1901. En 1907, tricent dek organizaĵoj kaj 1.250 intelektuloj simpatiis al la ideo, kvankam ili ne pretis konkrete kunlabori. En oktobro 1907 ekestis Komitato de la Delegacio, al kiu apartenis dek du membroj. Inter ili estis la lingvistoj Hugo Schuchardt, Otto Jespersen kaj Jan Baudouin de Courtenay, kiuj jam esprimis sin pozitive pri la ebleco de planlingvo. Esperanto estis reprezentata de Emile Boirac, poste aliĝis al la Komitato la aŭtoro de Latino sine flexione, la matematikisto Guisepe Peano. La kemiisto Wilhelm Ostwald prezidis, Leau kaj Couturat estis komence sekretarioj kaj poste fariĝis membroj.

Kiam la Komitato okupiĝis dum kelkaj kunsidoj pri diversaj planlingvaj projektoj, tiam la aŭtoroj estis invititaj defendi sian projekton. Zamenhof lasis sin reprezenti de Louis de Beaufront, ĉar tiu malnova franca esperantisto estis konata kiel konservemulo kiu kontraŭis ĉiujn reformojn. Dum fina kunsido, la 24an de oktobro 1907, la Komitato decidis akcepti esperanton, sed nur kun certaj ŝanĝoj laŭ la projekto de nekonata aŭtoro kun la pseŭdonimo Ido. El la dek du komencaj membroj ĉeestis nur Ostwald, Baudouin de Courtenay kaj Jespersen, krome voĉdonis Leau kaj Couturat kaj kvar reprezentitaj membroj. Sed la Lingva Komitato de Esperanto kontraŭis ĉiujn ŝanĝojn, kaj komence de 1908 okazis skismo inter esperantistoj kaj reformuloj. Wilhelm Förster, honora prezidanto de la Komitato, rifuzis plukunlabori pro la stilo trakti la aferon; ankaŭ Baudouin de Courtenay kaj la esperantisto Boirac forlasis la Komitaton. Léopold Leau, Louis Couturat, Wilhelm Ostwald, Otto Jespersen kaj la reprezentanto de esperanto, Louis de Beaufront, ekpropagandis la reformprojekton.



Louis de Beaufront

De Beaufront kaj Couturat estis havintaj sekretajn kontaktojn jam en 1905. Louis Couturat, logikisto, matematikisto kaj esploro pri Leibniz, estis fakte la motoro de la Delegacio. Li dekomence volis esperanton reformitan kaj kredis ke la esperantistaro alprenos la reformojn, se ili estos subtenataj de konata esperantisto. De Beaufront havis personajn malamikecojn en la franca esperantomovado kaj kunagis. La esperantistaro kompreneble estis ŝokita, kiam De Beaufront publike deklaris en junio 1908 ke li mem estas tiu anonima Ido. (Kvankam la ĉefa aŭtoro de la projekto estis Couturat.) Ido ne povas esti nomata „projekto de la Delegacio“, ĉar la plimulto de la Delegacio ne subtenis ĝin; el la 310 societoj „subtenantaj la Delegacion“ neniu sekvis la idistojn. ⁴⁰⁹

La projekto perdis jam kelkajn jarojn post la fondiĝo ĉiujn gravajn subtenantojn. La plej konata subtenanto de Ido estis la kemiisto Wilhelm Ostwald, populara

humanisto kaj pacisto, kiu donacis al la Ido-movado parton de sia Nobelpremia mono, sed malaktiviĝis post kelkaj jaroj.⁴¹⁰ En 1915 li verkis artikolon pri projekto de reformita germana lingvo. Alfred Michaux, organizinto de la unua UK kaj kunfondinto de Ido, publikigis en 1909 ion pri propra projekto.⁴¹¹ Couturat mortis pro aŭtomobila akcidento en 1914, kaj Leau ŝajne jam en 1908 ne plu tre interesiĝis pri la afero. Otto Jespersen en 1928 publikigis propran planlingvan projekton (Novial), en kiu li forĵetis i.a. la afiksosistemon de Couturat. De Beaufront mortis en 1935 preskaŭ forgesita kaj de esperantistoj kaj idistoj.



Alfred Michaux

En esperanto-informado la Delegacio, kaj ankaŭ Ido mem, estas kutime ne menciindaj (krom en broŝuro kiu havas sufiĉe da spaco por ĝuste priskribi la aferon). Ĉi tie la Delegacio-historio estas priskribita tamen iom pli detale, ĉar

nuntempaj idistoj rakontas alian version de la historio:

„Principe, la Delegacio decidis por esperanto, sed postulis ke oni forigu ties evidentajn mankojn. Tiam prilaboritan esperanton proponis la franca sciencisto Couturat. La aŭtoro de esperanto, la sendube genia pola okulkuracisto d-ro Zamenhof, deklaris sin preta konsenti al prilaborita esperanto, sed fine li malkonsentis al la de Couturat proponita plibonigita esperanto pro premo de siaj adeptoj kaj de sia eldonisto“ (Germana Ido-Societo). ⁴¹²

Foje idistoj rakontas nenion. Kiam mi petis informojn pri Ido tiam la sekretario de Germana Ido-Societo, s-ro Neußner, eĉ rifuzis tion. Li respondis ke oni donas informojn nur al Ido-parolantoj, ĉar laŭ li jam okazis ke „la de ni donitaj informoj estas citataj sen la kunteksto kaj redonataj falsigite por krei negativan bildon ĉe homoj, kiuj mem ne konas Idon“. ⁴¹³

En tradicio de la Delegacio en 1911 fondiĝis *Verband für die Schaffung eines Weltsprache-Amtes*, asocio por la kreo de oficejo pri la monda lingvo. Ĝi ĉesis funkcii jam en la dua jaro. Drezen informis ke ĝi, kreita laŭ iniciato de Wilhelm Ostwald, poste estis infiltrita de idistoj, kaj ke Svisio promesis kunlaboron, sed tio ne plu okazis pro la komenco de la unua mondmilito. ⁴¹⁴

c) International Auxiliary Language Association

International Auxiliary Language Association (IALA, Asocio pri Internacia Helplingvo) estis fondita en 1924 en Nov-Jorko de Frederick Cottrell kaj Alice Morris. La celoj: esploro, diskuto, propagando pri ĉiuj demandoj rilataj al la enkonduko de helplingvo; agnosko de la graveco de la temo ĉe la registaroj de ĉiuj landoj; realigo de la rekomendoj, precipe en la lernejoj.

La kemiisto Frederick Cottrell estis prezidanto de komitato pri internacia lingvo de Internacia Esplora Konsilio (1919). Li kolektis informojn pri esperanto, Ido k.t.p. kaj opiniis ke riĉa kaj grava organizo, kiu subtenas kaj propagandas planlingvon, estas pli efika ol la ekzistantaj asocioj. Tial li provis „realigi interkonsenton inter Esperantistoj, Idistoj kaj aliaj mondlingvanoj.“ Alice Vanderbilt Morris (1875-1950) estis ano de la riĉa Vanderbilt-familio. La malavara subtenantino de ekz. la kristana asocio de junaj virinoj estis eklerninta esperanton dum malsanuleja restado. „Ŝi bone legis kaj iomete parolis la lingvon“, Solzbacher skribis. Morris kundecidis en la komenco ke IALA ne kreu propran projekton sed nur elektu inter kvin jam ekzistantaj, kaj finance subtenis i.a. la eldonon de la Stojan-a bibliografio kaj de la Originala Verkaro de Zamenhof. Krome ŝi fariĝis eĉ dumviva membro de Universala Esperanto-Asocio.⁴¹⁵ En 1925 Morris celis dum renkontiĝo en Ĝenevo rekunigi idistojn kaj esperantistojn, sed la esperantistoj rifuzis ŝanĝi ion je sia lingvo. Fine en 1933, ŝajne oni ne scias precize kial, Morris decidis ke IALA nun eklaboru por propra projekto.⁴¹⁶ Poste, multaj kunlaborantoj forlasis ĝin pro disputoj en la asocio. Tial la direktoro Alexander Gode havis en 1951 la okazon prezenti sian latinidan projekton Interlingua nome de la asocio.

Interese estas ke kaj la Delegacio kaj IALA origine ne volis krei novan lingvon, sed nur elekti el jam ekzistantaj projektoj. La tento estis tro granda, sekve ambaŭ organizaĵoj inventis novajn planlingvajn projektojn, Ido resp. Interlingua-n, projektojn pli naturalismajn ol esperanto.

ĉ) Eŭropa Federalista Partio

La Eŭropa Federalista Partio (EFP) fondiĝis en 1959 en la itala urbo Mantovo kiel *Partito Democratico Federalista Europeo* kun la intenco esti la „unua tuteŭropa partio“. Samjare en Vieno fondiĝis *Federalista Internacio de la Eŭropaj Federalistaj Partioj*.⁴¹⁷ En 1965 ĝia programo postulis pli intensan lingvoinstruadon kaj instruadon pri tuteŭropa historio kadre de tuteŭropa lerneja kaj universitata reformo. Ĉiu eŭropa infano havu la eblon loĝi ses monatojn en lando kies lingvon ĝi lernis.⁴¹⁸ Eŭropa Kongreso de 1974 (Ĝenevo) ellaboris plian bazan programon: la eŭropa federacia ŝtato decidu pri „komuna dua lingvo, kiu estos instruata en ĉiuj lernejoj krom la gepatra lingvo. Kun intereso ni observas la spertojn kun internaciaj lingvoj, ekz. kun esperanto.“⁴¹⁹



"Baloti sen pento": afiŝo en Germanio en 1972.

En 1970 EFP anoncis en germana esperanto-gazeto ke ĝi „bezonas la esperantistojn“. ⁴²⁰ *Litova Stelo* informis ke Kongreso de EFP el 1991 decidis „alvoki Registaron de Pollando, la naskiĝlando de Esperanto, deklari Esperanton dua oficiala lingvo de la respubliko.“⁴²¹ Laŭ ĝia organo *Federalisto* la estraro de EFP postulis de la Eŭropa Komunumo la enkondukon de esperanto kiel dua oficiala lingvo, „ankaŭ sur novaj monbiletoj“. ⁴²² „La facile lerneblan esperanton kiel tuteŭropan duan lingvon“ rekomendis EFP ankaŭ en „programaj eldiroj“ en 1992. La prezidanto de la nun neaktiva EFP, Wojciech Soczówka, nomis

esperanton „la sola normala lingvo“.

La partio partoprenis du balotojn al la parlamento de FR Germanio. En 1969 ĝi ricevis 49.650 voĉojn, en 1972 24.057 voĉojn; ⁴²³ en la lasta baloto al GDR-parlamento en 1990 3.636 voĉojn. Tio estis ĉiam malpli ol unu procento. ⁴²⁴ Membronombroj de la partio ne troveblis. Laŭ manlibro pri germanaj partioj ne sukcesis al EFP allogi la gvidajn personojn de la eŭropa movado. Ĝi estis interne disŝirita pro disputoj kaj havis grandan membran fluktuadon. ⁴²⁵ Pri esperanto la manlibro ne sciigas, ĝi estis supozeble nur tre flanka aspekto de la partio. La publikan bildon pri esperanto la partio ne vere influis.

d) Internacia PEN-Centro

Poetists, Essayists and Novellists (PEN) estas internacia verkista asocio, kiu celas tutmonde disvastigi literaturon, subteni liberecon de la parolo kaj diversecon de opinioj (ankaŭ en malpli ofte uzataj lingvoj), kontraŭbatali malamon inter rasoj, klasoj kaj popoloj. En la jaro 2000 ekzistis 134 „naciaj“, lingvaj PEN-centroj, laŭ la principo ke por ĉiu lando kaj lingvo ekzistu nur unu centro. Sed povas kreiĝi subcentroj en grandaj landoj, kaj konatas esceptoj en specialaj kazoj: Svisio havas tri centrojn. La Internacia Sekretariejo situas en Londono, tie la asocio cetere fondiĝis jam en 1921 fare de la angla verkistino Catherine Amy Dawson Scott.

La akcepto de la Esperanta PEN-Centro ⁴²⁶ en 1993 speciale taŭgas en por mencio en informado, ĉar ĝi donas la aspekton ke esperanto estas „plenalora literatura lingvo“. Informade oni ne menciis la Esperantan PEN-Centron laŭte kaj pompe, sed marĝene kvazaŭ ĝi estus memkompreneblaĵo.

e) Rom-Katolika Eklezio

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) montras modele kiel esperanta „faka“ organizaĵo povas akiri simpatian de neesperantlingvanoj kaj agadi en la kadro de pli granda komunumo. Ĝi estas rekonita de la Papa Konsilio por la Laikoj kiel „internacia privata asocio de fideluloj laŭ la papa juro“. La altan protektadon plenumas ekde 1995 kardinalo Miroslav Vlk, kaj „ĉielaj patronoj“ estas sankta Maximilianus Kolbe, kiu esprimis sian simpatian pri la katolika esperanto-movado, kaj papo Sankta Pio la deka (1903-14), kiu estis la unua papo kiu havis kontakton kun esperantistoj, skribis IKUE-kasisto Carlo Sarandrea.⁴²⁷



Kardinalo Miroslav Vlk

Sed laŭ Ulrich Matthias la unua fidinda eldiro de papo pri esperanto estas salutvortoj al IKUE-kongresanoj en la jaro 1975.⁴²⁸ Johano Paŭlo la Dua, papo ekde 1978, diras en la 54-lingva Paska Saluto *Urbi et orbi* frazon ankaŭ en esperanto.⁴²⁹ Ĉio ĉi ne signifas ke la rom-katolika eklezio estas precipe por-esperanta, sed estas bele ke „faka“ esperanto-asocio estas agnoskata kiel aliaj similaj asocioj.

f) Bahaismo

Kvankam bahaismo bazas sin sur la profetoj akceptitaj ankaŭ en Islamo (i.a. Abraham, Jesuo, Mohamedo) kaj aldone sur la fondinto Baha'U'llah, ĝi ne apartenas al Islamo sed estas progresema religio kiu postulas la samrajtecon de viro kaj virino, niveladon de riĉo kaj malriĉo, uzon de tekniko kaj scienco por plibonigo de la homa bonfarto k.t.p. Bahaanoj vivas en multaj diversaj landoj; en la devenlando Irano ili nuntempe estas persekutataj. La filo de la fondinto de Bahaismo fakte rekomendis lerni esperanton, sed la esperantaj bahaistoj nur estas malplimulto interne de la bahaisma komunumo. Kutime la bahaanoj uzas internaci-rilate la anglan. ⁴³⁰

6. Resumo de subtenantoj sen mitoj

Esperantistoj ŝatas ornami informilojn per la eldiroj de homoj multe konataj ekster la esperanto-komunumo. Tio ne malbonas, sed devas okazi kun konsideremo kaj skrupulo. Ne estiĝu dubo pri la intenseco, kiome la koncerna famulo „subtenas“ esperanton aŭ la esperanto-komunumon aŭ esperanto-ideologion. Pri salutvortoj ni ĝoju, sed ne miskomprenu ilin kiel specialan simpation, ĉar ni estas ne la solaj kiuj foje ricevas ilin. Se la koncerno estas mem esperantisto, estus iom nehoneste kaŝi tiun fakton.

Ankaŭ la subtenoj de famuloj foje fariĝis mitoj. La plej konata ekzemplo estas eble la germana-usona fizikisto Albert Einstein, kiu fakte sendis salutvortojn al SAT-kongreso en 1923, sed post la dua mondmilito neis simpation al esperanto. Tamen daŭre oni ŝatas menci lin en informado. Eĉ pli klasika mito estas la eldiroj de la Biblia profeto Cefanja, kiuj estis miskomprenitaj kaj tute ne rilatas al planlingvoj. La miskompreno estas eĉ pli banala je la kazo de Jacob Grimm, al kiu oni aljuĝis leteron de persono kun simila nomo. Al esperantistoj en la „socialismaj“ landoj certe gravis precipe voĉoj de marksistoj, sed fakte la profetoj de la komunismo estis sufiĉe skeptikaj pri planlingvoj.

Inter esperantistoj ne maloftas granda skeptiko kontraŭ lingvistoj. Eble oni timas ke lingvista esplorado danĝeras al la esperantaj mitoj. Tamen tiuj lingvistoj, kiuj serioze okupiĝis pri planlingvoj, povas agnoski la ekziston de la funkcia lingvo esperanto.

Pluraj ŝtataj organizaĵoj havas rilatojn al esperanto-asocioj. Precipe menciinda estas Unesko. Ĝi konstatis en rezolucio ke la celo kaj akiroj de UEA, kunligi homojn el diversaj landoj, respondas al la celoj de Unesko. El la aliaj konataj organizaĵoj menciendas laŭokaze la rom-katolika eklezio kaj la verkistara asocio PEN.

Literaturo:

Dratwer: Pri internacia lingvo dum jarcentoj, 1977;

Groth: Aussprüche bedeutender Persönlichkeiten [...], 1960;

Waringhien: Eseoj I, 1956.

Monografio pri la diversspecaj subtenantoj – ideaj aŭ materiaj, seriozaj aŭ hazardaj – ŝajnas ne ekzisti, krom la verko de Isaj Dratwer. Ĝi suferas pro lia celo helpi „al la disvastiĝo de la lingvo Esperanto kaj definitiva venko de la lingvo internacia“, kaj por tio li kolektis belajn eldirojn akompanatajn de ilustraj nomoj. Li interesiĝis pri kvanto de „kvalitaj“ famuloj, ⁴³¹ sed verŝajne ne pri tio kion la famuloj vere pensis. La dunumera artikolo de Groth (1960a+b) similas en tio. Waringhien (1956) senmitigis en la unua eseoj, „La profetoj kaj Esperanto“, la Bibliajn citaĵojn uzitajn en informado.

Eventuala nova kolekto de citaĵoj pri esperanto kunigu nur tekstojn en kunteksto kaj el unua fonto, kiuj venas de tiaj famuloj, kiuj havas aŭ havis pli multe da rilatoj kun esperanto ol aliaj homoj, aŭ la opiniojn de precipe influhavaj personoj (ekz. Lenin kaj Hitler). Celo de tiu kolekto ne estu poluri kelkajn frazojn el la verkaro por tuj utiligi ilin en informado, sed unuavice la klerigo pri la rilatoj inter esperanto kaj interesaj homoj.

V. Lingvo sen mitoj

1. Lingvo esperanto

a) Lingvistiko kaj esperanto

La moderna lingvoscienco komenciĝis fine de la 18a jarcento, kiam William Jones, brita oficisto en Bengalo, konstatis similecojn inter kelkaj eŭropaj lingvoj unuflanke kaj la sanskrita aliflanke. Tiu komparado de formoj kaj sonoj instigis fine sciencajn sistemigon de la komparo de lingvoj ĝenerale. Ĝi restis la ĉefa intereso-sfero de lingvistoj dum ĉ. unu jarcento. Dum la 19a jarcento lingvoj estis komparataj al „kreskintaj organismoj“, kio fine fariĝis dogmo de la establita lingvistiko. La skolo de la *Junggrammatiker* (novgramatikistoj), estiĝinta en la 1870aj jaroj en Leipzig, serĉis „sonleĝojn“ kiuj klarigas la ŝanĝiĝojn de sonoj ekz. inter la gota lingvo kaj la moderna germana. Esperanto apenaŭ havis ŝancon esti akceptata de tia lingvistiko. Ekzemple la plej konataj novgramatikistoj August Leskien kaj Karl Brugmann aŭtoris en 1908 polemikaĵon kontraŭ esperanto. Tio iom klarigas ke Zamenhof malŝatis tiutempajn lingvistojn. Pierre Janton citis tiun „surprizan konsilon“ de Zamenhof: „Konsiliĝu neniam kun lingvistoj, konsiliĝu nur kun personoj, kiuj havas filologian senton kaj havis multe da praktiko en Esperanto“. Sed, prave aldonis Janton, la varsovia okulisto „ne antaŭvidis la kazon, kiam lingvisto havas 'filologian senton' kaj 'multe da praktiko en Esperanto'“. ⁴³²

En 1916 eldoniĝis la *Cours de linguistique générale* de Ferdinand de Saussure. Tiu ĉi libro estis redaktita laŭ universitataj prelegoj de tiu jam en 1913 mortinta lingvisto en Svisio. La ĝenerala lingvistiko de De Saussure havis aliajn ĉeftemojn: la nuntempon kaj strukturon de lingvoj (sinkrona perspektivo, strukturismo). Tiu verko supervenkis la hegemonion de la tradicia lingvoscienco. Pli kaj pli da novaj studkampoj povis eniri la lingvistikon.

Ekde ĉ. 1960 ekestis skoloj kiuj serĉas universalajn trajtojn en la lingvoj. La lingvisto Joseph Greenberg demandis kio estas kaj kio ne estas ebla en homa lingvo. Ili esploris lingvojn kaj poste konstatis la ekziston de „universalajtoj“, do regulojn kiuj validas por ĉiuj aŭ almenaŭ la plej multaj lingvoj. Ekzemple, teorie povas ekzisti lingvo kiu konsistas nur el konsonantoj, sed ŝajne tia ne ekzistas en la mondo; tial la universalajto ke lingvo havas kaj konsonantojn kaj vokalojn. Por ni esperantistoj estas interese ke esperanto kongruas kun tiuj Greenberg-

universalaĵoj, ⁴³³ kion ni supozeble ŝuldas parte al la fakto ke esperanto estas bazita sur jam ekzistantaj eŭropaj lingvoj.

Laŭ Noam Chomsky kaj lia generativa skolo ekzistas baza povo de ĉiu homo lerni lingvon. Kondiĉe de „proponata“ lingvo en la medio plus la baza kapablo de infano, ĝi kapablas post kelke da tempo mem uzi la aŭdatan lingvon. Tiu baza kapablo enhavas aron da „reguloj“, laŭ kiuj ĉiu homa lingvo estas konstruita. Chomsky nomis sian priskribmanieron „universala gramatiko“. ⁴³⁴

b) Strukturo

„Krome esperanto ne estas, male al la naciaj lingvoj, katenata de firmaj lingvaj kutimoj. La ‘it is grammatically correct, but they don’t say so’ ne ekzistas en esperanto.“

(Richard Schulz ⁴³⁵)

Ekde la 19a jarcento oni havas modelon de kvar bazaj lingvotipoj, fanda/fleksia, aglutina, izola, polisinteza, sed nuntempe oni ne plu provas ligi lingvon al unu tipo, sed provas konstati, al kiu kategorio apartenas iu parto aŭ fenomeno en certa lingvo. Laŭ la plej multaj aŭtoroj la plej taŭga ĝeneraligo por esperanto estas aglutineco kun kelkaj trajtoj izolaj. ⁴³⁶ Tio signifas ke la morfemoj (plej malgrandaj signifo-havaj eroj) estas „algluataj“ unu al la aliaj: *dom-o*, *tir-kest-o*, *sub-akv-iĝ-i*. Informade do eblas diri ke esperanto strukture similas, pro la aglutineco, al lingvoj kiel la turka kaj japana, por emfazi la tutmondecon de tiu strukturo. Tamen danĝeras ke oni tiel donas al la parolanto de hindeŭropa lingvo la maltaŭgan mesaĝon ke esperanto havas strukturon kiu estas similaj al lingvoj neparencaj kaj fremdaj al lia. Restas do siaspeca artaĵo por informadanto, kiel oni plej bone enplektas tiajn aferojn en konkretan inform-tekston.

Pluraj informiloj ŝatas emfazi ke esperanto kun sia „logika“ strukturo taŭgas por komputiloj pli bone ol alia lingvo (t.n. *kibernetika valoro* de esperanto). Fakte modifita versio de esperanto estis uzata en projekto de la nederlanda softvarfirmao BSO, nome kiel interlingvo en tradukprogramaĵo. Sed la projekto estis haltigita pro ĉesigo de la financa subteno. Klaus Schubert konfesis ke la semantikaj problemoj restas, tamen pro sia „laŭplana konstruo“ esperanto havas „en sintakso, morfologio kaj vortkreo gradon de tradukhelpa klareco, pro kiu ĝi kiel interlingvo superas al popolaj lingvoj“. ⁴³⁷ En ĝenerala informado la mencio de komputila utilo povas havi la malavantaĝojn ke ĝi kontribuas al la bildo pri „artefarita, senviva“ esperanto.

En informado oni emfazas la meritojn de la Zamenhofa „afiks-sistemo“. Sed fakte la esperantaj afiksoj ne formas trapensitan sistemon, la afiksaro estas nur – eĉ ne tute fermita – kategorio da morfemoj, kiuj ricevis la nomon afiksoj. Ekzemple *ilo* aŭ *ano* povas esti uzataj kiel normalaj aliaj radikoj. Kelkaj kunmetoj sendependiĝis: *lernejo* ne signifas simple *lern-ejo*, sed fariĝis leksemo kies signifo devas esti propre lernita. La vortaro esperanto-germana de Krause

prave tradukas *lernejo* per la kongrua vorto *Schule* kaj nur duavice per la pli ĝenerala *Lehranstalt* (proks.: instituto kie oni instruas). Cetere ekzemple la anglan vorton *stallion* oni tradukas en BASIC English per la kunmetita esprimo *male horse*, en esperanton simile per *virĉevalo*. Eble la esperanta formo estas konstruita pli elegante (per prefiksoidigo de *vir-*) ol tiu en BASIC English, sed fakte temas pri la sama strategio eviti neologismojn, nome per priskribo.

Gaston Waringhien, meditante pri la neologismoj en literatura lingvaĵo, bedaŭris ke la akademie-oficiala esperanto ne havas proprajn vortojn por ekzemple *joli*, *pretty*, *hübsch*, ĉar kunmetaĵoj kiel *beleta* „ne liveras veran solvon“. Multaj kunmetaĵoj kiel *antaŭenigado*, *supreniranta*, *neanstataŭigebla* estas eble „lertaj kaj kleraj“, sed ilia longeco „prezentas veran krucon ne nur por la versfarantoj, sed eĉ por tiuj, kiuj iom zorgas pri la eleganteco de la stilo.“ ⁴³⁸

Precipe problema elemento de la „afiksa sistemo“ ŝajnas esti la *mal-*vortgrupo. Tiu elemento ja dependas de fundamenta divido de la mondo en bazajn kaj malbazajn aferojn. Kiam mi demandas pri la alteco de persono, mi demandas germane pri la *Größe* (grandeco) kaj ne pri la *Kleinheit* (malgrandeco), krom se mi volas ironie aludi ke mi jam taksas la personon malgranda. En la germana vortoparo *groß* estas do la pli baza, kaj *klein* havas duarangan pozicion. Same, en esperanto la baza vorto estas *granda*, kaj la alia stato estas la malvorto, do *malgranda*. Tio bone funkcias en esperanto ĉe multaj vortoparoj, ekzemple *bela* – *malbela*, *bona* – *malbona*, *ĝusta* – *malĝusta*. Sed en kelkaj kazoj oni ne povas facile konstati kiu vorto el la paro estas la pli baza. Multaj esperantistoj fuŝas pri la paro *fermi* – *malfermi*. Kiam Zamenhof elektis *fermi* kiel bazan vorton, tiam li pensis pri ŝranko kies pordoj estis nete fermitaj. Sed ŝajne oni povas senti ankaŭ ke la alia vorto estas pli baza, kaj tial oni konfuzas pri la du vortoj kaj diras ekzemple: „La dompordo estis malfermita, tial mi ne povis eniri.“ La afikson *mal-* oni mense ligas al io negativa, ĉar la bazaj vortoj ofte estas io pozitiva. Eĉ Zamenhof iam fuŝis tiurilate, kiam en la *Proverbaro Esperanta* li skribis: „Malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto“, ⁴³⁹ kvankam li ja certe celis avarulon.

Se oni ne rekonas la bazan vorton pro la devenlingvo, tiam oni devas diligente lerni la diferencon. Ne estas hazardo ke la mal-vortoj jam antaŭ longe renkontis multe da kritiko, ekzemple de literaturaj skoloj, kiuj serĉis neologismojn por anstataŭi la mal-vortojn. Tiel *maldekstra* fariĝis *liva*, kaj *malriĉa* ricevis konkurencon de *povra*. Pli da rezisto trovis la skolo ĉirkaŭ Hauptenthal kaj Iltis, kiu estis pli radikala kaj volis forigi anstataŭigi *malpli* per *men*. Ankaŭ la mal-

vorta demandaro do montras la neperfektecon de la afiksaro.

Kiam oni volas montri tiun „sistemon“ en informado, estas iom nekonvinke fari tion, kiel la aŭstria Sappl, per vortoj kiuj uziĝas nek en esperanto nek en la koncerna nacia lingvo: al la bona kaj tradicia ekzemplo *malsanulejo* / „Krankenhaus“ li aldonis *sanejo* / „Heilstätte“.⁴⁴⁰ En landoj kun forta politika korekteco povas esti malrekomendinde uzi ekzemplon kun *-ino*, ĉar tio tiras la tutan aferon en la demandaron pri seksisma lingvaĵo kaj feminismo.

c) Vortaro

„Estas ĝuste la vortoj, kiuj transmigras de nacio al nacio. Al la gramatikaj formoj tio malfacilas, ĉar ili, de pli fajna intelekta naturo, pli multe havas sian loĝejon en la racio.“

(Wilhelm von Humboldt)

Elektante la vortmaterialon por sia planlingva projekto, Zamenhof konsideris precipe elementojn kiuj jam estis disvastigitaj en pluraj eŭropaj lingvoj. Temas precipe pri latin-grek-devenaj vortoj. Krome konstateblas granda franca influo, kaj oni povas legitime klasifi esperanton kiel ĉefe romanidan lingvon. La due plej grava influo venas el la ĝermanaj lingvoj, precipe el la germana kaj la angla, ĉu por eviti samsignifajn vortojn, ĉu por pli internaciigi la lingvon. La nuna forta pozicio de la angla rezultigas kreskantan influon ankaŭ sur esperanto, ĉar anglaj vortoj estas konataj ankaŭ de multaj esperantistoj kaj ofte sin ofertas kiel facile rekoneblaj novaj esperanto-vortoj; ekz. la vorto *teamo* jam forŝovis la pli malnovan, el franca epoko originantan *taĉmento*.

Bernard Golden atentigis ke la ĉeesto de ĝermanaj vortoj en esperanto estas sufiĉe eksterordinara. Praesperanto I el 1878 ne havis ĝermanidaĵojn, Praesperanto II el 1881/82 nur malmultajn kaj la reformpropono el 1894 preskaŭ neniujn. Nur en la „klasika“, nia esperanto de 1887, Zamenhof utiligis relative ofte ĝermanajn elementojn, por eviti homonimojn. Tion, Golden montris, parte okazis pro la influa ekzemplo de volapuko. ⁴⁴¹

Pro la kontakto de Zamenhof kun slavaj lingvoj ankaŭ tiuj iomete kontribuis al la vortaro de la nova projekto. La influo de ĉiuj aliaj lingvoj estas marĝena. Fakte neeŭropaj vortoj envenis esperanton nur pere de eŭropaj: la vorto *admiralo* troveblas en multaj eŭropaj lingvoj kaj signifas „oficiro de mar-armeo en la rango de generalo“. Tiuj lingvoj havas ĝin el la franca. En la malnova franca ĝi signifis ĝenerale „ĉefo, estro“. Ĝi originas en la araba *amir* (militista ordonanto). Do kvankam nia *admiralo* estas baze arabdevena, por esperanto ĝi estas fakte francdevena vorto. Ankaŭ nia vorto *bajoneto* dankas sian ekziston ne al la eŭska, sed same al la franca. ⁴⁴²

Kiam temas pri la rekonebleco de vortoj, oni devas distingi ankaŭ inter nur teorie rekoneblaj kaj fakte rekonataj vortoj. „Afiŝo“ estas teorie rekonebla en la germana pro la francdevena fremdvorto *Affiche*, sed tiun neniu germano

nuntempe uzas, sed *Plakat*.⁴⁴³ Trompi povas ankaŭ la t.n. internaciaj vortoj. La malfrulatina vorto *brutalis* („besteca, neracia“) eniris kaj la nederlandan kaj la germanan. Dum la germana *brutal* kongruas al la esperanta „perfortema“, la nederlanda *brutaal* signifas precipe „impertinenta“. La esperanta *konto* estas identa kun la germana *Konto*, sed la nederlanda *kont* signifas „pugo“. La esperanto-vorto *koto* ja venas el la germana, sed la signifo de la germana *Kot* intertempe ŝanĝiĝis de ĝenerala „malpuraĵo“ al „fekaĵo“. K.t.p.

Cherpillod, kritikante tro simplan liston sur informada panelo pri la deveno de esperanto-vortoj, montris ke la plej multaj esperanto-vortoj ne estas aŭ el ĝermanaj lingvoj aŭ el slavaj aŭ el latinidaj. La plej multaj havas kaj latinidan kaj ĝermanan devenon, la due plej multaj estas kaj latinidaj kaj ĝermanaj kaj slavaj. Li ŝerce proponas propran liston por propagando: laŭ ĝi 93 procentoj de la esperanta leksiko estas „tuj komprenebla de Latinido“, 83 procentoj de „Ĝermano“ kaj 43 procentoj de „Slavo“. ⁴⁴⁴ Sed ĉu ekzistas latinidoj, slavoj kaj ĝermanoj? „Ĝermano“ estas ĉe Cherpillod „Germano, Anglo, Svedo k.t.p.“ Kiu svedo ne lerninte la germanan komprenas la esperanto-vorton *ŝranko*? Eĉ germano devas lerni ĉu ĝi devenas de la germanaj *Schrank* aŭ *Schranke* – „ŝranko“ resp. „barilo“.

La relativa malgrandeco de la esperanto-vortaro helpas al la facileco de la planlingvo, sed ĝi estas ankaŭ malavantaĝo. Mankas foje nuancoj, propraj esperanto-vortoj, fakterminoj. Oni jes povas mem konstrui vorton aŭ enkonduki neologismon, sed se ĝi ne estas uzata ankaŭ de aliaj parolantoj, estiĝas kaoso. Tio kondukas al la samaj problemoj en naciaj lingvoj, pri populareco kaj normeco de vortoj. Dum multaj esperantistoj kapablas facile legi esperanto-gazetojn, ili tamen havas problemojn kun beletro, ĉu originala aŭ tradukita. La beletra aŭtoro serĉas siajn vortojn ne nur en la renkontiĝa lingvo-uzo sed ankaŭ en vortaroj kaj la verkoj de aliaj beletristoj, kaj ne ĉiu aldonas la necesan vortklarigan liston. Kiu preparas ekz. *stand up comedy* por renkontiĝo, skrupule ĉerpu el vortaro, ĉar vorto nekonata al oni mem verŝajne estas same nekonata al sufiĉe granda parto de la aŭskultantaro. Hamburga Esperanto-Societo certe ne troigis kiam en la programlibreto de teatro-vespero ĝi listigis malfacilajn aŭ malmulte konatajn vortojn. ⁴⁴⁵

La demando „Kiel oni diras en esperanto?“ ja oftas en renkontiĝoj. Kutime ni esperantistoj trovas manieron komprenigi nin, tamen la vortmanko restas problemo kaj kaŭzas ke multaj preferas la gepatran lingvon por disputi pri

malfacilaj temoj. Al tiu demandaro apartenas ankaŭ la konflikto inter fundamentistoj kaj neologistoj, kvankam ties frontoj nuntempe estas relative trankvilaj.

2. Lingvaj mitoj

„Esperanto estas pli preciza ol unu el la lingvoj plej precizaj, la germana.“

(Walter Francini ⁴⁴⁶)

Esperanto-propagandistoj estas ofte tentataj troigi lingvajn kvalitojn de esperanto. Kiu postulas ke la tuta mondo adoptu esperanton, tiu ja devas trovi argumentojn kial ĝuste esperanto estu tiu preferata lingvo. La plej multaj esperantistoj ne kuraĝas nomi esperanton *perfekta lingvo*, sed kelkaj tamen postulas *kvazaŭ-perfekt ec on* por esperanto, ekzemple Marjorie Boulton: „Senmanka nacia lingvo ne ekzistas: laŭ la vidpunkto de logiko aŭ reguleco esperanto estas la lingvo plej proksima al perfekteco.“ ⁴⁴⁷ Jam Zamenhof revis pri ĝia perfekteco kiu konsistas el matematika precizeco, fleksebleco kaj senlima riĉeco.“ ⁴⁴⁸ Same evidenta truko estas listigi la „necesaj[n] postuloj[n] al internacia lingvo“ kaj poste prezenti esperanton tiel, ke ĝi kompreneble kongruas kun ĉiuj tiuj „objektivaj“ postuloj. ⁴⁴⁹

Dum komunikado, precipe internacia, kompreneble okazas miskomprenoj kaj malfacilaĵoj, kio validas ankaŭ por esperanto. Sed oni ŝatas en informiloj prezenti esperanton kiel „miraklan lingvon“, kiu ne konas tiajn problemojn. Eĉ en internaj rondoj ni esperantistoj vaste parolas pri bona komunikado kun esperanto kaj malbona komunikado sen esperanto, sed honte silentas pri bona komunikado sen esperanto kaj malbona komunikado kun esperanto.

Laŭ certaj propagandiloj la lingvo foje eĉ liveras aŭtomate aliajn avantaĝojn: „Esperanto altigas la scipovojn de lernanto pri la angla [legu: propra] lingvo“, „Esperanto malfermas novajn mondojn de penso kaj sperto, kaj plilarĝigas la menson“. ⁴⁵⁰ Tio eble individue okazas, sed ne nur esperanto, tamen ankaŭ aliaj lingvoj kaj hobiaj povas kaŭzi tion.

a) La bildo pri „artefarita lingvo“

„Jam tiam [en 1936] fariĝis evidente al mi, ke arte konstruita lingvo – kiom ajn arte aŭ racie ĝi estas konstruita, kiaj noblaj pensoj eble kaŭzis ĝian ekfariĝon – tamen devas resti senviva papereca formo. Veraj lingvoj kreskas nature, kaj sovaĝe kaj laŭleĝe.“

(la rusa verkisto Lev Kopelev, esperanto-lerninto ⁴⁵¹)

En la ĝenerala publiko ekzistas la malnova kaj forte enradikiĝinta kredo ke esperanto estas „artefarita“ resp. „nenatura“. Pro tio kulpas ankaŭ esperantistoj, kaj ne nur pro la kelkfoja uzado de la esprimo „artefarita lingvo“ en informado. Tiu kredo havas multe pli profundan bazon, nome niajn mitojn pri la reguleco kaj logikeco de nia lingvo.

Konstrui homan lingvon tute regulecan ne eblas. En fonologio kaj morfologio oni povas aranĝi la elementojn almenaŭ altgrade regule, sed ekz. en semantiko esperanto suferas la samajn problemojn kiel naciaj lingvoj. Blanke resumis post sia studo pri la vortfarado en la germana kaj en esperanto: „Kvankam la vortfarado de Esperanto ebligas relative regulecajn vortkreojn, estas tamen malĝuste aserti ke la planlingvo estas tute reguleca kaj ne konas esceptojn.“ ⁴⁵²

Laŭ Thomas Pusch la esperanto-gramatiko estas „sen esceptoj“, ⁴⁵³ laŭ nederlanda broŝuro esperanto „kondukas kiel ĉiu alia 'vivanta' lingvo. Sed ja je la kondiĉo, ke la evoluo okazu laŭ firmaj reguloj, kaj ke esceptoj de tiuj reguloj estas malpermesataj.“ ⁴⁵⁴ Fakte la „esceptoj“ aŭ „neesceptoj“ de la „reguloj“ foje montriĝas truka ludo. Oni povas diri ke landonomoj en esperanto estas formitaj laŭ unu ampleksa regulo kiu enhavas tri diversajn manierojn. Aŭ oni konfesas ke la origina maniero formi landonomojn estas derivi landon de gento, ekz. *Italujo* / *Italio* de *italo*, kaj ke ekzistas krome „esceptoj“ de tiu regulo, ĉe kiuj oni derivas inverse la loĝantojn de la landonomo, ekz. *nederlandano* de *Nederlando*. La „esceptoj“ eĉ pli multas ol la nomoj laŭ la origina, „regula“, genta maniero.

Multaj homoj kredas ke en planlingvo unu vorto respondu al nur unu signifo, t.e. *monosemio* aŭ unusignifeco. Sed tia lingvo bezonus por la nenombreblaj signifoj en la mondo same tiom da vortoj, kaj ĝi tiel fariĝus malfacile lernebla kaj malkomforta en la apliko – se ne malebla. ⁴⁵⁵ *Polisemio*, plursignifeco, necesas en homa lingvo. Théophile Cart, prezidanto de la Akademio de

Esperanto, jam en 1910 kontraŭis al la frapfrazo „unu vorto, unu senco“, ĉar se oni rifuzas ĉian samnomecon, tiam oni bezonas tro multajn radikvortojn. „Kiel konsilon ni do konservu tiun regulon, sed ni ne faru ĝin idolo!“ ⁴⁵⁶

Duliĉenko, sin apogante je Ferdinand de Saussure, skribis ke dum la projekta fazo la strikta principo de „unu elemento – unu signifo“ ankoraŭ eblas. Sed kiam la projekto estas „ensociigita“, do aplikata, tiam ambigueco, sinonimoj kaj homonimoj ekaperas kiel en etnaj lingvoj. ⁴⁵⁷ Polisemia estas ekz. *-ujo* kiu havis origine la signifojn *arbo*, *lando* kaj *enhavilo*. Sed parte okazis monosemiigo: nuntempe *-io* transprenas la signifon *lando*, kaj la signifo *arbo* rekte tiel esprimatas. Restis *ujo* por la tria signifo. Homonimeco signifas ke malsamaj vortoj hazarde havas la saman „aspekton“, en esperanto ekz. *liro*: muzikilo, itala monunuo, stelaro, kaj *park-*, kun *parko*: granda publika ĝardeno, kaj *parki*: loki sian aŭtomobilon.

Logikeco estas la alia termino en informado, kiu unuflanke ne ĝustas por esperanto, kaj kiu aliflanke ne-naturigas ĝin en la menso de la interesatoj. Jam Zamenhof devis konfesi ke „lingvo *absolute* logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza“. ⁴⁵⁸ Simile Blanke neis logikecon, nomante la vortkreaĵojn, morfologiajn, fonemajn kaj sintaksajn sistemojn de esperanto regulaj, sed ne „plene logikaj“. Tio estas favora al la elasteco de la lingvo. Krome li atentigis ke logikeco rilatas al pensado, dum homa lingvo rilatas ankaŭ al sentado. ⁴⁵⁹ Ekzemploj de logikaj kodoj estas la t.n. komputilaj lingvoj, fakte simbolaj ordon-kodoj. Tiuj kodoj estas „mortaj“: ili ne ŝanĝiĝas, ne havas kulturon aŭ vortludojn, ĉar mankas plursencaj vortoj. Jam en 1860 A. von Grimm sciis ke *logika* signifas ke ĉiu vorto devas havi nur unusencan rilaton al la priskribata afero. ⁴⁶⁰ Zamenhof kaj parte Blanke provis iel savi la logikecon por esperanto, rifuzante nur la „absolutan“ logikecon, sed fakte ili skribis ke tiu idealo ne taŭgas por lingvo uzata de homoj.

Ekzemplo ke logiko ne ĉiam helpas, videblas en kazo priskribita de Bertil Wennergren. La neaj demandoj povas respondi ĝin laŭ du malsamaj sistemoj:

<i>multaj okcidentaj lingvoj</i>	<i>multaj orientaj lingvoj</i>
Ĉu vi ne volas kafon?	Ĉu vi ne volas kafon?
– Jes! (= Mi volas kafon.)	– Jes! (= Mi ne volas kafon.)
– Ne! (= Mi ne volas kafon.)	– Ne! (= Mi ja volas kafon.)

„Ambaŭ sistemoj estas logikaj, sed en malsamaj manieroj“, juĝas la svedo. La logikeco ĉi tie ne helpas, kiam oni volas elekti unu sistemon por internacia lingvo. La okcidenta maniero estas pli multe disvastigita en esperanto kaj ankaŭ pli ofte uzita de Zamenhof, tamen pro la konfuzeblo oni singarde respondu al nea demando, prefere per kompleta klara frazo. ⁴⁶¹

Kaj kiam oni uzas esprimon en informado, necesas konsideri ĝiajn kromsignifojn (konotaciojn). Germana knabino iam fanfaronis ke esperanto estas logika kiel Mr. Spock. ⁴⁶² Tio ilustras kiel la vorto „logika“ povas nutri du malsamajn ideojn en la kapo de interesato: la pint-orela eksterterano el la televidserio *Star Trek* unuflanke estas ja modelo de scienca efikeco kaj sobra analizo, sed aliflanke la logikeco faras lin ne-homa, emoci-malriĉa kaj apartigas lin de liaj homaj kolegoj. Ĉar esperanto jam suferas pro koncerna antaŭjuĝo, malrekomendindas plifortigi la antaŭjuĝon per tia termino.

Per tiaj mitoj la esperantistoj havigas grandan ŝancon al homoj kiuj volas montri la artefaritecon-senkulturecon de esperanto, ekz. la generativgramatikistoj Frijn kaj De Haan. En iom popularscienca libro pri lingvo-akiro de infanoj ili distingas „naturajn“ lingvojn, kiujn gepatroj transdonas al infanoj, de artefaritaj kodoj. Esperanto estas laŭ ili tia artefarita kodo, kiun infanoj ne povas denaske lerni, kvankam la esperantistoj celas vane anstataŭi per ĝi naturajn lingvojn. ⁴⁶³ La du nederlandaj aŭtoroj bazas tiujn asertojn sur citaĵoj el malgranda propaganda broŝuro, laŭ kiuj esperanto estas

„la *ideala* lingvo por ĉiu, ĉar esperanto estas: facile lernebla, ĉar la lingvo estas *tute regula*; do ne havas esceptojn; [...] genia sistemo de afiksoj kun *fiksaj signifoj*[...]; esperanto estas *perfekta kaj preciza* en siaj esprimebloj.“ ⁴⁶⁴

Sed ankaŭ en la esperanto-komunumo mem, la postulo pri logikeco kreskigis apartajn florojn, kiel ekz. la *Analiza Skolo* de Richard Schulz. Verŝajne li mem varbiĝis per tiu mito kaj devis konstati ke la reala lingvo-uzo ne konformas al tio kion li komprenis sub logikeco. Tial li kulpigis la esperantistojn pro malĝusta lingvo-uzo, kiun li volis rektigi per „logikaj“ konkludoj el la Fundamenta Gramatiko de Esperanto. ⁴⁶⁵

La fono de la mito pri reguleco estas certa miskompreno. Esperanto malhavas certajn neregulaĵojn kiujn posedas multaj naciaj lingvoj, kaj ja tute pravas mencii

tion. Sed kelkaj propagandistoj troigas ke esperanto havas tute neniujn malregulaĵojn. Por eviti konfuzojn, plej bonas konkrete mencii en informado ekzemplojn de tiaj nacilingvaj lernmalfaciligoj, kiujn esperanto ne havas. Ekzemple la lernantoj de multaj lingvoj devas lerni por ĉiu o-vorto la ĝustan genron. Ekzistas multspecaj lerntrukoj: germana o-vorto finiĝanta je *chen* en singularo estas neŭtra, ĉar tiu finaĵo kreas la (neŭtran) diminutivon. Malgraŭ tio ankaŭ la fremdparolantoj kun longa sperto fuŝadas pri la genroj, eĉ kiam la fremda lingvo estas sufiĉe parenca. La arbitrecon de la genroj en la naciaj lingvoj montras jena ekzemplo:

lingvo	samsignifa vorto	genro
esperanto	la vizito	(sen)
germana	der Besuch	vira
franca	la visite	ina
nederlanda	het bezoek	neŭtra

La plej disvastigita fremda lingvo estas tamen la angla, kiu krom kelkaj restoj ne plu havas genro-problemojn, tial kiam oni havas tempon nur por unu ekzemplo, rekomendeblas mencii ke esperanto ne konas malregulaĵojn en la konjugacio de la verboj. Tiajn ja havas la angla, kie oni en la estanteco diras *write* (skribi), en la simpla estinteco *wrote* kaj kiel estinteco-participo *written*. Ankaŭ la esperanta nombro-sistemo estas modele simpla, dum multaj ekz. eŭropaj lingvoj konservas historiajn devojiĝojn de la decimala sistemo.

b) Tradukado kaj interpretado

„Ĉu ne estas strange, ke laŭvorta traduko preskaŭ ĉiam estas malbona? Kaj tamen oni povas ĉion bone traduki. Tio montras, kiom grandas la aserto ke oni tute komprenas lingvon; tio signifas tute kompreni la popolon, kiu parolas ĝin.“

(Georg Christoph Lichtenberg)

Laŭ multaj propagandistoj esperanto estas la ideala lingvo por tradukoj, kaj sekve esperanto-tradukoj estas multe pli bonaj ol aliaj: „Esperanto estas senrivala rilate al tradukoj. Ĝi estas ŝlosilo al multo el la plej bona literaturo de la mondo“, ⁴⁶⁶ ekzemple anglalingva informilo vortumis. William Auld nomis esperanton la „plej taŭga traduklingvo“ kaj eĉ „perfekta ilo por komparaj literaturaj studoj“. ⁴⁶⁷

Tiu ĉi dogmo subpremis ŝajne ankaŭ la germanon Wilhelm Theodor Oeste, kiu laŭdegis la Zamenhof-an tradukon de *Hamlet* kaj asertis ke „flanke de la angla, la esperanta traduko estas rigardata kiel la entute plej bona“. Sed de kiu? Pri la eraroj ĝuste en *Hamleto* atentigas la komentoj kaj korektoj faritaj de D. B. Gregor. Laŭ li Zamenhof tradukis Hamleton por rapide pliriĉigi esperanton per klasika literaturo. Sed Zamenhof nekomplete regis la anglan, li devis helpi al si per la germanlingva traduko de Schlegel. Gregor pretas ne postuli vortludojn, sed foje laŭ li mankas nuancoj, ekzemple kiam Ofelio originale *dronis* sed traduke *mortis*. ⁴⁶⁸

Simile troige Oeste juĝis pri la poemo „En la sonĝo“ (*Mir träumte*) de Heinrich Heine: „Majstra traduko, kiel ĝin povis formi nur la genio de Zamenhof, kies formo superas [!] tiun de la originalo“. ⁴⁶⁹ Sed ĝuste tiu citita traduko havas gravajn malfortojn, ekzemple pro la nekutima vortordo – por kongruigi la tekston al la metriko – en preskaŭ ĉiu linio. Esperanto havas rigarde al liriko senteblian mankon, nome la mankon de unusilabaj vortoj. Kiam oni uzas verbon aŭ adjektivon, oni aŭtomate pro la finaĵo jam havas vorton dusilaban, kaj ĉe substantivoj la helpa o-ellaso jam ne eblas kiam oni bezonas akuzativon aŭ multenombrojn. Certe, tiajn problemojn oni havas ankaŭ tradukante ekzemple nederlandajn sonetojn al la germana, ĉar la germana havas tendence pli da silaboj; sed ne ekzistas serioza kialo nomi esperanton sur la traduka tereno „senrivala“.

Ĝenerale, la kvalito de de traduko dependas ĉefe de la tradukisto, sed la plej multaj esperanto-tradukoj estas farataj nur de neprofesiaj tradukemuloj. Aliflanke granda vortaro kun multaj diversaj nuancoj tre helpas la laboron de tradukisto, sed tion oni trovas pli verŝajne ĉe naciaj lingvoj ol ĉe esperanto. Pri nia lingvo oni ja eĉ fanfaronas ke ĝia vortaro malgrandas, favore al pli rapida lernebleco. (Tamen ja povas ekzisti esperanto-traduko, kiu estas pli bona ol certa traduko al alia lingvo.)

Cetere kelkaj propagandistoj ŝajne malsimpatias al interpretistoj kaj tradukistoj:

„Pro la profitcela pensado de la eldonistoj la aĉeteblaj nacilingvaj tradukaĵoj estas tre malmultaj. Mankas tutmonde sufiĉe da bonaj tradukistoj [...]. Do ni legas en traduko nur tion kio estas bone vendebla! Hontinde, kulturhontinde! [...] La interpretistoj estas la veraj regantoj de la mondo! Kiom mirinde, mi diras tre mallaŭte, ke la mafio ankoraŭ ne subaĉetis la interpretistojn. Aŭ ĉu ĝi eble jam faris tion?“ (Karl-Heinz Schaeffer ⁴⁷⁰)

S. N. Podkaminer polemikis: „Multaj malamikoj de Esperanto troviĝas en la medio de homoj, kiuj profitas de la multlingveco: instruistoj de fremdaj lingvoj, tradukistoj kaj interpretistoj. Ili havas apogon de relative granda kvanto da lingvistoj [...]“. ⁴⁷¹ Tute simile ni trovas ĉe William Auld antipation rilate al interpretistoj: ili „staras en kunveno kiel eĥo en la centro de la universo“. Sekve de tio ili „tendencas trotaksi sin“, kaj „netolereble orgojlas“. „Laŭdire iuj estas paranojaj.“ Dahlenburg prave kritikis tian bildon: „Ĉu estas serioza argumentadmaniero, ofendi tutan profesian grupon por elvoki aplaŭdon?“ ⁴⁷² Kaj certe des malpli serioza tiu argumentad-maniero estas pro la fakto ke pluraj konataj esperantistoj estas profesiaj tradukistoj aŭ interpretistoj. Absolute malfavora al esperanto la medio de fremdlingvemuloj ŝajne ne estas. Sed tradukistoj kiel ankaŭ verkistoj kaj lingvistoj scias superaveraĝe multe pri lingvoj, tial ili ne tiom facile akceptas esperanto-mitojn.

Alian specon de naiveco pri tradukado oni trovas en artikolo de Rüdiger Eichholz, kiu alvokis junajn esperantistojn: „Trejnadu en Kanado!“ En la lia domo en Kanado ili aŭtodidakte lernu tradukadon kaj interpretadon el siaj gepatraj lingvoj al esperanto. Poste tiu teamo de „interpretistoj“ ofertu al organizantoj de internaciaj kongresoj ke la teamo („komence senkoste“) transprenos la interpretadon: ĉiu kongresano povos paroli kaj aŭskulti en la gepatra lingvo. Je la venonta kongreso de la sama organizo ĉiu partoprenanto rajtos paroli en sia gepatra lingvo, kaj la teamo interpretos simultane al esperanto. Eichholz opiniis ke duona jaro sufiĉos al la kongresanoj por antaŭe

lerni esperanton. ⁴⁷³

Organizoj, kiuj laboras kaj publikigas en diversaj lingvoj, devas elspezi konsiderindajn sumojn por tradukaj kaj interpretaj servoj. Atentigi pri tiu fakto estas bone, ne forgesante ke ankaŭ esperanto estas fremda lingvo kiun oni devas lerni. Pravas ke internaciaj organizoj povas ŝpari multe da mono uzante nur unu lingvon. Sed ankaŭ post la „fina venko“ de esperanto en la organiza aparato de ekz. Eŭropa Unio oni ankoraŭ devos multe traduki por eksteraj nekomprentantoj, ĉar esperanto ja ne forigu la naciajn lingvojn, ĉar estas tro optimisme esperi pri dulingveco de ĉiuj EU-civitanoj, kaj ĉar almenaŭ parlamentanoj havu la rajton paroli en la gepatra lingvo.

c) Facileco

„Ĉiu plenkreskulo, ankaŭ lingve ne edukita kaj ne benita de bona vortmemoro, povas tial lerni regi esperanton sen tro granda peno.“

(Wilhem Theodor Oeste, 1952⁴⁷⁴)

Planlingvaj aŭtoroj emas aljuĝi al siaj projektoj tute senskrupule la plej grandan facilecon el ĉiuj lingvoj de la mondo. Pri Solresol de Jean Sudre (1866) Drezen komentis: „Oni devis lerni ĝin de la komenco parkere. Tute senbaza estis la aserto, ke ellerni Solresol oni povus sen aparta penado dum ne pli ol tri monatoj.“⁴⁷⁵ Leopold Einstein laŭdaĉis la facilecon de esperanto tute same kiel malmultajn jarojn antaŭe tiun de volapuko.⁴⁷⁶ Wald kreis en 1906 laŭ propra opinio „la plej facilan kaj mallongan lingvon por la internacia trafiko“, la projekto de Jaque el 1944 estas laŭ la aŭtoro „la plej facile lernebla“.⁴⁷⁷

Simile, jam en la komenco de nia historio la troigoj pri la facileco de esperanto grandegis. En germanlingva Trompeter-informilo de 1891 ni trovas jenan enkondukon, verkitan supozeble de Zamenhof:

La lingvo esperanto estas eksterordinare facila, ĉar ĝia gramatiko estas tre simpla kaj mallonga kaj la vortaro estas tiel konstruita, ke grandegan multon da vortoj ĉiu povas laŭ certaj reguloj krei mem [...]. *La tutan gramatikon de la lingvo esperanto oni povas ellerni en duono da horo*, kaj la tutan lingvon (t.e. kune kun la vortaro) – en kelkaj tagoj. Sed homo, kiu komprenas 2-3 el la plej gravaj eŭropaj lingvoj, povas kompreni la lingvon esperanto eĉ rekte preskaŭ tute sen lernado [...].“⁴⁷⁸

Jam antaŭe, en *La Esperantisto* 1889, oni trovis ke „ĉiu klera homo, post tralegado de la gramatiko kio apenaŭ kostas 10 minutojn da tempo“, povas legi esperanton „sen ia alia sinpreparo“.⁴⁷⁹ Kaj en 1900 Zamenhof propagandis ke la tuta gramatiko konsistas el nur dek ses reguloj lerneblaj en duonhoro, kaj ke oni post tio devas lerni nur la vortojn. Laŭ li esperanto estas kvindek fojojn (!) pli facila ol ĉiu natura lingvo, kaj troveblas inter la esperantistoj multaj neinstruitaj, kiuj eĉ en la gepatra lingvo skribas malbone, sed en esperanto „tute senerare“. Ili „ellernis“ esperanton „en la daŭro de iaj kelke da semajnoj“.⁴⁸⁰ Malfacilaĵojn ĉe la naciaj lingvoj Zamenhof vidis ŝajne nur en deklinacio, konjugacio kaj ortografio, preteratentante aliajn demandojn, ekzemple rilate al semantiko kaj

sintakso. Videblas kiel multaj lingvaj mitoj pri esperanto estis kreitaj jam de la varsovia okulisto mem.

La slavisto August Leskien reagis en 1907 ke li jam lernis plurajn lingvojn, ankaŭ slavajn, do onidire malfacilajn. Li provis lerni ankaŭ esperanton, sed li ne povis paroli ĝin post „kelkaj monatoj aŭ eĉ semajnoj“. Oni devus ekscii de la esperanto-parolantoj, kiom da tempo ili vere bezonis ĝis regado de esperanto. „Ke oni kun la helpo de esperanto-lernlibro post mallonga tempo povas verki leteron en esperanto [...], tio pruvas nenion.“ La kompilinto Stojan post la citaĵo pravigis lin ke esperanto ne estas „tiom facila, kiom ĝin reklamis tiuepokaj propagandiloj: lernebla en kelkaj semajnoj“, kaj ke depost 1918 esperantistoj parolas „pli modeste, do – pli ĝuste“ pri tri aŭ kvar monatoj. ⁴⁸¹

Sed Baudouin de Courtenay moketis ke la ĉefa lernobstaklo de lia kolego Leskien estus ties malsimpatio al esperanto (pro t.n. artefariteco). La tempo kiun li mem, Baudouin de Courtenay, bezonis, estis certe „du semajnoj, memkompreneble semajnoj plenaj de intensa laboro, ne kun okhora, sed almenaŭ dekduhora labortago. Nun mi komprenas, escepte de malmultaj tie kaj jene dislokitaj vortoj, ĉiun esperantan tekston sen malfacileco.“ ⁴⁸² Leopold Einstein informis en 1888, ke li bezonis ok tagojn por „tralegi kaj kompreni“ la unuajn du Zamenhof-libretojn, kaj sekve povis verki dupaĝan leteron al la iniciatinto. ⁴⁸³ Bonvenigindas ke ili priskribis kion ili faris kaj kion ili poste kapablis. Simple aserti ke la lingvo estas lernebla „en du semajnoj“, kion oni povas vidi ankaŭ en la interreto, estas terura erarigo jam antaŭprogramanta seniluziiĝon. Por ĉiu ago venas tempo de pago.

Oni nepre konsideru ke lernsukcesodependas de multaj faktoroj: la antaŭkonoj de lernanto (pri aliaj fremdlingvoj), la ĝenerala lernkapablo, la denaska lingvo, la medio, la lernemo kaj tiel plu. Al interesatoj oni modestu rilate al la (ĉiam nur *relativa*) facileco de esperanto. Evitindaj estas trompaj kaj nekredindaj asertoj kiel „esperanto estas lernebla sen peno kaj ebligas senprobleman komunikadon“. Lingvolernado ja ĝenerale ne estas „senpena“, kaj komunikado inter homoj el diversaj socioj povas ĉiam enhavi certajn problemojn.

Pri la sukcesoj de niaj lernantoj ekzistas kelkaj studoj. Ĉar seriozaj studoj postulas multe da tempo kaj mono, esperanto-studoj ofte ne estas tre altnivelaj. Tamen jen kelkajn por doni impreson, sen garantio de fidindeco:

International Auxiliary Language Association (vd. [tie](#)) raportis en 1933 pri

rezultoj el sep jaroj en usonaj lernejoj. Pri la kompren-kapablo de parolata kaj legata lingvo ĉe ĉ. 18-jaraj lernantoj oni sciigas: 20 lernhoroj por esperanto estis pli efikaj ol 100 lernhoroj por la franca, germana aŭ itala. En la kazo de ĉ. 13-jaraj lernantoj, 40 lernhoroj por esperanto egalas al 200 lernhoroj por la franca aŭ germana. „Kvin horoj, dum kiuj oni okupiĝas pri la germana, rezultigas preskaŭ nenion, sed kvin horoj pri esperanto donas bonan komprenon de verbformoj aŭ de pronomoj, aŭ superrigardan ideon de la tuta gramatiko...“ Ĝenerale, laŭ tiuj studoj, scipovo de esperanto estas atingebla kvinoble ĝis dekkvinoble pli rapide ol de nacia lingvo. Laŭ la instituto J. J. Rousseau (1948), lernantoj scipovis post 15-25 lecionoj esperanton tiel bone ke ili konis la ĉiutage plej uzatajn vortojn kaj kapablis apliki tiujn en korespondado. ⁴⁸⁴

En brita eksperimento oni fiksas tri grupojn de lernantoj: A (bonaj), B (mezaj), C (malbonaj). Unu jaro da E-instruado en grupo B respondis al tri jaroj de la franca en grupo A. Angla lernanto lernas dum ses monatoj tiom da esperanto kiom da franca lingvo dum kvar jaroj. ⁴⁸⁵

La esperanta lingvisto Falkenhahn provis kompari esperanton kaj la germanan per absoluta metodo. Li nomis ĉiun unuopan lernendan informon je la deklinacio kaj konjugacio „lernunuo“. La deklinacio de tri elektitaj substantivoj kaj adjektivoj bezonas en esperanto 12 lernunuojn, la respektivaj germanaj vortoj bezonas 89. La tuta deklinacio de la germanaj substantivoj bezonas laŭ Falkenhahn ĉ. 200 lernunuojn, restas 12 ĉe esperanto. ⁴⁸⁶

Szerdahelyi entreprenis studon pri la sukceskoefficiento de esperanto. Hungaraj lernantoj atingis je la rusa 30 procentojn el la lerncelo, je la germana 40 procentojn, je la angla 60 procentojn, je esperanto 130 procentojn. ⁴⁸⁷

Setälä kunmetis tabelon pri la „kvoto de nekompreno“. Se lernanto lernis vortprovizon da 550 vortoj en esperanto, tiam li komprenas la vortojn en ordinara fremda teksto krom 16 procentojn. Lernanto de la angla devas scipovi 1400 vortojn por same malalta kvoto de nekompreno. Por kompreni 99 procentojn de teksto, oni bezonas en esperanto 2.000 vortojn, en la angla 7.000; por 99,75 procentojn: en esperanto 2.800 vortojn, en la angla 10.000. ⁴⁸⁸ Tio diras al ni simple, ke la angla kaj havas kaj uzas pli da vortoj ol esperanto. Ĉu la esperantaj tekstoj pro tio eble estas malpli nuancoriĉaj, pri tio la studo silentas.

Rezonante pri la tempo en kiu oni povas lerni esperanton, ni ĉiam konsideru ke

la nuntempaj parolantoj ne estas reprezentivaj por ĉiuj kiuj iam eklernis. Multaj el ni konatiĝis jam antaŭe en la lernejo kun unu aŭ pli da fremdaj lingvoj kaj tial lernis supozeble pli rapide kaj facile ol homoj sen aŭ kun nur malmultaj konoj pri aliaj lingvoj. Ni estas tiuj kiuj sukcesis progresi sur la pena vojo de komencanteco al parolanteco. El niaj spertoj ni ne rajtas fari konkludojn por ekzemple lerneĵano, al kiu oni instruas esperanton devige. „La lernemo ĝuste en la lernado de lingvoj estas decida, kaj pro tio ĉiuj lerneĵaj eksperimentoj kun Esperanto ne povas rezultigi realajn atestojn, ĉar ili ne okazas sub realaj kondiĉoj“, Frank Stocker emfazis.⁴⁸⁹ Ulrich Matthias konfesis ke nia reklamo pri *libera parolado post mallonga tempo* validas nur por eta parto de la popolo. Estus pli honeste se ekzemple Germana Esperanto-Junularo menciis kiel celgrupon ne lernantojn ĝenerale sed gimnazianojn.⁴⁹⁰

Eĉ se esperanto estas vere esence pli facile lernebla ol alia lingvo, tio ne garantias allogocon por la publiko. Se homoj vidas grandan avantaĝon en la lernado de iu lingvo, tiam ili lernas ĝin ankaŭ se ili taksas ĝin malfacila. Laŭ enketo inter esperantlingvanoj nur 33 procentoj opiniis ke „facileco de la gramatiko kaj skribo“ estas „kriterio por la valorigo de lingvoj“. Sed la plimulto taksis la „eblecon de komunikado tutglobe“ pli alta (48 procentoj). En alia enketo la motivoj por eklerni esperanton estis ĉefe „prilingva interesiĝo“ kaj „intereso por la solvo de la lingvo-problemo“ (ĉiu 44 procentoj). Raŝiĉ devis konstati ke la „plej ofte propagandataj ecoj – facileco kaj neŭtraleco – estas inter la plej maloftaj motivoj“.⁴⁹¹

ĉ) 16-regula gramatiko

„La estonteco de Esperanto dependos de tio ĉu ĝi povos proponi al la mondo iom pli ol vizitkarton kun la fama deksesalogo. El sprita kaj genia lingvistika metaforo ĝi fariĝis danĝera memtrompiga mito.“

(Nikola Raŝiĉ ⁴⁹²)

Baza kaj konstitucia dokumento de nia lingvo estas la Fundamento, kiu konsistas el Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro. Bedaŭrinde la Gramatiko kun „16 reguloj“ estas troige nomataj ankaŭ „Plena Gramatiko de Esperanto“. Tiu titolo troviĝas ne nur en multaj nacilingvaj varbiloj kaj por-esperantistaj kompendioj; ⁴⁹³ eĉ fakuloj ripetis tiun simpligon aŭ almenaŭ transprenis la esprimon. ⁴⁹⁴ Almenaŭ Baur en sia germanlingva libreto eksplicite skribis pri „eraro kun malbonaj sekvoj“ aserti ke la esperanto-gramatiko havas nur 16 regulojn, „kio tute malĝustas“. ⁴⁹⁵

Zamenhof mem sciis ke tiu gramatiketo ne sufiĉas kaj kompletigis ĝin en la Ekzercaro. Sed eĉ en la Fundamenta Krestomatia la deksesoj fariĝis „Plena Gramatiko de Esperanto“. Zamenhof uzis la esprimon „plena“ evidente nur pro propagandaj kaŭzoj. ⁴⁹⁶ Ludovikito parolis pli ĝuste kaj modeste pri „16-paragrafa gramatiko“. ⁴⁹⁷

La deksesoj koncernas preskaŭ nur la morfologion de la lingvo, sed apenaŭ ekz. fonologion aŭ sintakson. Zamenhof skribis en la franca kaj rusa versioj ke la artikolo estas uzata kiel „en la germana kaj la franca“, en la rusa krome eĉ: „kaj aliaj“, kvankam li certe konsciis ke la franca kaj germana uzas la artikolon parte malsame. Manders emfazis ke parkeri 16 regulojn ne estas la ĉefa tasko por lernanto: la lernado de esperanto, kiel de iu alia lingvo, bezonas „multe da kompreno kaj rutineco“. ⁴⁹⁸ Laŭ Duc Goninaz la „Fundamento, ties netuŝebleco“ kaj la deksesoj estas „mitoj, fantomantaj interne de la esperantistaro“. La esperanto-parolantoj ne modifis la lingvon, ne ĉar ili respektas la decidon de kelkcent kongresanoj el 1905, sed ĉar ili volis kaj volas konservi la interkompreniĝadon. ⁴⁹⁹

Do la deksesoj restas menciinda kaj mencienda en verko pri esperanta

lingvohistorio, sed ne en informado. Interesatoj rimarkos la trompon – aŭ kredos ke la lingvo estas ege primitiva.

d) Propedeŭtiko

Ekzistas studoj laŭ kiuj lernantoj, studinte antaŭe esperanton, poste lernis alian lingvon pli bone ol studinte antaŭe alian lingvon. Sed tiuj studetoj ne povas pruvi la „propedeŭtikan valoron de esperanto“.⁵⁰⁰ Laŭ Raŝiĉ gravas ĉefe ke dum lernado de esperanto forestas la psikaj-socialaj baroj kiuj malhelpas la lernadon de naciaj lingvoj: estas pli facile eniri lingvan komunumon se apenaŭ iu el la aliaj komunumanoj estas denaska parolanto. Kaj supozeble la propedeŭtika valoro de esperanto „klariĝas pli per tiuj psikaj kaj sociaj faktoroj ol per la jam legendaj 'facileco' kaj 'logikeco' de ĝiaj lingvaj strukturoj.“⁵⁰¹

La koncernaj studoj de Helmar Frank de la klerig-kibernetika instituto de la Paderborn-a universitato ŝajnas esti ne sufiĉe seriozaj. Ekde 1975 okazis eksperimentoj kun bazlernejaj infanoj. Speciala grupo de infanoj lernis du jarojn esperanton, poste du jarojn la anglan. Iliajn lerneajn notojn oni poste komparis kun normala lerneja klaso, kiu lernis la anglan kvar jarojn. Fakte, la speciala grupo estis en la angla averaĝe pli bona ol la normala lerneja klaso, sed ankaŭ en la germana (gepatra) lingvo, en matematiko kaj en geografio! La klarigo de tiu fenomeno estas laŭ mi tute banala: la infanoj de la speciala klaso lernis en posttagmezaj esperanto-kursoj kaj estis por tio antaŭe speciale varbitaj, kiel Frank informas. Oni do ne povas paroli pri reprezentiva grupo. Kompreneble la notoj de tiuj infanoj, kiuj pretis kromlerni posttagmeze, pli bonis ol de la normala lerneja klaso. La metodologio de tiaj eksperimentoj, domaĝe, estas ofte sufiĉe malforta.⁵⁰² Blanke opiniis ke la diversaj „propedeŭtiko-skoloj“ kunvenu, kunordigu siajn agadojn, pridemandu ĉion tre kritike kaj nur poste (eventuale!) prezentu la aferon al la granda publiko.⁵⁰³ Corsetti avertis kontraŭ la misuzo de la esprimo „propedeŭtika“ por esperanto. Homo kiu lernis jam fremdan lingvon certe lernos alian lingvon pli rapide ol homo kiu neniam konatiĝis kun alia lingvo ol la propra. Ankaŭ esperanto povas esti tia fremda lingvo. Sed ĝi ne estas per si mem „propedeŭtika“, por ĉiuj lingvoj en ĉiuj situacioj, aŭ eĉ pli facila ol iu alia lingvo. „Ĝenerale, pro pure teoria lingva komparo de la angla kaj Esperanto, mi ne sukcesas kompreni por kio Esperanto devus helpi italon aŭ germanon lerni la anglan. Ĉu ĝi havas fonologian sistemon, mezan inter okcidenteŭropaj lingvoj kaj la angla? Ĉu ĝi havas fiksitajn vortordon kiel la angla? Ĉu ĝia vortrezoro...? K.t.p.“⁵⁰⁴

Mi mem – kaj tiun strategion mi konas ankaŭ de aliaj esperantistoj – diris antaŭ jaroj en informado ke lerninte esperanton mi pliboniĝis ankaŭ en la lernejoj fremdaj lingvoj. Tion mi povis „pruvi“ eĉ per miaj lernejoj notoj en la angla kaj la latina. Poste rekonsiderante la aferon, mi devis konfesi al mi ke verŝajne ne esperanto havis tiun pozitivan efikon, sed la dissolvo de mia lerneja klaso en 1987. Multaj anoj devis ripeti la jaron, la reston kun mi oni sendis al paralelaj klasoj. Tiu ŝanĝo de la klaso, la nova socia medio kaj la novaj instruistoj plibonigis mian lernejan staton ĝenerale. Esperanton mi eklernis nur en somero 1988.

Alia afero pri kiu mi fieris kiel juna propagandisto estis la fakto ke mi post unu-du jaroj scipovis esperanton pli bone (aŭ ĉu nur pli flue?) ol la anglan, kiun mi komencis lerneje jam kvin jarojn pli frue. Nuntempe mi ne plu vidas miraklon en tio: esperanton mi lernis pro propra iniciato, plene da entuziasmo, korespondante kaj deĉifronte tekstojn libervole kaj libertempe. „La angla“ estis por mi deviga lerneja fako, kaj mi ne konis anglojn persone. Ankoraŭ nun mi parolas esperanton pli flue ol la anglan, ĉar la lastan mi malofte ekzercas paroli. Se oni serioze komparus mian parolatan esperanton kun mia parolata angla, tiam oni verŝajne tamen konstatus ke, rilate al vortrezoro kaj komplikeco de la frazoj k.t.p., mia esperanto ne estas multe pli riĉa ol mia angla. La ĉefa diferenco troveblas je la situacio de tiuj du lingvoj mem: la ĝenerala nivelo en esperanto estas malalta, dum la angla estas lingvo de denaskuloj. Do la sama nivelo, kiu en esperanto sufiĉas por esti rigardata bona parolanto, signifas en la angla maksimume nur averaĝon.

e) Prononco kaj alfabeto

Relative multaj verkoj nomas esperanton *fonetika lingvo*.⁵⁰⁵ Fonetiko estas la scienco kiu pristudas sonojn, ilian produktiĝon kaj akustikon. Fonologio pristudas sonojn, kiuj interrilatas en la sistemo de iu unuopa lingvo. (Fakte, nur ekde la 1930aj jaroj okazis pli severa distingo inter fonologio kaj fonetiko, pro influo de Trubeckoj.⁵⁰⁶) Dum sonoj apartenas al fonetiko, en fonologio oni pritaktas *fonemojn*, tio estas la plej malgranda unuo kiu distingas signifojn. La vortoj *pano* kaj *bano* malsamas nur pro la unuaj sonoj. En esperanto /p/ kaj /b/ estas nomataj du malsamaj fonemoj, ĉar ili kaŭzas distingon inter du signifoj. Fonemaro ne aŭtomate egalas al literaro: la angla havas 20 vokalajn fonemojn, sed nur kvin aŭ ses literojn por vokaloj. La fonologia sistemo de esperanto havas laŭ reganta opinio 28 fonemojn (kvin vokalojn kaj 23 konsonantojn) kaj ĝia alfabeto 28 literojn.⁵⁰⁷ Ĉiu litero respondu, teorie, al unu fonemo.

Marc van Oostendorp juĝis pri la fonetikaj reguloj de esperanto tiel: la regulo, ke oni akcentu la antaŭlastan silabon, estas akceptebla, kaj ankaŭ aliaj lingvoj havas tiun regulon, ekz. la pola. Sed ke oni prononcu la vortojn tiel kiel oni skribas ilin, do ke sono estu ĉiam la sama, sendepende de sia loko en la vorto, tion li rifuzas, kaj neniu lingvo en la mondo tiel funkcias. Fakte la prononco de sono dependas de la ĉirkaŭo. Van Oostendorp ekzamenis kvin esperantlingvajn infanojn kaj venis al la sama rezulto kiel Kalocsay kaj Waringhien en PAG. En malfermitaj silaboj oni prononcas *ee* kaj *oo*, do iom longajn, vastajn vokalojn, en fermitaj silaboj male *e* resp. *o*. Kiel lingvisto li trovas esperanton fascina, ĉar videblas ke „tro simplismaj ideoj“ pri lingva logikeco ne funkcias: „Oni povas ĉe la skribtablo konstrui regulojn kiom multe oni volas – la beleco de la naturo ja superas ĉiun arton.“⁵⁰⁸



Marc van Oostendorp

Longan klarigon pri fonetiko, fonologio kaj fonemoj oni ofte ne povas fari en esperanto-informado. Bonaj informlibroj ⁵⁰⁹ malhavas tiujn nenecesajn pompajn propagandaĵojn: „tiel skribita kiel parolita“ aŭ „la prononco ne kaŭzas problemojn“. ⁵¹⁰ Pridubenda estas ankaŭ la aserto de Wüster ke „facile konfuzeblaj konsonantoj ne ekzistas en esperanto“. ⁵¹¹ En germanaj propagandiloj oni asertas kutime ke la esperanta prononco estas „kiel la germana, kun jenaj esceptoj“. Tiam sekvas nur la ĉapelliteroj kaj kelkaj tre evidentaj malkongruoj (c, s, v, z), sed fakte la diferencoj estas esence pli multaj. – Laŭ Van Oostendorp eblas diri ke „la ortografio de Esperanto kiom eble agordas kun la fonologio (sed ne kun la fonetiko).“ ⁵¹²

Kelkfoje oni aŭdas la aserton ke esperanto sonas malbele. ⁵¹³ Belsoneco estas laŭ Støp-Bowitz necesa por planlingvo, „por ke ĝi estu agrabla en uzado.“ ⁵¹⁴ Tia ĝenerala belsoneco de lingvo kompreneble estas subjektiva afero, tial ni ankaŭ ne fieru ĝenerale pri belsoneco de esperanto. Sed en la varbado por (okcidentaj) komercaj produktoj svarmas vortoj, kiuj estas hazarde uzataj ankaŭ en esperanto, ekz. *Amato, Bona, Alinova* por manĝaĵoj. ⁵¹⁵ Niaj vortoj, almenaŭ en eŭropidaj kulturoj, do ne povas ĝenerale soni malagrabla. La riproĉo pri malbeleco ŝajnas esti relative teorieca: mi ankoraŭ neniam renkontis interesaton kiu vere aŭdinte esperanton trovis ĝin malbela. Kaj ankaŭ rilate al esperanto, la individua voĉo de parolanto supozeble pli gravas por belsoneco ol la koncerna lingvo mem.

La supersignoj de la esperantaj literoj ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ renkontis multe da kritiko, ĉar daŭre ili kaŭzis problemojn al homoj kiuj uzas maŝinan prilaboron de tekstoj, do al presistoj, telegrafiistoj kaj poste al komputilistoj. Tial Zamenhof jam dekomence proponis anstataŭigi supersignitan literon per la koncerna litero plus h kaj forlasi la supersignon de ŭ. Komputilantoj preferas x al h, ankaŭ post ŭ – por ke komputiloj povu konverti tiajn tekstojn kun malpli da problemoj.

Ankaŭ aliaj lingvoj resp. skribsistemoj uzas supersignojn. La franca konas proksimume kvardek signojn, kiuj ne apartenas al la ASCII-listo kaj tial estas specialaj el komputila vidpunkto: interalie la vokaloj kun diversaj akcentsignoj. Tamen francoj ne diskutas ĉu rezigni pri la propraj signoj. Raŝiĉ enketdemandis esperantistojn pri niaj supersignoj: nur 5,13 procentoj el la enketitoj trovis ilin nepre ŝanĝendaj, 7,69 procentoj trovas ilin ĝenaj sed ne ŝanĝendaj. ⁵¹⁶ Simile ekz. hungarlingvanoj ne opinias amase ke oni forigu la speciale hungarajn literojn, sed la hungarlingvanoj ja ne postulas ke ilia lingvo fariĝu „dua lingvo de

ĉiu“, kaj ne asertas ke ilia lingvo estas perfekta.

Kiam oni petas vin skribi esperantajn frazojn por aperigo en neesperanta gazeto, ne simple forlasu la supersignojn, sed provu verki frazon sen ĉapelliteroj aŭ uzu la Zamenhofan h-modelon, kiu estas malpli okulfrapa ol la x-umado. La frazo estu ne nur iomete komprenebla, se tio eblas en via nacia lingvo, sed havu iel normalan enhavon, kaj ne aspektu kiel konstruita nur por informado – alikaze la lingvo eble aspektas stranga kaj malviva. Bedaŭrinde oni ankoraŭ foje renkontas primitivajn propagandajn frazojn kiel „Ĉi tiu facile lernebla lingvo estas la ĝusta lingvo por ĉiu homo“. [517](#)

3. Literaturo

Zamenhof konsciis pri la graveco de literaturo en planlingvo, kio estas ne memkomprenebla inter planlingvaj aŭtoroj. Jam la *Unua* Libro de 1887 enhavis du proprajn poemojn, tradukitan poemon de Heinrich Heine, la Patro Nia-n kaj la komencon de la Biblia libro Genezo. ⁵¹⁸ Literaturo ŝajne tre sukcese kontribuis al lingva stabileco. La tradukoj de Hamleto (1894) kaj Ifigenio (1908) fare de Zamenhof kaŭzis parte ke la prilingvaj disputoj en tiuj tempoj finiĝis relative kontentige por esperanto, juĝis Gaston Waringhien. ⁵¹⁹



Kazimierz Bein

En la verkaroj de Ludoviko Zamenhof, Antoni Grabowski kaj Kazimierz Bein

(Kabe) troveblas nur malmultaj originalaĵoj, ĉar en tiu komenca periodo oni ĉefe tradukis. Kabe klarigis ke li preferis traduki, ĉar verkante originale oni povas eviti malfacilajn esprimojn, sed tio ne eblas kiam oni tradukas. ⁵²⁰ Sed tralegante esperanto-tradukojn oni sufiĉe ofte vidas ke la tradukintoj tamen evitis malfacilaĵojn, ĉu pro manko de bonaj esperantaj vortoj, ĉu por ke la leganto ne devu konsultadi la vortaron.

En la periodo inter la du mondmilitoj plimultiĝis la originalaj verkoj, kaj montriĝis pravaj tiuj fruaj pioniroj, kiuj jam komence taksis literaturon same grava kiel lernolibrojn kaj informilojn. Freŝbakita esperantisto ja volas apliki la lingvon kaj legi ion kvalitan; kaj esperantistoj apartenas al la malgrandaj segmentoj de la „normala socio“ kiuj aĉetas superaveraĝe multe da libroj, eĉ beletrajn. „Librojn legu la verkisto, estas mi esperantisto“ mokis Baghy – sed malprave. Al la esperanta libro-merkato ne damaĝas manko de legemo, sed simple la malmulteco de esperantistoj. Gravas ankaŭ organiza strukturo, kiel emfazis Herbert Mayer en 2002 dum prelego en Roterdamo. Rigarde la vendon de libroj eldonitaj de li, estas granda diferenco ĉu en iu lando ekzistas bona libroservo aŭ ne.



Herbert Mayer

Laŭ la franca esperantologo Pierre Janton nia literaturo estas tre estiminda kompare kun multaj aliaj lingvoj. Romano kaj precipe teatro estas malforte evoluintaj kulturformoj, sed ekzistas „bonaj novelistoj, poetoj kaj kanzonistoj. Ankoraŭ ne estiĝis esperanta Shakespeare aŭ Dante, sed neniu lingva kaj arta kaŭzo obstaklas al tiu eventualaĵo.“⁵²¹ Philippe ilustras la internaciecon de nia literaturo per la *Esperanta Antologio*⁵²² kun originale esperante verkita liriko de 163 poetoj el 35 landoj „de ĉiuj kontinentoj.“⁵²³ Støp-Bowitz prezentis listojn de tradukitaj verkoj el diversaj lingvoj, sed bedaŭrinde regas tie ofte malnoveco: ekzemple la plej nova menciita verko el la germana lingvo estas la romano de Erich Maria Remarque el 1929.⁵²⁴ Informade taŭgas menciigi internacie konatajn verkistojn, cetere interesatoj ŝatas aŭdi ankaŭ la nomon de sianacia verkisto, tial konvenas sciigi pri tradukoj el Turgenjev al rusa publiko, el Lagerlöf al sveda, el Cervantes al hispana k.t.p. Kutime kelkaj gravaj aŭ tipaj nomoj pli bonas ol longa teda listo.

Esperanto registras en sia rubriko „Laste aperis“ novajn esperantajn librojn, certe ne ĉiujn produktitajn, sed proksimume. Redaktisto István Ertl emfazis al mi ke la esperanto-tradukoj estas ne tiom ofte el la angla kiom estas tradukoj en multaj naciaj lingvoj: en januaro-novembro 1996 la revuo *Esperanto* registris 82 tradukojn. El ili estis

11	el la germana
po 6	el la angla, ĉeĥa, sveda
po 5	el la franca, japana, portugala
po 4	el la nederlanda, pola
po 3	el la hispana, itala
po 2	el la albana, bulgara, latina, rusa
po 1	el la hungara, persa, slovaka, slovena, volapuko kaj ugarita.

István Ertl rekomendas aserton kiel „ĉiutage aperas nova esperanta titolo en la mondo“, kio laŭ li eblas, ĉar revuo *Esperanto* mencias jare inter 200 kaj 300 titoloj, dum ne ĉio eldonita atingas la Libroservon en Roterdamo.⁵²⁵ Osmo Buller publikigis statistikaĵojn pri la roterdamaj vendoj en la jardeko 1989-2000.⁵²⁶ Oni vendis kontraŭ proksimume unu kaj duona milionoj da eŭroj, kaj plej

popularis:

Verko	venditaj en 1989-2000
A. Childs-Mee: Saluton!	3.233 ekzempleroj
Pasporta Servo: listo de gastigantoj de TEJO	3.138 ekzempleroj
C. Piron: Gerda malaperis!	2.075 ekzempleroj
G. Waringhien / K. Kalocsay: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto	1.532 ekzempleroj
M. Boulton: Faktoj kaj fantazioj	1.490 ekzempleroj
W. Auld (red.): Nova Esperanta krestomatio	1.448 ekzempleroj
Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA: gvidilo	1.398 ekzempleroj
L. L. Zamenhof: Proverbaro esperanta	1.142 ekzempleroj
J. Ojalo: Esperantaj sinonimoj	1.069 ekzempleroj
A. A. Milne: Winnie-la-Pu	1.049 ekzempleroj

Plej sukcesaj do estas verkoj por lerni esperanton aŭ por plibonigi sin en tiu evidente fremda lingvo. Krom la krestomatio nur unu verko vere apartenas al beletra literaturo – monde konata infanlibro kun relative facila lingvaĵo.

Sed oni cerbumu ĝenerale pri la varbefiko de esperanta literaturo, ĉu originala aŭ tradukita. Jam en onia gepatra lingvo ekzistas multe pli da verkoj ol oni povus legi en sia tuta vivo, kaj oni trovos tion kio interesas onin pli verŝajne en ĝi ol en esperanto. Por legi ekz. la Bibliion cetere ja ne necesas esperanto. Esperanta literaturo, inkluzive de esperantlingva muziko, havas en informado ĉefe la (ja gravan) taskon emfazi ke ĝi entute *eblas* kaj ekzistas.

Kaj bonas se informadanto jam legis tion kion li mencias publike, ĉar nelegitaj nur ekzistantaj libroj ne tiom impresas, kaj ĵurnalisto povus demandi: kial vi legis ĝuste tion ĉi precipe de tiu aŭtoro, kaj kiel ĝi plaĉis al vi.


La esperantan gazetaron oni kutime taksas je cent titoloj. ⁵²⁷ Listo de *Eventoj* por 1993 mencias 188 periodaĵojn, ⁵²⁸ sed el ili nur tre malmultaj havas iom grandan abonantaron, regulan aperadon, relative bonan aspekton k.t.p., eble dudeko. Precipe menciindaj informade estas eble *Monato* kaj *Kontakto*, ĉar ili okupiĝas ne pri la esperanto-komunumo mem.

4. Esperanto kaj aliaj lingvoj

„Mi ĉiam denove konstatas ke esperantistoj disvastigas la esperanto-ideon [...] tendence negative. Oni enpoŝtigas iujn pragajn deklarojn al reta forumo, tiel ke ĉiu facile perdas la ĝojon pri esperanto. Oni laŭtigas sur retpaĝoj kaj aliloke ke oni malamas la anglan. Kun tiaj homoj mi ne volas komuniki. Kiu malamas [fremdajn] lingvojn, tiu malamas ankaŭ fremdajn homojn.“

(„Ro“, neesperantista kontribuinto al la diskutejo de www.EsperantoLand.de ⁵²⁹)

Esperanto estas unu el pluraj miloj da lingvoj sur la mondo. Neniu scias ekzaktan nombron, interalie ĉar ne ĉiam eblas nete distingi inter lingvo kaj dialekto. Cetere tre malgrandaj lingvokomunumoj povas ĉesi ekzisti, sen ke la lingvistoj tuj ekscias pri tio. La lingvisto Harald Haarmann nomas nombron de 2.500 minimuma, dum li skeptikas pri maksimumaj taksoj de 8.000 aŭ eĉ 10.000 lingvoj. Elirante de tuta nombro de 6.417 lingvoj, laŭ li 273 havas pli ol unu milionoj da parolantoj, 4.162 estas „malgrandaj lingvoj“ parolataj de minimume mil homoj, sed de malpli ol unu miliono. 1.982 „nanajn lingvojn“ parolas malpli ol mil homoj en la mondo. Laŭ kontinento la proporcioj povas malsami, ekzemple en Ameriko la miliono-lingvoj ne tenas 4,2 procentojn, sed nur 0,9.



Sed kiam oni rigardas kiom da homoj parolas la koncernajn lingvojn, tiam la bildo aspektas tute malsame. La preskaŭ du mil nanaj lingvoj kolektas entute eĉ ne duonan milionon da parolantoj, dum la parolantoj de la miliono-lingvoj konsistigas 85 procentojn de la loĝantoj de nia tero. El tiuj 273 miliono-lingvoj dek du havas pli ol cent milionojn da parolantoj: ⁵³⁰

Lingvo	parolantoj en milionoj	procentoj de la mondanoj
• ĉina	1.210	23,6
• angla	573	11,3
• hinda	418	8,2
• hispana	353	6,9
• rusa	242	4,7
• araba	209	4,1
• bengala	196	3,8
• portugala	182	3,5
• indonezia	175	3,3
• franca	131	2,5
• japana	125	2,4
• germana	101	2,1

Pluraj lingvistoj opinias ke la nombro de la lingvoj certe malpligrandiĝos, ke multaj lingvoj „formortos“ en la proksima estonteco. Pri tio oni kulpigas kutime la anglan, kiu subtenas kulturan asimiliĝon kaj samniveligojn. Haarmann avertas je tro simplaj stereotipoj. Nekontesteble la tutmonda influo de la angla grandas, tamen laŭ li tio estas nur maldika surfaco, sub kiu troviĝas „preskaŭ neelĉerpebla multeco da lingva kaj kultura varieco“. Neniam la nombro de lingvoj estis stabila. Dum daŭre mortas lingvoj, aliaj pluvivas kaj denove aliaj estiĝas nove, kiel diskreskoj de pli malnovaj. Li koncedas ke pli da lingvoj mortas ol estiĝas nove, ke la ĝenerala tendenco iras al malpli granda nombro de lingvoj. ⁵³¹

Esperanto apartenas plej verŝajne al la grupo de la „malgrandaj lingvoj“, kun pli ol mil, sed malpli ol unu miliono da parolantoj. Ĝi partoprenas do la plej grandan grupon, tiun de 64,8 procentoj de la lingvoj. Sed nia lingvo neniam estis celita kiel simpla aldono al la lingva multaro, sed ligiĝis al certaj ideoj pri speciala rolo inter la lingvoj.

a) Kontraŭ aliaj lingvoj

„[...] oni ne cedu al ŝovinismaj pretendoj pri la supereco de iu nacia lingvo, sed samtempe oni zorge evitu rebati per ia propra, internacia [esperanta] ŝovinismo.“

(Victor Sadler ⁵³²)

Multaj neesperantistoj kredas ke esperanto anstataŭu la jam ekzistantajn lingvojn, kvankam jam komence la esperantistoj neis tion. Zamenhof trankviligis ke „oni ne konfuzu Esperanton kun monda lingvo; ĝi ne estingu la naciajn lingvojn.“ ⁵³³ Couturat kaj Leau klarigis ke ili uzas la terminon *lingvo universala* kiel sinonimon de „lingvo internacia helpa“, kaj ke ĝi ne signifas „lingvo *unika* de la homaro“. ⁵³⁴ La aŭtoroj de germana lernolibro skribis: „La komforta, sed erariga esprimo 'monda lingvo' kaŭzis la opinion ke esperanto volas forpuŝi la landajn lingvojn. Tute ne!“ ⁵³⁵ Anglalingva informilo el 1986 emfazis ke esperanto „ne anstataŭos ies lingvon.“ ⁵³⁶

Kial esperantistoj tiom ofte sentas sin devigitaj eksplicite kontraŭi tiun supozon? ⁵³⁷ Kial homoj kredas ke „esperanto“ estas kontraŭ aliaj lingvoj? Se esperantistoj iel kontribuis al tio, tiam maltaŭgaj terminoj certe kunkulpas. Multe pli damaĝa estas la maniero, kiel esperantistoj skribas en varbilo pri la multlingveco de la homaro: ĝi aperas preskaŭ ĉiam kiel malbono, ĉar ĝi malhelpas komunikadon, kostas multegon pro bezono je tradukistoj, kaŭzas disputojn kaj militojn. Germana broŝuro el la 1960aj jaroj rakontis pri la malnova „revo de la homaro, el-iri la babilonan lingvokaoson [...] ĉiuepoke ekzistis homoj, por kiuj la multlingveco sur nia tero estis dorno en la okulo, kaj kiuj okupiĝis pri la solvo de la problemo“, ⁵³⁸ pli nova asertis ke „Esperanto volas forigi la lingvo-kaoson kaj, anstataŭ ĝi, kiel dua lingvo por ĉiuj [...]“ solvi la problemon. ⁵³⁹ Laŭ Unuiĝo Franca por Esperanto „la problemo“ estas „la lingvoj“. ⁵⁴⁰ El la frontpaĝa frapfrazo de germana propagandilo de 1950 oni povas kompreni ke esperanto eĉ ne estas lingvo: „Lingvoj disigas! – esperanto kunligas!“ ⁵⁴¹

Nia simplismo *la monda lingva problemo* supozigas ke la esperantistoj rigardas la nunan lingvan staton de la homaro – la multlingvecon – kiel nuran problemon, kaj ke la „solvo“ estus „enkonduki“ esperanton. Sed se, supozinde,

la priskribitaj problemoj ekzistos tiel longe kiel ankoraŭ ekzistas diversaj lingvoj, kaj se esperanto solvu ĉiujn problemojn de (internacia) komunikado, tiam ĝi devas fariĝi la tutsola lingvo de la homaro. La frapfrazo „esperanto volas forigi la lingvan kaoson“ fakte signifas ke oni nomas la ekziston de malsamaj lingvoj kaoso. Tiun kaoson, do la multecon kaj diversecon (!), oni ŝajne volas forigi per esperanto. Post tiu frapfrazo ne plu helpas multe se oni atentigas ke esperanto estu „nur“ dua lingvo kaj ke ĝi „protektu aliajn lingvojn“.

Same malrekomendindas proklami la batalon kontraŭ la Babela turo, ĉar Babelo estas ja la simbolo de la diverslingveco, diverslingveco kiun ni ne volas forigi.

⁵⁴² Evitendaj estas ankaŭ frapfrazoj kiel „unu mondo – unu lingvo“ aŭ „anstataŭ mil lingvoj [nur] unu“. Kiam la projekto de komuna eŭropa valuto ankoraŭ nomiĝis *European Currency Unit* (Ecu), tiam iu inventis la frapfrazon „Eŭropo, unu merkato, Ecu, unu mono, Esperanto, unu lingvo“. ⁵⁴³ Tio povas miskomprenigi, ĉar esperanto ekzistu nur apud aliaj lingvoj, dum la komuna valuto ja vere forigas la naciajn.

Tia eblo miskompreni troveblis cetere ankaŭ en la informado por volapuko: Schleyer uzis la frapfrazon *Menade bal pŭki bal*, al unu homaro unu lingvon, kvankam nenie ŝajnas ke Schleyer volis fari la mondon vere unulingva. ⁵⁴⁴

La Principaro de Frostavallen rekomendas akcenti ke „Esperanto ne forigas aliajn lingvojn“. Sed ĝuste tiu emfazo povas neintence akcenti la ideon, ke teorie *eblus* ke esperanto forigas aliajn lingvojn. Oni ja povas pozitive diri ekzemple ke nuntempe homoj en pli ol cent landoj parolas esperanton, krom la gepatra lingvo kaj aliaj lernitaj lingvoj.

Diversaj flugfolioj en variantoj demandas: „Ĉu lerni ĉiujn tiujn: mandarinĉinan, anglan, rusan, hispanan, hindan, araban, bengalan, portugalan, malajan, japanan [...] aŭ ĉu lerni nur unu: esperanton. La internacian lingvon kiu funkcias.“ ⁵⁴⁵ Tia reklamo fiaskas, ĉar la reala interesato ne konfrontiĝas alternativon ĉu lerni unu aŭ tiujn multajn lingvojn. Individuo lernas tiujn lingvojn kiujn li bezonas, kaj post tio kelkaj homoj deziras lerni eĉ plian. Ĉu intence parencan lingvon, ĉu ekzotikan, ĉu komplikan, ĉu facilan, ĉu por certa fako, ĉu por turismi – jen la veraj alternativoj, jen eventuala ŝanco por esperanto.

Meditante pri lingvoj, kiuj havis aŭ havas grandan disvastiĝon, pluraj esperantistoj emfazis ke la babilona, la greka, la latina, la angla k.t.p. disvastiĝis

nur per milito kaj perforto. ⁵⁴⁶ Tio ne estas tute malĝusta, sed ankaŭ ne la plena klarigo: gravaj faktoroj estas ankaŭ ekonomio, politiko kaj kulturo. Ni atentigu pri la eksteraj, nelingvaj faktoroj de lingvo-disvastiĝo nur modere kaj ne akuzu etnajn lingvojn. Krome, se oni asertas ke ĝis nun ĉiuj lingvoj disvastiĝis nur per perforto, kial esperanto povus esti escepto? Ĉu nur pro la pia esperantista deziro ke ĉiu lernu ĝin libervole? Cetere la komparo de esperanto kun la latina povas problemi, ĉar dum la eŭropa mezepoko la latina superregis kaj la popolaj lingvoj ludis nur marĝenan rolon en la mondo de la literoj.

b) „Paca lingvo de pacaj homoj“

La malnova ideo pri la „karaktero de popolo“ kaptis ankaŭ esperantistojn. La UEA-aktivulo Edmond Privat, doktoro pri historio, docentis pri tio universitate; laŭ la *Enciklopedio de Esperanto* „meritas specialan atenton liaj libroj franclingvaj pri Historio kaj Psikologio de Popoloj“. ⁵⁴⁷ Privat: „Laŭ la pure lingva vidpunkto, tiu idealismo de la esperantista movado havis grandan avantaĝon. Ĉiuj vivantaj lingvoj posedas *propran 'spiriton'*. Ili reprezentas ian specon de naciismo kaj parte respegulas la psikologion de unu gento.“ ⁵⁴⁸ En la 1920aj jaroj la psikologio de popoloj estis jam transpasinta la kulminon de sia populareco, almenaŭ inter sciencistoj. La lingva flanko de la ideo pri „popola karaktero“ estas la konata vico da antaŭjuĝoj pri elektitaj naciaj lingvoj: la latina estas la lingvo de logika pensado, la franca tiu de la amo, la itala estas la plej taŭga por muziko, la germana estas la lingvo de pensantoj kaj verkistoj (aŭ la lingvo de soldatoj kaj koncentrejoj gardistoj, laŭ la antaŭjuĝoj de aliuloj), la ĉina similas al stranga kantaĵo, la nederlanda malbelas k.t.p. Kaj esperanto estas aŭla lingvo de paco, amikeco, flirtado, ⁵⁴⁹ bono, belsono, lingva matematiko, neŭtraleco, la plej internacia kaj plej facila, pli ekzakta ol ĉiu alia lingvo, aŭdekomence morta, artefarita kiel artefaritaj floroj, nekapabla evolui, senkultura, destinita al disvariantiĝo, malbelsona...


Nomante esperanton „lingvo de paco, de racia kaj justa komunikado k.t.p.“ esperantistoj riskas iel sin mem filaŭdi. Tonkin distingas inter lingvo komerca (la angla) kaj lingvo de amikeco (esperanto). ⁵⁵⁰ Ĉu ne ekzistas amikaj (kaj same) internaciaj kontaktoj pere de la angla? La angla estas komunikilo de *Greenpeace*, de NATO, de rotarianoj, de komunistoj, de eternaj esperanto-komencantoj... eble esperanto estas „lingvo de amikeco“, nur ĉar komerca uzado grandparte mankas?



Edmond Privat

c) Lingvopolitiko en Eŭropa Unio

Pluraj landoj en okcidenta Eŭropo ekde la 1950aj jaroj ekonomie kunlaboras en diversaj komunaj organizaĵoj. La plej signifa estas la tiel nomataj Eŭropaj Ekonomiaj Komunumoj (ekde 1958), kiuj formas nun unu kolonon de la Eŭropa Unio (EU). Ĉiuj oficialaj lingvoj de la membraj ŝtatoj rajtas esti oficialaj lingvoj de EU. En la komenco de la Komunumo/Unio tio validis por la germana, franca, itala kaj nederlanda lingvoj. En 1973 membriĝis Britio, Irlando kaj Danio kun la angla kaj dana; Irlando rezignis pri la uzado de la irlanda-gaela. En 1981 Grekio kun sia lingvo aliĝis, en 1986 aldoniĝis la hispana kaj portugala, kaj kiam en 1995 la Unio kreskis kun Svedio, Aŭstrio kaj Finnlando, tiam alvenis la sveda kaj finna.⁵⁵¹



La belgo Eduard Brackeniens, ĉefo de la interpretista servo de la EU-komisiono, emfazis en 1992 ke ne ekzistas *lingua franca* en la Unio. Tamen kelkajn frazojn poste evidentiĝis ke kelkaj lingvoj pli egalas ol aliaj, ke la angla kaj la franca estas prefere uzataj interne de la organizo, kaj preskaŭ ekskluzive la angla en la eksteraj rilatoj. Cetere laŭ Brackeniens la interpretista servo kostas nur du procentoj de la EU-buĝeto,⁵⁵² sed en ĝi troviĝas ankaŭ la sumegoj por agrikultura kaj infrastruktura subvencioj. En apuda frazo li konfesis ke por lia servo oni elspezas trionon el la administradaj kostoj.

En januaro 2002 la eŭropa deputito Maurizio Turco demandis al la EU-komisiono ĉu jam ekzistas la promesita laborgrupo, kiu ekzamenus la eblecon uzi esperanton kiel pontan aŭ interlingvon por la interpretado; cetere li demandis i.a. kiujn studojn la laborgrupo konsideris kaj kiujn konkludojn la laborgrupo atingis. En la nomo de la komisiono komisaro Neil Kinnock el Britio respondis ke la koncerna interpreta servo ekzamenis la demandon „kun certa aro da siaj eksteraj partneroj en universitataj kaj akademiaj rondoj“. (Demanditajn personojn kaj legitajn studojn li ne menciis.) Oni konkludis ke esperanto allogas nur je la unua rigardo; post detala prijuĝo malkovriĝis „seriozaj praktikaj, financaj kaj teknikaj malfacilaĵoj“:

– Ne ekzistas profesie kvalifikitaj esperanto-interpretistoj resp. koncernaj edukaj institucioj (en membro-ŝtatoj). La interpreta servo de EU mem ne povas transpreni la necesan trejnadon, ĉar por ĉiu persono tio kostas tri aŭ kvar jarojn da parttempa studado kaj ĉ. 70 mil eŭrojn. Cetere, duono de la EU-interpretistoj laboras nur kiel liberaj kunlaborantoj. Ili tre verŝajne ne lernos esperanton, kiu aliloke apenaŭ liveras praktikan valoron.

– Ne ekzistas pruvo ke esperanto kiel ponta aŭ interlingvo vere plibonigos la ĝeneralan kvaliton de interpretado. Male, estas riske utiligi lingvon kiu ne estas uzata en ĉiutaga vivo, ĉar ĝi ne povas kovri ĉiujn temojn de kunvenoj.

– Ĉar ĝenerale mankas interpretistoj en multaj nunaj kaj estontaj EU-lingvoj, la interpreta servo koncentriĝas disponigi interpretistojn en tiuj lingvoj, Kinnock klarigis.⁵⁵³

La esperanto-movado bezonas koheran lingvopolitikan koncepton se ĝi volas lobii por justaj solvoj de la lingvo-problemoj en EU. Dum seminario de GEA la partoprenantoj opiniis ke la movado havu tian koncepton, sed ke la simpla enkonduko de nur unu sola lingvo – ĉu esperanto aŭ ĉu alia lingvo – ne estu la propono. Ekzemple, ĉiu parlamentano havu la eblon paroli en sia preferata lingvo.⁵⁵⁴ Do ankaŭ rilate al EU videblas ke ne ekzistas „la solvo“ de la „lingva problemoj“, sed maksimume nur solvoj de konkretaj lingvaj problemoj.

ĉ) Kvalitoj de lingvoj kaj lingvo-scipovoj

[Iom aĝa esperantisto en diskuto] „opiniis, ke oni devus, por konvinki arde rezistantajn neesperantistojn, alvoki ilian kulposenton [...]: 'Do ĉu vi ne hontas, paroli kiel plenkreskaj homoj per manoj kaj piedoj? Ĉu ne estas sendigne, ke vi tiel kiel infanoj baraktumas, anstataŭ...' – Nu, k.t.p., k.t.p.“

(Helmut Welger ⁵⁵⁵)

Ĉe pluraj propagandistoj oni povas ricevi la impreson ke ili estas kontraŭ aliaj lingvoj aŭ kontraŭ la lernado de aliaj lingvoj. Foje ili komparas esprimaĵojn esperantajn kaj nacilingvajn kaj per tio „pruvas“ ke esperanto estas ĉiam la lingvo pli bona, pli esprimriĉa, pli ekzakta k.t.p. Ankaŭ rekta mokado pri aliaj lingvoj plaĉas al ili. Ekzemple Hölscher prezentas en sia propaganda libreto dusencan germanan frazon, kie la frazobjekto ne estas indikita per akuzativo: „La filino akompanis la patrino al la stacidomo“ (germanaj ingenraj formoj ne havas akuzativ-markilon). Esperanto, kontraŭe, montras la objekton per n-finaĵo ĉe la patrino. Per tio Hölscher provas pruvi ĝeneralan superecon de esperanto rilate al la germana. ⁵⁵⁶ Sed ankaŭ esperantaj frazoj povas esti simile neklaraj, kiam la subjekto kaj la objekto ne povas ricevi n-finaĵojn, ekzemple kaze de propraj nomoj: *John akompanis Mary al la stacidomo*. Jorge Camacho donis plian ekzemplon: „'Multe da katoj mortigis multe da hundoj', kiuj mortigas kiujn?“ ⁵⁵⁷ Sed la danĝero de konfuzo estas kaj en esperanto kaj en la angla aŭ germana malgranda, ĉar la uzantoj evitas miskompreneblajn frazkonstruojn resp. ĉi-kaze aplikas la neskribitan regulon ke la unua frazero estas la subjekto.

Iom simile la lingvisto Martinet faris tro grandan konkludon el sola fakto. Estinte idisto, li nomis la akuzativon de esperanto nenecesa, kaj se la lingvo estus fabrikita de okcidentanto (do ne de Zamenhof en multlingva Bjalistoko), tiam esperanto laŭ Martinet ne havus akuzativon, ĉar okcidentanoj fidus al la kunteksto. Kaj cetere

„estas amuze, ke en la germana lingvo la akuzativo estas markita nur en unu kazo el ses: ĉe la singularo-virgenro. Ĝi ekzistas nek en la pluralo, nek ĉe la singularo-ingenro, nek ĉe la singularo-neŭtro, kaj tio montras, ke ĝi neniel utilas, ĉar oni ne povas fidi ĝin.“ ⁵⁵⁸

Sed se oni scias, ke ĉ. duono el ĉiuj germanaj substantivoj estas virgenraj, kaj ke ununombro estas multe pli ofte uzata ol multenombro, tiam la ebla utilo de la

akuzativo denove evidentiĝas.

Tiaj senfruktaj komparoj kun tiom simplismaj konkludoj supozigas ke planlingvulo malmulte estimas aliajn lingvojn. Cetere parolanto de iu lingvo povas kompreni mokon kontraŭ sia lingvo kiel mokon kontraŭ si mem, kaj senti la riproĉon ke li taŭgas laŭ la esperantistoj nur se li lernas esperanton aŭ almenaŭ konfesas ĝian superecon.⁵⁵⁹ Oni do nur tre delikate montru lingvajn avantaĝojn de esperanto.

Same malbonas moki pri la fremdlingvaj scipovoj de la interesato.⁵⁶⁰ Homoj kiuj investis tempon kaj laboron por fremda lingvo meritas estimon, precipe de ni esperantistoj, kiuj ja oficiale alvokas lerni lingvojn. Kaj eĉ se homoj trotaksas siajn kapablojn, estas psikologie malsaĝe moki pri la interesatoj kaj iliaj lingvoscipovoj.⁵⁶¹ Kelkaj propagandistoj eĉ asertas ke multlingvuloj kaj interpretistoj estas aŭtomate kontraŭ esperanto ĉar la fina venko ruinigos iliajn „privilegiojn“. Kio pri esperantistaj interpretistoj kaj tradukistoj, kaj la multaj multlingvuloj en la movado? Krome estas en la plej multaj kazoj strange paroli pri „privilegio“, kiam homo estas pene lerninta lingvon kaj poste profitas de ĝi.

d) La angla kaj ni

„En la [UK] de Ateno okazis jene: [...] nian aŭtobuson eniris [neesperanta] profesia grekino-gvidistino. La kompatindulino kuraĝis komenci paroli en la angla salutvortojn, sed ŝin silentigis protestoj de la ekskursantoj.“

(Jouko Lindstedt ⁵⁶²)

La angla estas la nuntempa ĉefa lingvo en internaciaj kontaktoj. Atentigi pri problemoj aperantaj kiam oni uzas etnan lingvon por internacia komunikado ne estas principe rifuzende, sed esperantistoj ne kredu ke problemoj aŭtomate forestus se oni uzus esperanton anstataŭ la anglan. ⁵⁶³ Cetere, oni havu „respekton ne nur al minoritatoj“ (Bernard Golden) ⁵⁶⁴, kaj ne polemiku kontraŭ la angla lingvo aŭ „usona ĵargono“, kio facile fariĝas implicita polemiko kontraŭ ĝiaj parolantoj.

Lee Chong-Yeong, tiam UEA-prezidanto, ŝajne ĝojis kiam la rusa prezidento Jelcin anoncis malpermesi la anglan en reklamado kaj kiam la nova, Ĉinio-dependa registaro de Honkongo anoncis malpermesi la anglan ekde la duagrada grada mezlerneja nivelo – jen „la oportunoj por Esperanto“, laŭ la koreo Lee. ⁵⁶⁵ Pro sia malsimpatio al la angla kaj pro sia optimismo, ke agadoj kontraŭ ĝi efikus pozitive por esperanto, li pretervidis ke ekzemple la ĉina registaro eble intencas tiel malhelpi ekster-ĉiniajn kontaktojn. Homo kiu vere volas subteni internacian komunikadon devus do malĝoji pro la anoncita malpermeso. Simile kelkaj esperantistoj ŝatis la Malvarman Militon, per kiu oni povis aserti ke la angla „ne venkis“ kaj ke Sovetunio neniam akceptos la anglan – dum jam antaŭ 1989 la angla estis la plej ofta lerneja fremdlingvo ĉe junaj rusoj. Ili tiel havis eĉ avantaĝon kompare al la popoloj subpremataj de Sovetunio, ĉar junaj litovoj, hungaroj, orientgermanoj k.t.p. devis lerni unue la rusan.

Parte la negativaj sentoj de esperantistoj kontraŭ la angla estas klarigeblaj el tipe maldekstra pozicio, ĉar la angla estas asociata kun Britio kaj Usono kiel „kapitalismaj“ kaj „imperialismaj“ landoj. Ŝajne tute serioze la esperantisto Liland Brajant Ros' demonstraciis en Seattle per la sloganafiŝoj: „Rifuzu la anglan! Ne uzu la anglan! (en internaciaj komerco kaj komunikado)“ kaj „Esperanto / internacia lingvo / Oponu anglan hegemonion“, ⁵⁶⁶ okaze de la konferenco de Monda Organizaĵo pri Komerco (WTO) en 1999. La brutala

lingva imperialismo de Sovetunio, ekz. en Kaŭkazio kaj Baltio, kompreneble neniam pensigis tiajn okcidentajn maldekstrulojn, simile kiel multaj el ili protestis arde kontraŭ la usonaj, sed ne same kontraŭ la sovetiaj atomarmiloj.

Pluraj esperantistoj ŝatas cetere troigi la diferencojn inter la diverslandaj variantoj de la angla. Fighiera asertas eĉ ke koreo kaj svedo interkompreniĝas en esperanto pli facile ol brito kaj usonano en la angla! ⁵⁶⁷ Kvankam la diferencoj inter la variantoj estas sufiĉe ĝenaj, se oni kutimiĝis al nur unu el ili, angleparolantoj en Aŭstralio, Britio, Usono k.t.p. komprenas sin kiel la parolantoj de la sama lingvo. ⁵⁶⁸

Aliflanke esperantistoj ofte emfazas ke la angla ĝuste ne vere konkeris la mondon, ke iu lando aŭ sur iu kontinento estas malfacile trovi (iom bonajn) parolantojn de la angla. Kaj foje oni asertas informade ke eble la propra nacio emas uzi la anglan, sed ke en aliaj landoj tio malas; per tio oni ŝovas la argumentadon al eksterlando, esperante ke la interesato ne povos kontroli la asertojn. Flandra esperantisto diris al ĵurnalisto ke eble la flandroj pretas akcepti la anglan kiel tutmondan komunikilon, sed ke „la germanoj“ kaj „la francoj“ tion rifuzas, „pro ŝovinismo“. ⁵⁶⁹ Tia argumentado estas des pli riproĉinda, ĉar nia informadanto ne hezitas insulti tutajn popolojn por subteni sian propagandon – ĉu aganto por internacia amikeco konduitu tiel? Kaj ĉu objektiva observanto vere konstatus ke Francio kaj Germanio estas pli „ŝovinismaj“ ol Flandrio?

Foje leviĝas en Esperantio – kaj ne nur tie – la riproĉo ke la angla detruas aliajn lingvojn aŭ almenaŭ infiltras ilin per anglaj vortoj. Tiu fenomeno ne estas limigita al la angla. Estas ne malkutime ke objektoj kiuj venas el alia lingvoregiono estas nomataj per la originaj vortoj. La esprimo „infiltr“ evidente estas malĝuste elektita, pli trafas „transpreni“, ĉar la ago ja eliras de la parolantoj de la alia lingvo. Se oni trovas tiun transprenadon kritikinda, tiam do pli justas riproĉi al la rusoj, danoj, italoj k.t.p. ol al la usonanoj.

Kaj kiel la angla, tiel ankaŭ esperanto influas ekz. la germanan de esperantistoj, precipe kiam ili parolas pri tipe esperantistaj temoj. Ankaŭ ne konante la germanan, la leganto certe komprenos iomete pri kio temas en tiuj ĉi frazoj, kiuj povus aŭdiĝi dum kunsido de la IS-teamo: *Da hat ein estrarano von TEJO geschrieben, daß er einen kontribuo für den internacia vespero oder das distra programo hat. Gibt's dafür 'n rabato? Sein aliĝilo und die antaŭpago haben wir. Dann beträgt seine kotizo als memzorganto und B-*

landano noch 50 Euro. Tia influo montras ke esperanto estas pli normala ol la plej multaj esperantlingvanoj kredas.

5. Resumo de lingvo sen mitoj

En la lingvistiko de la 19a jarcento esperanto ne trovis sian lokon, kio eble iom klarigas la longtempan kontraŭon de esperantistoj al tiu scienca fako. Nuntempe, post plua pluralismiĝo de skoloj kaj disciplinoj, tiu kontraŭo pro bazaj lingvistikaj dogmoj ne plu ekzistas ĝenerale.

Laŭ tradicia morfologia divido esperanto apartenas al la aglutinaj lingvoj. La vortradikoj originas ĉefe el latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj kaj estas asimilitaj al la fonologia-ortografia sistemo de esperanto. Pro la orientiĝo je eŭropidaj lingvoj kaj pro la fakto ke la plej multaj parolantoj loĝas en Eŭropo ĝi estas eŭropa lingvo.

Oni ĉiam rezistu la tenton priskribi esperanton kiel pli-malpli perfektan lingvon. Nur certaj terenoj de lingvo estas konstrueblaj „regule“. Esperanto estas ne „logika“ kaj ĝia gramatiko jes havas esceptojn kaj pli ol 16 regulojn. Danĝeras fari tro kuraĝajn profetaĵojn pri la tempo por ellerni esperanton. Ĉar ni esperantistoj emfazadas la facilecon de esperanto, tial ni ofte ne konscias ke lerni novan lingvon estas sufiĉe alta ŝtupo al la enirejo de Esperantio.

Malbonan impreson cetere donas la mallerta prezento de la pozicio de esperanto inter aliaj lingvoj („esperanto volas forigi la lingvo-kaoson“) kaj la atakoj kontraŭ la angla. Jam estis aludita la kreo de pozitivaj antaŭjuĝoj por plivalorigi grupon. Nomante sian lingvon lingvo de paco, de racia kaj justa komunikado k.t.p., esperantistoj sin mem filaŭdas kaj emfazas sian grupan superecon je aliaj grupoj. Al tio apartenas ankaŭ la polemiko kontraŭ aliaj lingvoj kaj la scipovoj pri ili. Tio helpas al esperantistoj enfermi sin en sian komunumon, sed ne precipe al la gajnado de novaj parolantoj.

Oni menciuj informade ankaŭ esperantan literaturon, zorge elektante kiujn librojn oni menciuj al kiu publiko.

Literaturo:

Al lingva demokratio, 1998;

Barandovská-Frank: Enkonduka lernolibro de interlingvistiko, 1995;

Bausani: Geheim- und Universalsprachen, 1970;
Blanke: Esperanto und Wissenschaft, 1986;
Blanke: Internationale Plansprachen, 1985;
Bormann, W.: Die Hamburger Interlinguistik-Vorlesung, 1995;
Couturat / Leau: Histoire de la langue universelle, 1903/07;
Drezen: Historio de la mondlingvo, 1991 [1931];
Interlinguistics, 1989;
Manders: Interlingvistiko kaj Esperantologio, 1950;
Manders: Vijf kunstalen, 1947;
Plansprachen, eld. R. Haupenthal, 1976;
Stojan: Bibliografio de internacia lingvo, 1929;
Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, 1989 [1978];
Wüster: Internationale Sprachnormung, 1970 [1931].

Couturat / Leau (1903/07) estis dum longa tempo la klasika verko pri „universalaj lingvoj“ kaj enhavas multegajn projektojn kun priskriboj. Wüster (1970) el 1931 temas pri lingvonormigo en la tekniko, sed la juna esperantisto uzis ĉ. trionon el la libro por planlingvoj. Drezen (1991) el la sama jaro estu konsultata nur en la kvara eldono kun la komentoj de Kuznecov, kiu avertas apendice ke la libro de Drezen „estas ne nur klasika verko pri la evoluo de internacilingva ideo kaj internacilingvaj projektoj – samtempe ĝi estas kolekto de evidentaj aŭ kaŝitaj eraroj, kiuj ankaŭ fariĝis 'klasikaj', tradicie ripetuloj“ de preskaŭ ĉiuj aliaj aŭtoroj post Drezen. ⁵⁷⁰ Trezoro precipe pri la malnova literaturo estas la Stojan-a (1929) bibliografio, sed ankaŭ ĝin uzu singarde.

Post la dua mondmilito sekvis pliaj komparaj verkoj pri planlingvoj. La disertacio de Manders (1947), eble ĉar ĝi estas en la nederlanda, eble ĉar la objektiveca vidpunkto de la aŭtoro ne kontentigis certajn esperantistojn, ne

trovis la eĥon kiun ĝi meritas. Al la esperantistoj tiutempaj multe malplaĉis la titolo, kiu (la verko mem jes) ne sufiĉe distingas inter lingvo uzata kaj projekto apenaŭ iam uzita. Manders (1950) skeptikis pri la troigaj asertoj de „ŝovinismaj esperantistoj“ kaj postulas interlingvistikan esploradon kiu estas sufiĉe kvalita por esti akceptita ankaŭ de neesperantistoj: „Kaj se la konkludoj [de sen-antaŭjuĝa esplorado] montriĝus malfavoraj por Esperanto? Ĉu tio estus granda malfeliĉo? Evidente ne. Estas pli bone scii la veron ol penadi por iluzio.“ ⁵⁷¹

Blanke (1985) povas esti nomata la nuntempa norma verko pri planlingvoj. Malsame ol Couturat / Leau (1903/07) tiu libro ne troŝargiĝas pro la detala mencio de laŭeble ĉiu projekto el la pasintaj jarcentoj. Male, Blanke pli detale priskribas plurajn gravajn projektojn kaj metas ilin en la planlingvistikan kuntekston. Kvankam la germana estas pli uzata ol la nederlanda, ankaŭ la libro de Blanke suferas pro la dilemo ke, unuflanke, nur nacilingva verko estas legebla por neesperantaj lingvistoj, sed ke, aliflanke, nur esperantaĵoj povas profunde enpenetri Esperanton. Tio bonŝance multe malpli validas por la anglalingva *Interlinguistics* (1989). Ĝi estas tre interesa kolekto de artikoloj de pluraj aŭtoroj, ĉefe pri esperanto kiel sola vere uzata planlingvo. Interlingvistikon (kaj ne unuopajn planlingvojn, malgraŭ la titolo) pritraktas ankaŭ *Plansprachen* (1976, eld. Reinhard Haupenthal), kun kontribuoj de ekz. Jespersen, Trubeckoj kaj Mangold. Malpli dikas la enkondukoj de Blanke (1986) kaj W. Bormann (1995). Wells (1989) estas bonega enkonduko (ankaŭ) por nelingvistoj, pri esperanto el lingvosciencia vidpunkto. Salutindas ankaŭ Barandovská-Frank (1995), lernolibro „por ĉiuj, kiuj volas pri interlingvistiko aŭ koncize informiĝi, aŭ poste profunde studi ĝin“ (el la antaŭparolo).

Al lingva demokratio (1998) kolektas la kontribuojn al „Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj“, okazinta kadre de la UK 1996 en Prago. Fakte venis nur tre malmultaj el la invititaj lingvistoj (ĉefe personaj amikoj de la esperantaj organizantoj), kaj Blanke bedaŭris ke „tiu ege interesa seminario“ fariĝis „iom pli kaj pli propaganda kunveno por Esperanto“. La libro reprezentas kelkajn esperantajn kaj neesperantajn ideojn pri lingvopolitiko kaj esperanto.

VI. Planlingvoj sen mitoj

„Kiu ne konas fremdajn lingvojn, tiu scias nenion pri sia propra.“

(Johann Wolfgang Goethe)

Planlingvoj estas nur margena temo en informado, ĉar unuflanke ni esperantistoj deziras informi unuavice pri nia propra lingvo, kaj aliflanke ankaŭ la interesatoj ne volas scii tro multe pri projektoj apenaŭ uzitaj. Tamen foje interesatoj jam aŭdis ion pri aliaj projektoj kaj havas demandojn, kaj esperanto-informanto estu preparita kiam kundiskutas la proponantoj de aliaj planlingvoj.

Bedaŭrinde pluraj informiloj pritraktas aliajn projektojn desupre kaj krude polemikumas – laŭ la devizo ke esperanto ja ĉiukaze estas pli bona ol tiuj frenezaĵoj. Ankaŭ Piron primokis Interlingua-n kaj Idon kaj ne distingis ilin, kiuj estis almenaŭ iom uzataj, de la apenaŭ aplikitaj Novial kaj Neo. Tiuj projektoj estas laŭ li proponataj de „adeptoj de jam matura aĝo“, ⁵⁷² sed tio ja ne aŭtomate diskvalifikas la projektojn mem – esperinde, ĉar ankaŭ multaj esperanto-adeptoj, inkluzive Piron mem, estas de jam sufiĉe matura aĝo. Oni ekhavas la ĝeneralan impreson ke esperantistoj parolas pri aliaj planlingvoj tiom desupre kiom neesperantistoj parolas pri esperanto, ke la esperantistoj pludonas la batojn kiujn ili mem ricevas. Ridas blindulo pri lamulo.

Ĝenerale, kiam oni volas pritrakti en informado aliajn projektojn, oni provu ne tro polemiki pri ili. Kelkaj el ili meritas respekton, kaj montri tian bazan respekton faras nian informadon pli kredinda.

1. Interlingvistiko kaj esperantologio

La terminon *interlingvistiko* enkondukis la dana lingvisto Otto Jespersen en 1931. Laŭ li oni devas en tiu scienco plu pristudi la jam ekzistantan lingvaron por pli bone povi konstrui planlingvon.⁵⁷³ Lia bazo estis la konvinko ke neniu el la jam aperintaj planlingvaj projektoj prezentas tute kontentigan solvon.

Tiu koncepto ne restis la sola. Willem Manders sekvis ĝin plejparte sed emfazis ke oni atentu ankaŭ la praktikan „aplikon“ de esperanto. Artur Bormann opiniis ke eĉ tio estas ankoraŭ tro limigita. Interlingvistiko devas okupiĝi ne nur pri lingv(istik)aj, sed ankaŭ pri ĝeneralaj politikaj, kulturaj kaj sociologiaj demandoj de tiu ampleksa temo – kaj ne nur ĝis la solvo de tiu supre menciita tasko, sed daŭre. Szerdahelyi eĉ plu pligrandigis la terenon de tiu fako. Laŭ li interlingvisto pristudu la strukturon kaj bazajn ideojn de lingvoj kaj projektoj kiuj rilatas al la problemo de „ĝenerala komuna lingvo“, la koncernajn sociajn kondiĉojn, kaj profunde esperanton.⁵⁷⁴ Wüster, Manders k.a. devis ankoraŭ okupiĝi pri aliaj planlingvaj projektoj. Sed pro la esenca malforteco de la konkurencaj planlingvaj komunumoj tio ĉesis, kaj la esperantaj lingvistoj ekde la 1970aj jaroj multe malpli bezonis komparadi inter esperanto kaj Ido aŭ Interlingua. Tio fakte relimigis la agad-terenon.

Jena difino de Blanke sumigas la supre menciitajn celojn de esperantistaj interlingvistoj:

- „1. Esploro de la problemoj de konstruo, historio kaj funkcio de planlingvoj (planlingvistiko)
2. Esploro de la problemoj de la internacia lingva komunikado
3. Esploro de la rilatoj inter la lingvoj (lingvokontaktoj)“.⁵⁷⁵

Nur kelkaj unuopaj neesperantaj lingvistoj nomas sin interlingvistoj. Ili ofte estas socilingvistoj kaj interesiĝas nur pri la punktoj 2 kaj 3. En informado la termino interlingvistiko estas uzebla kun klarigo, nome ke ĝi pristudas internacian komunikadon kaj sekve ankaŭ planlingvojn.

Esperantologio estas la filologio de esperanto. Tio estas ne nur esplorado pri

lingvo, sed ankaŭ pri ties parolantoj, pri la esperanto-movado, la historio de la komunika komunumo, esperanto-literaturo. Krome ankaŭ aliaj planlingvoj, pro la influoj de la volapuk-movado kaj la Ido-krizo, laŭ mi estu pritraktataj de la esperantologio. Al interlingvistiko la esperantologio estas ligata ĉar esperanto estas planlingvo kaj parolata esence kiel fremda lingvo kaj en internaciaj rondoj.

Seriozajn studojn pri esperanto oni povas fari nur kun scipovo de esperanto, ĉar la plej multaj verkoj pri ĝi haveblas nur en tiu lingvo.⁵⁷⁶ Tio estas problemo por neesperantistoj, aŭ pli ĝuste: por la *esperantistoj*, kies fakan literaturon alilingvanoj ne povas legi. Ke tio validas ankaŭ por aliaj filologioj – japanologo devas scipovi la japanan, ugristo la hungaran, slavisto slavajn lingvojn – ne konsolu nin. Tamen ni rajtas postuli ke lingvistoj, kiuj volas eldiri ion gravan pri esperanto, konsideru ankaŭ la esperantlingvan literaturon.

a) Planlingvaj projektoj en superrigardo

De mortuis nil nisi bene.

(Pri mortintoj parolu nur bone, latina proverbo)

Foje esperantistoj intencas plilongigi nian historion per aliaj projektoj de nova lingvo por pli bona interetna komunikado. Støp-Bowitz k.a. konvinkiĝis eĉ ke „ĉiam la homoj revis pri universala lingvo“.⁵⁷⁷ Tio estas ebla, sed ĝis nun mankas taŭgaj indikoj por planlingva projekto antaŭ la 17a/18a jarcentoj. A. Bormann menciis la egiptan reĝon Psametiĥ kaj la Biblian profeton Cefanja,⁵⁷⁸ sed ili ne interesiĝis pri interetna komunikado. La mezepokaj *Lingua Ignota* de Hildegardis de Bingen kaj la islama *Balaibalan* ne rilatis al internaciismaj celoj.⁵⁷⁹ Auld prezentis la *Lingua Ignota* eĉ kvazaŭ ĝi estus unu el pli multaj ekzemploj.⁵⁸⁰

Ŝajne nur filozofoj el la 17a jarcento ekpensis pri internacia komunikado, i.a. René Descartes, Gottfried Wilhelm Leibniz kaj Jan Amos Komensky (Comenius). Komensky faris eĉ planojn pri kreota lingvo. Tial la volapukisto Leopold Einstein kaj poste la esperantisto Drezen parolis pri „tri jarcentoj da serĉado“. Tamen, ankaŭ tiuj filozofoj revis ĉefe pri ideala lingvo kiu priskribas la mondon logike.

Verŝajne nur en 1732 publikiĝis la unua aposteriora projekto resp. skemo de

projekto, bazita sur etna lingvo. La aŭtoro restis anonima malantaŭ la pseŭdonimo Carpophorophilus.⁵⁸¹ Kuznecov supozis ke la aŭtoro identas al David Solbrig, kiu laŭ Drezen kreis *Allgemeine Schrift* (Universala Skribo, Coburg 1736).⁵⁸² La komenco de la Patro Nia en la projekto de Carpophorophilus: *O baderus noderus, ki du esso in seluma, faldade sankadus ha nominanda duus, adfenade, ha rennanda duus, ha folanda duus fiassade felud in seluma, sik koke in derra.*⁵⁸³

En la 19a jarcento publikiĝis pli kaj pli da tiaj projektoj, inter ili volapuko en 1879/80 kaj esperanto en 1887. Tiuj du projektoj estis la unuaj kaj solaj, kiuj trovadis parolantojn el propra forto. Pro diversaj kialoj la esperanto-komunumo sukcesis, kvankam volapuko estis en 1887 je la kulmino de sia historio. Esperanto poste neniam perdis, kaj verŝajne ne perdos, sian elstaran pozicion inter aliaj projektoj. Duliĉenko trovis sciigojn pri entute 912 projektoj ĝis la jaro 1973. Nur de 780 li havis iom detalajn priskribojn. Ĉirkaŭ sescent, do du trionoj, aperis post esperanto.⁵⁸⁴ Preskaŭ ĉiuj el ili estis esperanto-rilataj reformprovoj aŭ kontraŭmodeloj.

Se iu homo verkis kelkajn paĝojn aŭ eĉ dikan libron pri nova planlingvo, tiam ankoraŭ ne estiĝis nova lingvo, sed nur nova *planlingvo-projekto*.⁵⁸⁵ Kiam la projekto estas jam uzata en kelkaj sferoj (eta korespondado, gazeto, kongresetoj, organizaĵetoj), tiam oni povas nomi ĝin *duonplanlingvo*. Nur projekton vere amplekse uzatan, havantan organizaĵojn, mondkongresojn, plurajn gazetojn, literaturon, denaskajn parolantojn k.t.p., oni nomu *planlingvo*.⁵⁸⁶

Blanke montris en tabelo „ŝtupoj[n] de la praktika apliko de planlingvoj resp. planlingvaj projektoj“. Multegaj projektoj atingas nur la unuan ŝtupon: publikigo de la sistemo. En la projektoj Ro kaj Medial „la aŭtoro eldonas etan gazeton en la sistemo“. Idiom Neutral, Novial kaj Neo atingas la trian kaj kvaran ŝtupojn, t.e. relative multa varbado kaj etaj organizaĵoj. La duonplanlingvoj Latino sine flexione kaj BASIC English ĉesis je la ŝtupo „ioma aplikiĝo por fakaj bezonoj (scienco kaj tekniko)“. Volapuko, Occidental-Interlingue kaj Interlingua laŭ Blanke ne transiris la ŝtupon „ioma internacia parola aplikiĝo“. La planlingvo esperanto estas eĉ iom aplikata kiel familia lingvo kun dulingvismo de la infanoj.⁵⁸⁷ Kontaktadresojn mi havas nur de Volapuko, Ido kaj Interlingua, ili ŝajnas esti la lastaj ankoraŭ uzataj duonplanlingvoj.

b) Aŭtoroj de planlingvaj projektoj

Bernard Golden distingis inter kvin tipoj de aŭtoroj de planlingvaj projektoj. *Lingvistoj kaj filologoj* estis maloftaj: nur Otto Jespersen kaj Alexander Gode kreis konatajn projektojn. *Aliaj sciencistoj* estis ekz. la matematikisto Guiseppe Peano, iniciatinto de Latino sine flexione en 1903, kaj la ĉefa aŭtoro de Ido, la logikisto Louis Couturat. *Ano de kleraj profesioj* estis krom la kuracisto Zamenhof ankaŭ la prelado Johann Martin Schleyer. *Laikoj* ne havis superan instruiĝon, sed praktikajn lingvokonojn. La plej granda grupo estas la *naivuloj*. Ili ne posedis lingvo-teoriajn konojn; tre ofte ili reformis aliajn projektojn. ⁵⁸⁸

Se oni volas konservi tiun sociologian, laŭprofesian dividon, mi proponas meti la sciencistojn kaj anojn de kleraj profesioj en unu grupon, ĉar ambaŭ ne estas fakuloj pri lingvoj, sed konatiĝis almenaŭ dum la studado kun sciencaj labormetodoj. Ankaŭ la laikoj kaj naivuloj povas formi unu grupon. Tio donas al ni la tri kategoriojn: *lingvistoj*, *aliaj kleruloj*, *aliaj homoj*. Sed tiu sociologia divido ne trafas tion kio interesas nin. Oni prefere juĝu la aŭtorojn laŭ la proponata projekto kaj la maniero prezenti ĝin. Tiam eblas jena divido: *lingvistikaj* (fakul-nivelaj), *sufiĉe bone pripensitaj* kaj *naivaj-diletantaj* projektoj kaj prezentoj. Ekzemplo de lingvistika projekto estas Novial de Jespersen. Zamenhof publikigis sufiĉe bone pripensitan projekton, kvankam la prezento povas esti pli forte kritikata.

Tipa „naiva-diletanta“ aŭtoro estas Rolf Riehm, kiu en 1989 publikigis sub la pseŭdonimo Mario Pleyer la projekton Unitario. La heslanda inĝeniero (nask. 1944) iam konatiĝis kun esperanto, sed ne ellernis ĝin: esperanto ne plaĉis al li, kaj pri ĝia malgranda disvastiĝo kulpas – laŭ li – ĝiaj lingvaj malperfektaĵoj. Tial li inventis reformitan esperanton, Unitarion, kiu en Esperantio konatiĝis ĉefe pro reagoj en nia gazetararo, kvankam la aŭtoro elspezis por sia germanlingva Unitario-libro pli ol 5.000 eŭrojn, krome aldoniĝis kostoj por multego da presaĵoj, leteroj, flugfolioj. ⁵⁸⁹ Ulrich Matthias siatempe senpolemike priskribis Unitarion kaj raportis pri vizito de ĝia sola propagandanto, Riehm mem, al la esperanto-grupo de Heidelberg. Kvankam la dek kvar ĉeestantoj antaŭe sciis nenion pri Unitario, ili daŭre trovis erarojn:

„La vorto *illustration* devas esti *illustratsioon*“, Riehm mem konfesas menciante la eraron, kiun li jam korektis sur la disdonitaj kopioj.

'Sed sur la alia kopio (...) vi skribis ĝin per nur unu „l“!, iu rimarkigas.

'Jes, devas esti *ilustratsion*', kun nur unu „l“...'

'Kial vi skribis *cara senjorina*, dum la adjektivo finiĝas per „-e“?'

'Jes, devas esti *care senjorina* ...'

[...] Riehm konfesas, ke li ne vere parolas Unitarion. La lingvo ankoraŭ ne estas preta: 'La libro ja nomiĝas nur ' *Projekto* de universala lingvo', li emfazas. (...) 'Mi venis ĉi tien por klarigi tiun projekton al vi, kaj ne por konvinki vin pri tio, ke Unitario estas pli bona. Tion mi ne povas...'“ ⁵⁹⁰

Unitario trovas ĉi tie konsideron ne pro ia graveco sed por ilustritipe naivan projekton, kiu ne estas serioza konkurenco sed kontribuas al la malbona reputacio de planlingvoj ĝenerale.

Kiujn motivojn havis la proponantoj de planlingvaj projektoj? Multaj deziris lingvon por la faciligo de internacia komunikado uzatan apud la jam ekzistantaj (naciaj) lingvoj. Krom tio ekzistas i.a. jenaj motivoj:

- *Filozofiaj*: precipe la filozofoj el la 17a jarcento cerbumis pri „perfekta lingvo“, pri lingva reprezentado de la ideoj pli logika kaj racia ol en la naciaj lingvoj. Sed foje ankaŭ adeptoj de aposterioraj projektoj kredas ke ilia projekto estas „lingvo perfekta“.
- *Kompreniĝo inter la popoloj*: Zamenhof ne strebis al iu „ideala lingvo“. Lia motivo estis helpi al paco inter diverslingvuloj.
- *Lingvopolitiko*: La solvo de la „monda lingvo-problemo“ aŭ la provo protekti lingvajajn rajtojn aŭ minoritatajn lingvojn rilatas al lingvopolitiko.
- *Naciismo / ŝovinismo*: pluraj kreantoj kaj proponantoj de diversaj modifitaj etnaj lingvoj havis naciismajn motivojn.
- *Profesia / hobia interesiĝo pri lingvoj*: por lingvistoj kaj nefakuloj la okupiĝo pri planlingvoj povas esti kleriga kaj / aŭ amuza. ⁵⁹¹ Ankaŭ la literaturaj planlingvoj trovas sian lokon ĉi tie, do ekzemple *Newspeak* de Orwell aŭ la lingvoj en la fantaziaj regnoj de Tolkien.

Pri la rolo de proponanto de projekto nuntempe verŝajne la plej multaj konsentas

ke Zamenhof prave ne prezentis sin kiel „ĉefon“, ĉu lingve, ĉu organize, kvankam li precipe en la komenca periodo tamen transprenis la rolon de motoro. Li ekkonsciis ke oni ne povas simple publikigi projekton kaj atendi ĝis dek milionoj da homoj promesas lerni la lingvon. Sed planlingvo riskas „fariĝi viktimo de la subjektiveco de sia aŭtoro“.⁵⁹² Projekto mem povas esti ankaŭ verko de nur unu homo, sed la praktikado de lingvo bezonas multajn homojn. Zamenhof havis instinkte ĝustajn ideojn, verŝajne ĉar li eliris rekte de la deziro komuniki. Cetere Zamenhof komprenis ke lingvo devas esti taŭga por ĉiu, ne nur por intelektuloj, kaj ne nur por sciencaj sobraj temoj, sed ankaŭ por beletro kaj kulturo. Manders agnoskis ke Zamenhof „havis rimarkindan intuicion pri lingvistikaj problemoj“ kaj ke „multaj el liaj asertoj kaj antaŭdiroj poste montriĝis pravaj.“⁵⁹³

2. Aprioraj planlingvaj projektoj

Interlingvistiko tradicie distingas inter „aposterioraj“ projektoj, kiel volapuko kaj esperanto, konstruitaj *posteriori* laŭ jam ekzistantaj etnaj lingvoj, kaj „aprioraj“ projektoj,⁵⁹⁴ kiuj ne havas intencitan similecon kun etnaj lingvoj. Ili plej ofte estas provoj de logika sistemo kiu klasifiku la tutan mondon. Unu el ili estis elpensita de la angla episkopo John Wilkins (1614-1672) kaj publikigita en 1668. Lia projekto havas 40 klasojn, interalie *Da* „mondo“, *De* „elemento“, *Di* „ŝtonaĵo“, *Do* „metalo“. Subgrupoj estas formitaj per la aldono de plia litero: *De* „elemento“, *Deb* „fajro“, *Ded* „aero“ k.t.p. Per plia vokalo oni esprimas pliajn aferojn: *Deb* „fajro“, *Deba* (kun alfa kiel fina litero) „flamo“, *Deba* „kometo“, *Debo* „brilo“ k.t.p. La problemo pri tiuj projektoj estas ke ili apenaŭ taŭgas por buŝa aktiva komunikado, ĉar tre malfacilas enkapigi ilin. La klasifikoj devas resti iu-grade arbitraj. Kiam la konceptoj pri la mondo ŝanĝiĝas, ekzemple pro progreso de la scienco, tiam la sistemo eventuale bezonas fundamentan ŝanĝon.⁵⁹⁵

Aliaj aprioraj projektoj estas malpli koheraj, kiel ekz. *Solresol* de Jean Sudre. Ĝiaj sep bazaj elementoj povas esti esprimataj per literoj, per arabaj ciferoj, per koloroj aŭ la muzika notsistemo. En 1866, kvar jarojn post la morto de la aŭtoro, publikiĝis plena lernolibro de *Solresol*. La projekto trovis iom da atento ĉe la publiko kaj eĉ fojan aplikon.⁵⁹⁶ Drezen trovis *Solresol* („jam parola lingvo“) pli simpla ol la pli malnovaj aprioraj projektoj, sed ĝia malavantaĝo estas ke ĝi estas ne pli facila sed pli malfacila ol iu el la naciaj lingvoj: „En ĝia praktikado ofte sin montris malordiĝoj kaj malregulaĵoj.“⁵⁹⁷ La plej fruaj al ni konataj projektoj estas aprioraj. Tamen, ankoraŭ nuntempe foje oni publikigas novan. Pli gravaj por la historio de la planlingvoj estas tiuj projektoj, kiuj celis fariĝi vere paroleblaj lingvoj por la homa komunikado.

3. Latinidaj projektoj kaj modifitaj etnaj projektoj

La proponintoj de latinidaj projektoj orientiĝis je la latina kaj la latinidaj (romanaj) lingvoj franca, itala, portugala kaj hispana. Pruntojn el aliaj lingvogrupoj ili rifuzis, ekzemple la esperantajn vortojn *hundo*, kiu venas el la germana, kaj *kolbaso*, el la pola. Ofte malfacilas distingi inter la latinidaj kaj tiuj projektoj, kiu rekte baziĝas sur la latina. La latinidaj projektoj tendence tre similas unu al la alia kaj povas esti relative bone komprenataj ankaŭ de nelernintoj, kiuj jam konas kelkajn latinidajn lingvojn. Kutime oni nomas tiujn ĉi projektojn „naturalismaj“, kvankam orientiĝi nur je latinidaj lingvoj ja ne pli „naturas“ ol orientiĝi je aliaj.

Permodifikita etna projekto oni celas plifaciligi etnan lingvon. Ekzemploj estas *Weltdeutsch* (1915) de A. Baumann kaj *BASIC English* (1930) de Charles Kay Ogden. ⁵⁹⁸

a) Interlingua

Interlingua, kvankam prezentita jam en 1950, estas la plej nova ankoraŭ iom uzata duonplanlingvo. Ĝi estas samtempe la plej latinidisma. La nomo eble kondukas al konfuzoj: *Latino sine flexione* (1903) de Giuseppe Peano iam ricevis la saman nomon *Interlingua*, kaj *Occidental* (1922) de Edgar von Wahl eknomiĝis poste *Interlingue*. Kiel Ido naskiĝis en la sino de la Delegacio, tiel ankaŭ Interlingua de la lingvisto Alexander Gode havas rilaton al institucio, nome al IALA (vd. [tie](#)). Post kiam multaj kunlaborintoj estis forlasintaj tiun asocion, Gode havis liberan vojon por prezenti sian Interlingua en 1951 nome de la asocio, kvankam la empiriaj esploroj de IALA el la 1920aj kaj 1930aj jaroj ne estis uzitaj por tiu projekto. ⁵⁹⁹

Interlingua baziĝas sur la Sapir-Whorf-tezo, laŭ kiu ne ekzistas iu universala skemo absoluta por ĉiuj lingvoj de la mondo. Tial oni devas elekti unu lingvogrupon, prefere la eŭropan, ĉar la moderneco de la nuna mondo estas okcidenteŭropa. El la angla, franca, germana kaj aliaj eŭropaj lingvoj oni povas do ĉerpi *Standard Average European*, kiel bazon por planlingvo, laŭ la tezo.

Tiu Sapir-Whorf-tezo havas por esperanto-informado iom ambiguajn implikojn. Unuflanke oni rifuzas ĝin ĉar laŭ ĝi esperanto ne povas esti vere universala, aliflanke oni adoptas la kredon ke ĉiu lingvo havas propran mondokoncepton. El tio ekzemple la Praga Manifesto konkludas ke ĉiu lingvo estas protektinda – pere de esperanto, kompreneble.

Ekzemplaj Interlingua-frazoj: [601](#)

Il tauro es un patre. Ille es un bon patre. Ille ama su infantes.	La virbovo estas patro. Li estas bona patro. Li amas siajn infanojn.
Le vacca es un matre. Illa es un bon matre. Illa ama su infantes.	La bovino estas patrino. Ŝi estas bona patrino. Ŝi amas siajn infanojn.

En 1957 fondiĝis *Union Mundial pro Interlingua* (UMI) kun servoj iom similaj al tiuj de UEA. Ĝia oficiala revuo estas *Panorama in Interlingua*, krome aperas ses aliaj gazetoj kaj pluraj bultenoj. Barandovská-Frank skribis en 1995 ke UMI-kongresoj kunigas ĉ. cent delegitojn kaj ke la jarlibro havas ĉ. ducent adresojn.

[602](#) La kongreson de 1989 vizitis la esperantistoj Arjen-Sjoerd de Vries kaj Roel Haveman, kie ĉ. kvardek homoj el pluraj landoj „vigle interparolis en sia lingvo“.^{[603](#)}

b) BASIC English

La oksforda sciencisto Charles Kay Ogden publikigis depost 1930 pri *BASIC English*; la mallongigo reprezentas *British American Scientific International Commercial*. Estiĝis beletra kaj scienca literaturoj kaj okazis kursoj. Winston Churchill en 1943 rekomendis subteni ĝin. Poste oni prezentis ĝin nur kiel metodon por plifaciligi la lernadon de la normala angla. Oni asertis ke ĝi havas nur 850 vortojn, ekskludante internaciajn vortojn (ekz. *automobile, police* k.t.p.), nombrojn, semajntagojn, mezurojn, proprajn nomojn kaj vortojn kunmetitajn. Aliajn vortojn BASIC English devas priskribi tiel:

angla	BASIC English
to descend	to come down / to go down
(„descendi“)	(„veni malsupren / iri malsupren“)
to participate	to take part

(„partopreni“)	(„partopreni“)
to wander	to go from place to place without aim
(„migradi, vagi“)	(„iri de loko al loko sen celo“)
angla originalo	BASIC English
Many years ago I contracted an intimacy with a Mr. William Legrand. He was of an ancient Huguenot family, and had once been wealthy...	Some years ago I had a friend, a Mr. William Legrand. He came of an old Huguenot family, and he had been well-off at one time...

Laŭ Detlev Blanke ankaŭ anglolingvano devas lerni uzi BASIC English, kaj ĝi ne estas esence pli „neŭtrala“ lingvo ol la normala angla; ⁶⁰⁴ pri tio lasta oni povus diskuti, ĉar en BASIC-konversacio la pozicio de nedenskulo pli fortas ol en normal-angla konversacio. Tiu ĉi projekto ne plu ludas ian rolon, nek kiel transnacia komunikilo, nek kiel plifaciligilo por lernado de la normala angla lingvo.

En 1947 GEA-prezidanto Siegfried Ziegler polemikis ĝenerale kontraŭ „basic-lingvoj“ kaj daŭrigis: „La 'basic'-germana, kies kreo estis jam ordonita de Hitler, por ke li havu por siaj 'koloni-popoloj' ankaŭ tuje koloni-lingvon [...], kompreneble ne povas ĉi tie esti konsiderata pro la tuta malvenko de la nacisocialisma Germanio.“ ⁶⁰⁵ Fonto pri tiu BASIC-germana de Hitler mankas. Eble ĝi rilatas al parkbenka interparolo de la svisa ĵurnalisto Hans Unger kun Rudolf Heß, en 1939. La altranga nacisocialisto sciigis al la esperantisto Unger „fantazian planon pri simpligita germana lingvo altrudota al tuteŭropa ŝtata federacio sub germana hegemonio“. ⁶⁰⁶ Tiu fantaziaĵo ŝajnas esti tute senbaza, ĉar ĝi ne kongruas kun nacisocialisma pensmaniero: subpremataj popoloj devas simple lerni la germanan, ĝis grado ke ili povas kompreni ordonojn de germana reganto. Heß supozeble nur fanfaronis aŭ ŝercis. Germanbazitaj „basic“-aĵoj pli malnovas ol nacisocialismo, kaj en 1947 neniu tia projekto konkurencis al esperanto. La vera atakcelo de Ziegler estis evidente BASIC English, kaj la aludon pri Hitler li misuzis nur por kalumnio proksimigi la projekton de Ogden al nacisocialismo.

4. Aŭtonomaj projektoj

La tiel nomataj aŭtonomaj projektoj orientiĝas je jam ekzistantaj etnaj lingvoj, sed al iliaj subtenantoj regula aŭ analogia konstruopiano pli gravas ol la imitado. Laŭ Blanke la regelsistemo de aŭtonomaj, aposterioraj projektoj „aranĝas la rilatojn inter funkcio kaj formo (aŭ inter signifo kaj nomigo) plej eble unusence kaj regule. Validas la baza regulo, laŭeble ĉiam uzi la saman morfologian rimedon por la sama funkcio.“ Ĉar plenkreskulo povas lerni kaj uzi regulajn morfologiajn strukturojn pli facile ol neregulajn, tial aŭtonoma projekto lerneblas „relative facile“, komparate „al etnaj lingvoj karakterizataj de neregulaĵoj“.⁶⁰⁷ Esperanto uzas preskaŭ nur etnodevenajn vortojn, sed en reguligitaj morfologio kaj prononco resp. skribmaniero. Tial esperanto apartenas, kiel ankaŭ Volapük kaj Ido, al la aŭtonomaj projektoj.⁶⁰⁸

a) Volapük, la monda lingvo

„[...] tiuj, kiuj [nuntempe] entreprenas esploron pri la historio, sociologio kaj lingvistiko de volapuko estas [...] esperantistoj! [...] Volapuko naskiĝis en 1879, apogeis en 1889, agoniis en la fruaj jaroj de la 20a jc., reenkarniĝis en 1931 kaj hodiaŭ, grizhara kaj centjara, ĝi spitas la abismon de forgeso.“

(Bernard Golden⁶⁰⁹)

La unua projekto, kiu allogis sufiĉe multajn subtenantojn por estigi movadon, estis *Volapük*, fondita de la badenlanda prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912).⁶¹⁰ Tiun ideon pri pliboniginda internacia komunikado li ekhavis en 1878, kiam najbaro rakontis al li, ke pro fuŝa skribo de la angla adreso letero al Usono estis neakceptita kaj resendita.⁶¹¹ Poste li asertis ke Dia alvoko dumsonĝe instigis lin krei la lingvon. En 1879 Schleyer unuafoje publikigis pri volapuko en katolika gazeto (*Sionsharfe* – harpo de Ciono), redaktita de li mem. Ellaborita la projekto estis tamen nur en 1880. Schleyer rezervis al si persone la ekskluzivan rajton ŝanĝi aŭ pliampleksigi la lingvon kaj deklaris: „Kie mi devojiĝis kaj ankoraŭ devojiĝos de [antaŭe prezentitaj] bazaj reguloj, tie mi havis kaj havos bonajn kialojn, ĉar klareco kaj nekonfuzebleco estas al mi pli altvaloraj ol ĉia rigida princip-obeismo k.s.“⁶¹² Tiu sinteno de la *Cifal* (ĉefo)

kontribuis al la perejo de volapuko, kiu venis tiel same rapide kiel la surpriza sukceso.

En volapuko kutimas altgradaj ali-formadoj de la fontaj vortoj, favore al pli facila prononcebleco. Kelkaj tipaj ekzemploj:

el la angla:	cil	child	infano
	nol	knowledge	scio
	plim	compliment	komplimento
	pük	to speak	paroli
	vol	world	mondo
	yel	year	jaro
el la germana:	bel	Berg	monto
	mud	Mund	buŝo
el la latina:	dol	dolor	doloro
	nim	animal	vivaĵo
el la franca:	bür	bureau	oficejo ⁶¹³

Volapük mem signifas do lingvo de la mondo, kun la centra *a* kiel genetivo. Eksvolapukisto Leopold Einstein, en la antaŭ- kaj postparoloj al la unua esperanto-lernolibro, plendis ke Schleyer jen formordis de angla vorto la kapon, jen eltiris la voston de franca, aŭ forhakis ambaŭ piedojn de germana vorto, eĉ forprenis ĝiajn internaĵojn aŭ ĝian cerbon. ⁶¹⁴ Schleyer oferis la sonon *r* al la „harplektaĵo-ĉinoj“ sur la „altaro de kosmopolita hom-amo“; sed, Einstein mokis, Schleyer tiam ankoraŭ ne sciis ke al la japanoj la *l* estas same malfacila kiel la *r* al la ĉinoj. ⁶¹⁵ (Fakte, ambaŭ popoloj havas sonon iel mezan inter *l* kaj *r*.)

La unuaj du volapuk-kongresoj okazis en 1884 kaj 1887 en la sudgermanaj urboj Friedrichshafen kaj Munkeno. Partoprenis proksimume 150-200 homoj, plejparte aŭstrianoj kaj germanoj, „kaj oni parolis ĉefe la germanan. Dum la tria kongreso en 1889 en Parizo oni parolis volapukon. Kvankam la lingvo funkciis, ĝiaj fonetikaj mankoj tre evidentiĝis“. ⁶¹⁶ Tiu kongreso estis jam la kulmino de volapuko, montriĝis disputoj, kaj dum la postaj jaroj la movado disiĝis. Provo de la nederlanda kuracisto Arie de Jong en 1931, „revivigi“ volapukon reformitan, restis sensukcesa.

La nombron de la volapukistoj oni povas, same kiel je esperanto, nur taksii.

Tradiciaj taksoj varias inter unu kaj 2,5 milionoj, sed certe eĉ nur duona miliono estas troigo. Leopold Einstein tuŝis la temon en esperanto-informilo de 1889. De la nombro de 150.000 volapuklingvanoj, kiun disvastigis la volupukistoj la antaŭan jaron, oni certe devus forstrecki kelkajn nulojn, laŭ Einstein. Li priskribis ke kvin monatojn antaŭe la asertita nombro kreskis al unu miliono, kaj ĵus antaŭ ol skribi ĉi informilon li ricevis sciigon pri tri milionoj.⁶¹⁷ Jam en 1900 la volapuk-adresaro menciis nur 159 personojn. Nombro de kvardek mil samideanoj por la plej bona tempo de volapuko estas do supozeble almenaŭ *pli* ĝusta takso.⁶¹⁸

La fiasko de volapuko plifaciligis la venkon de esperanto inter la konkurencaj planlingvaj projektoj, ankaŭ en Germanio, kie la volapuk-movado estis plej forta kaj kie landa esperanto-asocio fondiĝis nur en 1906.⁶¹⁹ Aliflanke la malsukceso de volapuko efikis malbone al la publika bildo, kaj amikoj de planlingvoj seniluziiĝis, kvankam la ideo mem pluvivis.⁶²⁰

Malgraŭ ĉio ĉi ni memoru ke Volapukio estis la bredejo aŭ lulilo de nia komunumo. Multaj gravaj esperanto-pioniroj estis eksvolapukistoj, ekzemple: Antoni Grabowski; Nikola Zlatek, kiu fondis la klubon de Veliko Tarnovo; Leopold Einstein; Emil Ludwig Meier, fondinto de la bavaria volapuk-movado; Vasilij Nikolajeviĉ Devjatnin; Mieczyslaw Czerwinski, redaktanto de *Pola Esperantisto*; Jean Borel, la fondinto de Svisa Esperantista Societo kaj la esperanto-grupo en Berlin; Siegfried Lederer, redaktanto de *Rund um die Welt – Zi vol Lolok*, poste de *Ĉirkaŭ la mondo*; Paul Nylen, la prezidanto de Sveda Esperanto-Societo; Hendrik Bulthuis; Gaston Moch; Eduard Mybs, la unua prezidanto de Germana Esperantista Societo; la frua esperantisto kaj posta planlingva aŭtoro Edgar von Wahl; kaj Ludoviko Lazaro Zamenhof mem, kiu lernis volapukon jam en 1882.⁶²¹ Rátkai vidis tiom da ligoj ke li parolis pri „*kontinueco* inter la du movadoj“.⁶²²

Ankoraŭ ekzistas anoj de la monda lingvo Volapük, kion atestas la monata cirkulero *Flenef Bevenütik Volapüka* kun la kontaktpersono Ralph Midgley en la brita Scunthorpe.⁶²³ La nuna cifalo Brian R. Bishop (nask. 1934) esprimis en 1998 la aktualan celon de la volapukistoj, citante unu el siaj antaŭuloj, Arie de Jong, el 1972: „Volapük ne plu faros batalon por havigi al si influon aŭ lokon inter aliaj sistemoj. [...] Ni deziras organizi ĉiujn aĵojn de la granda volapüka movado, kaj ni deziras prizorgi ĉi tiun lingvon, samkiel oni prizorgas la antikvan

grekan aŭ antikvan saksan.“⁶²⁴

b) Ido, la „reformita esperanto“

La planlingva projekto Ido, farita ĉefe de Louis Couturat kun la kunlaboro de Louis de Beaufront kaj Alfred Michaux,⁶²⁵ estas ankoraŭ aŭtonoma, sed pli orientiĝas je la latinidaj lingvoj ol volapuko kaj esperanto. Ekzemplo de la ŝanĝoj estas la pluraligo: en esperanto aglutina aldono de *-j*, en Ido fleksia ŝanĝo de *-o* al *-i*. Ido malhavas la esperantajn supersignojn kaj la *n*-finaĵon, la akcento estas iom pli komplike regulita (familio anstataŭ familío). La afiksa sistemo estas pli rigora ol la esperanta, en praktiko montriĝis: superflue preciza kaj malfacile uzebla. La postulon de „logikeco“ ankaŭ ĝi ne plenumis.

Kompara teksto:

Esperanto	Ido
La komitato, kompletigita per la du sekretarioj, kunvenis en Parizo, kie ĝi havis dek ok kunsidojn. Fine ĝi akceptis, unuvoĉe, la jenajn decidojn: 1. Nenia el la lingvoj prezentitaj al la ekzameno de la komitato povas esti alprenata plene kaj sen ŝanĝoj.	La komitato, kompletigita per la du sekretarii, asemblis su en Paris, ube ol havis dek-e-ok kunsidi. Fine ol adoptis, unanime, la decidi sequanta: 1. Nula inter la lingui prizentita a l' exameno dil komitato povas adoptesar bloke e sen modifiki. ⁶²⁶

La idistoj havis alian celon ol Zamenhof: esperanto estu ĉefe *facila lingvo*, ne nur por intelektuloj sed precipe por la multaj homoj kiuj regas nur la gepatran lingvon. Tial Zamenhof ne postulis ke ĉiu vorta formo nepre respondu al (okcident-)eŭropaj fontolingvoj. Laŭebla reguleco pli gravis al li. Sed la proponantoj de Ido laŭ Manders „unuapunkte atentis la intelektulojn, kaj je tio ili ne nur atribuis valoron al la efikeco de la unuopaj elementoj, sed emis eviti ĉion, kio povus aspekti al eksteruloj fremda kaj malagraba“.⁶²⁷

La ŝanĝoj en Ido ne alportis pli grandan „internaciecon“, kaj apenaŭ pli da allogeco por parolantoj de latinidaj lingvoj. Kelkaj esperanto-societoj en latinidlingvaj landoj, en Britio kaj Germanio aliĝis al Ido, sed ali-loke Ido tute ne disvastiĝis. En Rusio fondiĝis nur tri aŭ kvar malfortaj Ido-organizaĵoj. Laŭ pluraj verkoj la esperanto-komunumo perdis pro la Ido-skismo kvinonon el la gvidantaro, dum la granda amaso restis ĉe esperanto.⁶²⁸ Tiu takso venis kaj disvastiĝis el la *Historio de Esperanto* de Edmond Privat: „En la komenco ŝajnis ke preskaŭ 20 procentoj de la gvidantoj transiris al Ido, sed la nombro de l'

sekvantoj ne atingis tiun proporcion kaj iom post iom malgrandiĝis je tri aŭ kvar procentoj.“⁶²⁹ Fonton Privat ne donas. Foto de la Lingva Komitato el 1907 montras tridek kvin personojn, el kiuj poste kvin fariĝis idistoj.⁶³⁰

„Ido komencis sian ekziston je multe pli favoraj kondiĉoj ol esperanto“, Manders skribis. La Ido-propagando prezentis ĝin kiel produkton de sciencista komisiono (la Delegacio), kiel „perfektigitan esperanton“, kaj Ido havis dekomence pli multajn anojn ol esperanto en 1887, cetere pli riĉajn ol Zamenhof iam estis. La idistoj ofte ŝanĝis Idon, kredante ke la malsukceso de Ido estis kaŭzita de lingvaj mankoj. Fine la Akademio de Ido devis, pro daŭraj reformadoj, deklari plurajn jarojn senreformaj periodoj, kaj en 1937 ĝi reiris al la klasika Ido de 1914.⁶³¹ La reformprojekto Ido mem kaŭzis novajn planlingvajn projektojn⁶³² – la kredo ke esperanto aŭ alia projekto ne finvenkis pro lingvaj miskvalitoj estis ja la kialo krei Idon.

Ĉar Ido baziĝas sur aliaj principoj ol esperanto, tial oni ne nomu Idon „ido“ de esperanto. Tion la nomo volas ja sugesti, ĝi egalas al la esperanto-radiko *-ido*.⁶³³ Bedaŭrinde multaj trompiĝis de la aserto ke Ido estas nur reformita esperanto. Aliflanke, prezenti Idon kiel reformitan esperanton fakte ne tro rekomendindas al la idistoj, ĉar tiam la Ido-informadanto devas unue paroli pri alia projekto, nome esperanto, due argumenti kial la „reformita esperanto“ pli bonas kaj trie emfazi ke Ido mem ne plu reformiĝu, sed estu la fina solvo.

Ankaŭ rilate al literaturo ni trovas ĉe idistoj alian sintenon ol ĉe esperantistoj. Ke modela literaturo gravas por la normo de lingvo, tion la idistoj ankoraŭ ne komprenis, Blanke skribis, kaj eĉ se ili nun komprenus, estus tro malfrue. „Se la idistoj tuj est[u]s komprenintaj tiujn [...] vidpunktojn, Ido povintus fariĝi eĉ multe pli serioza konkurinto de Esperanto ol ĝi estis“.⁶³⁴ Fakte, en informilo el 1993 ili nenie mencias propran literaturon sed emfazas la racian flankon: „lingva matematiko“, „intelekta ludo“. Tamen alia problemo de Ido pli gravis, nome ke mankis figuro kiel la adorata Majstro Zamenhof. Li – kaj ne eble individua komparo inter Ido kaj esperanto – estis eble la plej grava kialo ke la plimulto restis ĉe esperanto.

Nun, kiam la batalo estas venkita, la esperantistoj povas ja pli leĝere rigardi al la iama konflikto. La siatempaj metodoj de kelkaj idistoj unuflanke kaj la akraj reagoj de esperantistoj aliflanke respeguliĝas tre bele en gazetartikoloj cititaj de *Germana Esperantisto* en 1910. Tiam, dum okazis esperanto-kongreso en

Aŭgsburgo, iu sinjoro Haugg el la iom proksima Munkeno estis aŝiŝe varbinta por sia germanlingva prelego pri „Esperanto kaj ties evoluiĝo“.

La preleganto komencis, vespere je la oka horo kaj tridek, pri ĝeneralaĵoj rilate al internacia helplingvo; poste li kuraĝis opinii ke esperanto estas reforminda, dum Ido prezentiĝas kiel reformita esperanto, ke la esperantistoj estas ortodoksaj kaj dogmemaj, ke amaso da eminentaj esperantistaj gazetoj kaj gvidantoj transiris al Ido. Tiuj kaj aliaj asertoj trovis multe da protesto el la publiko. La salono preskaŭ tute plenis, sed ne kun homoj kiuj intencis lerni Idon, sed kun „ĝisostaj esperantistoj“, kiel notis amuziĝinta raportisto. La patentadvokato s-ano Schiff insistis ke la menciitaj verdaj renegatoj estis parte nefindindaj, parte ne samopinias kun la preleganto; Privat el Ĝenevo ĝojis pri la varbado kiun la idistoj neintence faras por esperanto kaj bonvenigis ke ili forlasis la movadon; la redaktanto Brunner el Aŭgsburgo (ŝajne unu el la cititaj artikolverkistoj estis esperantista kundiskutanto) asertis ke eĉ libroj en Ido enhavas lingvajn erarojn; Kandt el Brombergo nomis Idon malprogreso. Fine la munkenano Haugg konfesis esti la sola idisto inter la muroj de Aŭgsburgo. Li ĉesis kun senhelpeca epilogo kaj devis toleri ke, proksimume duonhoron post noktomezo, la esperantistoj forlasis la salonon kantante sian himnon kaj kun la voko „Vivu Esperanto!“

5. La klingona

La *klingona* ne estas planlingva projekto kiel lingvo konscie kreata kun la celo de plifaciligado de internacia komunikado, sed kreitaĵo de usona lingvisto por filmo de la sciencfikcia serio *Star Trek* el 1985. Tie kaj en postaj filmoj kaj serioj ĝi estas la lingvo de ekstertera, sufiĉe militema raso. Ekzistas *Klingon Language Institute*, kiu havas jam 200 membrojn kaj kvarfoje jare eldonas gazeton. „Tamen ni esperantistoj ne devas timi konkurencon: Estas tre malfacile lerni kaj prononci la klingonan; la lingvo ja celas soni malagrabla kaj malsimila al naciaj lingvoj.“⁶³⁵ Sed, vere ja ĝuste la ekzotikeco estas la ĉarmo de la klingona – kaj de esperanto? Almenaŭ la alligitaj ideoj malsamas, jen lingvo por tutmonda komunikado, jen lingvo de krudaj eksterteranoj.

6. Terminoj por lingvoj kiel esperanto

Por lingvoj kiel esperanto ekzistas multaj diversaj esprimoj, ekzemple: universala, artefarita, konstruita, monda, helpa, komuna, internacia lingvo, lingua franca, interlingvo, kaj kunmetaĵoj: internacia planlingvo, monda helplingvo, konstruita universala lingvo k.t.p. ⁶³⁶ En *Plena Ilustrita Vortaro* (1987) planlingvo kaj konstruita lingvo mankas kiel kapvortoj, sed planlingvo aperas en la artikolo pri Ido. Volapuko estas nomata internacia lingvo, anstataŭ monda lingvo, kio ĝi ja estas laŭnome. Artefarita lingvo troveblas kiel kapvorto, dum internacia lingvo aperas sub help-: internacia ~a lingvo.

Oni povas dividi la esprimojn en du grupojn. La unua enhavas esprimojn pri la funkcio de lingvo: kion oni faras aŭ volas fari per ĝi. La esprimoj de la dua grupo koncernas la internan konsiston de lingvo. Ofte informiloj uzas por esperanto plurajn esprimojn sendistinge kune, esperante ke interesato jam konas unu el ili. Cetere oni verkante ja volas ne ĉiam ripeti la saman vorton, kaj serĉas alternativon. Ekzemplo estas broŝuro el Nederlando, kiu proponas al la legantoj: helplingvo, artefarita lingvo, planlingvo, universala helplingvo, ĝenerale agnoskita tutmonda trafiklingvo, monda helplingvo, internacia lingvo kaj universala trafiklingvo. ⁶³⁷ Sed per tio ili kreas la malĝustan impreson ke tiuj ĉiuj esprimoj signifas pli-malpli la saman, kvankam malsamaj esprimoj ofte reprezentas malsamajn lingvajn konceptojn. Parenteze, konsiderante informadon: la diversaj terminoj resp. iliaj kongruaĵoj havas malsamajn kromsignifojn en diversaj lingvoj. La ĉi-sekvaj konsideroj tial validas eble nur por kelkaj lingvoj.

a) Esprimoj kun rilato al la funkcio / disvastiĝo

Universala lingvo estas uzata ne nur por lingvo kun inter-etna rolo, kiel ekzemple la latina en la okcidenta mezepoko, sed ankaŭ por filozofie bazita lingvo kiu klasifikas la mondon. Aliaj uzas *universala lingvo* por lingvo, kiu anstataŭ ĉiujn aliajn ekzistantajn. ⁶³⁸ Piron avertas ke la vorto *universala* „elvokas ion, kio ĉion invadas, ĉion volas ampleksi. Ĝi naskas fone de la menso bildon de konkeranto, kiu intencas submeti al si la *tutan mondon*, aŭ de kodo, kiun oni trudos al ĉiuj.“ ⁶³⁹ Jam Zamenhof forlasis por esperanto la nomon de

Lingwe Uniwersala, ĉar li timis ĝuste tiun miskomprenon.⁶⁴⁰ Cetere, la esprimo *universala* estas aplikata en nuntempa lingvistiko por la „lingvaj universalaĵoj“ kaj la „universala gramatiko“. Fine pro tio, *universala lingvo* fariĝis tute neklara kaj netaŭga por esperanto, kaj esperanto-informiloj apenaŭ plu uzas tiun vorton.

Monda lingvo riskas esti miskomprenata, same kiel *universala lingvo*, ĉu ĝi estu lingvo apud aliaj aŭ ĉu ĝi anstataŭu ĉiajn aliajn. Zamenhof komprenis sub *tutmonda lingvo* ke ĝi estu ne nur internacia, sed parolata de la plejparto de la homaro.⁶⁴¹ La germana socilingvisto Ammon skribis en fakleksikona artikolo sub *monda lingvo*: „lingvo, kiu estas mondvaste uzata“, sed li limigis ke kutime oni uzas la esprimon por lingvo uzata de signife multaj homoj en pli-malpli ĉiuj landoj. Tio validas nun por la angla kaj en antaŭaj epokoj por neniu lingvo. Depende de la strikteco de la limigo, ankaŭ aliaj lingvoj povas esti nomataj mondaj lingvoj (la franca, hispana, portugala, germana). Krome *monda lingvo* estas, laŭ Ammon, foje uzata por lingvoj kiuj estas nur planataj por fariĝi mondaj lingvoj sed kiuj ne estas tiel aplikataj (ekz. esperanto).⁶⁴²

Pri *lingua franca* la sama leksikono informas ke laŭ socilingvistiko *lingua franca* (LF) estas lingvo en situacio, kie la komunikantoj havas malsamajn gepatrajn lingvojn. La angla estas nuntempe la plej disvastigita LF, cetere la franca kiu estis iam LF ekzemple de la diplomatio. Oni mencias ankaŭ piĝinlingvojn kaj la planlingvon esperanto.⁶⁴³

Trafika lingvo estas (nacia) lingvo parolata kiel fremda aŭ dua lingvo de samregionanoj. Ekzemplo estas la svahila en orienta Afriko, aŭ la angla tutmonde. Oni renkontas tiun esprimon precipe en germanlingvaj esperanto-varbiloj dum 1950-1970, kune kun *monda trafika lingvo*. Eble pro la konsciiĝo pri la danĝeroj de strata trafiko kaj pro tiala negativa kromsignifo oni intertempe forlasis la esprimon.

Kvankam oni trovas *helpa lingvo* ofte por esperanto, ĝi ne nepre limiĝas al tiu lingvo. Kelkfoje helplingvo nomiĝas ankaŭ la rusa, la hispana, la angla, k.t.p.; fakte ja ĉiu lingvo povas esti uzata por la komuniko inter malsamlingvanoj. „Helpa“ povas havi kromsignifon de malkvalito (helpa laboristo, helpa kunlaboranto). Tion ilustras ankaŭ jena averto de Jespersen: lia projekto Novial ne estu rigardata kiel provo de perfekta lingvo, „ĉar nia lingvo estas nur helpa lingvo, oni rajtas kompari ĝin nur kun naturaj lingvoj, kiam ili estas parolataj de

averaĝa eksterlandano.“⁶⁴⁴ Informantoj vaste uzis la esprimon *helpa lingvo* por emfazi ke esperanto ne forigu aliajn lingvojn.

Internacia lingvo, klasika esprimo en esperanto-informado, estis jam la titolo de la projekto de Zamenhof. Ĉar internacie uzata povas esti iu ajn lingvo, kaj ĉar aliaj lingvoj estas ja multe pli uzataj tiusece, la esprimo povas esti por esperanto nur ornama kromnomo.⁶⁴⁵ Laŭ miaj propraj spertoj, ĵurnalistoj kaj interesatoj ja akceptas la esprimon *internacia lingvo*, sed ili konscias ke ekzistas pluraj „internaciaj lingvoj“ kaj tial krome memstare uzas ankaŭ alian terminon kiel *artefarita lingvo*. *Internacia lingvo* en si mem do ne estas malbona esprimo, sed ĝi ne povas anstataŭi terminojn kiuj rilatas al la lingvospeco.

La formon „la Internacia Lingvo“ (kun artikolo kaj majuskloj) oni sufiĉe ofte trovas en iom malnovaj verkoj. Ĝin subtenis Lapenna kun certa ideologia fono: en internaciaj kadroj oni uzu nur esperanton, dum aliaj lingvoj povas nur uzurpi la internaciecon. La sola internacia lingvo estu esperanto; kaj por emfazi tion kaj por laŭte proklami „nian“ rajton pri la termino, Lapenna uzis „la Internacia Lingvo“ tute kiel sinonimon de esperanto.⁶⁴⁶

Helmar Frank ekuzis *ILO* (**I**nternacia **L**ingvo proponita de d-ro Zamenhof) kaj provas tute eviti la vorton esperanto.⁶⁴⁷ Frank skribas *Internacia Lingvo* ankaŭ en nacilingvaj tekstoj, ĉar ĝi estas, laŭ li, la vera nomo de la lingvo. Tio ne tute ĝustas, ĉar ĉe Zamenhof *Internacia Lingvo* ne estas propra nomo, transpreninda al aliaj lingvoj, sed esprimo kiu priskribas la rolon de la lingvo. En ekzemple la germana Frank do devus skribi ne *die Internacia Lingvo* sed *die Internationale Sprache*, kiel faris Zamenhof. Sur la oficiala, kvarlingva leterkapo de lia instituto ĉe la universitato de Paderborn li petas: „Bonvolu skribi al ni germane, angle, france aŭ internacie; ni respondos germane aŭ laŭdezire en *Internacia Lingvo (ILO)*“.

Principe la atentigo de Frank ĝustas ke „Esperanto“ estis origine nur la pseŭdonimo de Zamenhof. Sed interesatoj baldaŭ rimarkos ke temas pri malnovaĵo kun nova nomo. Tiam ili miros pri la nomŝanĝo, eble supozos ian trompointencon, kaj demandas sin kial Frank deziras distancon al la uzantoj de la vorto „esperanto“. Cetere interesato povas miskompreni ke ILO estas alia lingvo ol esperanto.⁶⁴⁸ Eksa paderbornano rakontis al mi ke loka gazeto fakte iam skribis: la esperanto-simila lingvo ILO...

Wüster preferis *interlingvo*, sed tiu, laŭ li, ne uzeblis pro la projektoj nomataj Interlingua resp. Interlingue de Peano, de Von Wahl, kaj de Gode. Cetere, interlingvo ne tradukeblas al kelkaj lingvoj.⁶⁴⁹ Ekster planlingvaj rondoj la vorto interlingvo uzatas en tiu senco: kiam parolanto de lingvo A lernas lingvon B, tiam li uzas je la komenca tempo ne lingvon B, sed unue interlingvon B' kaj nur poste la ĝustan lingvon B.⁶⁵⁰

Ĉe Gold k.a. oni trovas *neetna lingvo*,⁶⁵¹ kiu same povas esti alia lingvo ol esperanto; ekz. la latina. Tiu malofta termino havas kelkajn variantojn kiel *interetna* kaj *nenacia*.

La nocion *dua lingvo* esperantistoj uzas ofte nesciante ke ĝi estas socilingvistika termino. Dum fremda lingvo estas lernata en lernejo kaj multe malpli uzata ol la unua (gepatra) lingvo, dua lingvo estas ekzemple lernata de lingvaj malplimulto kaj enmigrintoj kaj ties infanoj en socio kiu parolas la lernatan lingvon, kaj ĝi transprenas gravan rolon en la ĉiutaga vivo.⁶⁵² Sadler avertis kontraŭ dua lingvo pro tio, ke ĝi en informado aŭtomate dua-rangigas esperanton simile kiel helpa lingvo: „Kiel konate, jam multaj familioj adoptis esperanton kiel hejman lingvon. Tian lingvon neniu emas rigardi kiel 'duan' aŭ 'helpan' lingvon.“ Aliflanke, esperanto por multaj homoj havas vere nur duan lokon post la gepatra lingvo. Fine Sadler postulis ke oni sin demandu honeste, ĉu por oni esperanto kaj la nacia lingvo estas vere egalrangaj, ĉu oni ekzemple faras aritmetikon same rapide en ambaŭ lingvoj.⁶⁵³ Claude Piron en tiu kunteksto atentigis ke frapfrazo kiel „la lingvo por ĉiuj“ povas vekti timon: „Estas psikologie nature reagi al ili, pensante: 'Ne por mi, mi volas resti libera'.“⁶⁵⁴ Jen sufiĉe da kialoj eviti tian esprimon.

Neŭtrala lingvo povas esti uzata por la plej diversaj lingvoj, simile kiel la aliaj funkcio-priskribantaj esprimoj,. Plej ofta ekzemplo de neŭtrala lingvo estas la latina, kaj esperantistoj kelkfoje ne postulas rekte la ĝeneraligon de esperanto, sed de iu neŭtrala lingvo: de esperanto aŭ de la latina. Ili esperas ke la interesato ĉiukaze ektimas pro la „malfacileco“ de la latina kaj preferas esperanton. Sed ĉu esperanto vere estas ĉiam, per si mem, neŭtrala? Esperanto ne estas la lingvo „de neniu kaj de ĉiu“, sed la lingvo de la esperanto-komunumo. Kiam esperantistoj proklamas: „lernu esperanton, la lingvon neŭtralan“, tiam ili fakte postulas: „lernu nian lingvon“. Jordan riproĉas al „esperanto-gvidantoj“ ke ili uzas la esprimon *neŭtrala* ofte malprecize, neglektante la eŭropan karakteron de la

lingvo. Multaj esperantistoj parolas pri neŭtraleco nur aludante ke esperanto ne estas la lingvo de nacia ŝtato.⁶⁵⁵ Imagu ke en usona esperanto-grupo troviĝas nur anglalingvanoj. Kelkaj parolas esperanton flue, aliaj malflue. Tiam la angla estas neŭtrala lingvo. Kiam oni ekparolas esperanton, tiam nur la fluparolantoj havas avantaĝon. Jordan raportas ke paroli esperanton estas foje „misuzata“ de fluaj parolantoj por ekskludi malfluajn parolantojn de la konversacio, „ili mem konfesas tion“. Tiuj fenomenoj estas, laŭ li, similaj en usonaj asocioj okupiĝantaj pri etnaj lingvoj.⁶⁵⁶ Interesa kromaĵo: En planludo de la usona armeo oni uzis esperanton kiel lingvon de la luda malamiko Aggressor. La manlibro, kiu iom enkondukas al la lingvo esperanto, klarigis ke esperanto ne estis inventita por Aggressor kaj ke ĝi estis elektita ĉar Aggressor estis imagita *neŭtrala* malamiko.⁶⁵⁷

b) Esprimoj kun rilato al la konsisto aŭ strukturo

La nocio *miksita lingvo* facile kondukas al la erara ideo ke esperanto estas miksaĵo el (ĉiuj) ekzistantaj lingvoj.⁶⁵⁸ Fakuloj ne estas unuanimaj pri la termino. Kutime oni nomas „miksitaĵ“ la kreolajn lingvojn, sed foje ankaŭ la angla, kiu estas baze ĝermana lingvo, sed kun granda latinida influo al la vortaro. Aliaj lingvistoj rifuzas nomi la anglan miksita lingvo: ĝi restas ĝermana lingvo, ĉar la struktura influo de la franca malmultas. Ankaŭ kreolaj lingvoj ne nepre estas miksitaĵoj. Aliaj aŭtoroj uzas la terminon tre strikte por specifa tre aparta sociolingvistika fenomeno. Miksita lingvo estas do ankoraŭ sufiĉe malklara kaj pridiskutata termino. Precipe pro la negativa kromsignifo de miksita lingvo tre malrekomendindas uzi tiun ĉi esprimon. Kvankam multaj interesatoj ne aŭdis la esprimon miksita lingvo, ili tamen ofte demandas pri la mikseco de esperanto. Tiun bildon subtenas reklamo-frazoj kiel: „Por esperanto, oni prenis ĉion bonan el la ekzistantaj lingvoj“.⁶⁵⁹

Konstruita lingvo estis enkondukita de Jespersen (1928), kiu serĉis pli bonan esprimon ol *artefarita*. La esprimo estas uzata ĉefe en la angla (*constructed language*).⁶⁶⁰ Same kiel *artefarita lingvo* ĝi riskas elvoki negativajn subsentojn.

La esprimon *sintetika* oni povas konfuzi kun *sinteza*, la malo de *analiza*. Tiuj du estas jam terminoj en lingvistiko. *Sintetika lingvo* sonas kiel *sintetika viandaĵo* k.t.p. kaj provokas bildon pri frankenŝtajna kunmetaĵo de pecoj el

malsamaj lingvoj, ne pri propra memstara lingvo.

c) Artefarita lingvo

Unu el la plej disvastiĝintaj terminoj en la neesperantista mondo estas *artefarita lingvo*. Sendube *artefarita* havas negativan kromsignifon, ne nur rilate al lingvoj, sed ankaŭ rilate al ekz. nutraĵoj aŭ mebloj. Gold skribis pri *artefarita lingvo* ke „eĉ homoj kiuj uzas ĝin neŭtrale, emas eviti ĝin pro timo ke ĝi estus komprenata negative“.⁶⁶¹ Tio estas tiom evidenta ke eĉ esperantistoj foje misuzis ĝin por kalumnii aliajn planlingvajn projektojn. „Lingvo devas esti ja internacia kaj vivanta, ne arte fabrikita.“, juĝis Privat pri volapuko.⁶⁶² En germana informilo el 1948 oni nomis volapukon „neŭtrala artefarita lingvo“, dum esperanto aperis kiel „neŭtrala internacia komunuma lingvo sur la bazo de la plej gravaj kulturlingvoj“.⁶⁶³ Werner Bormann distingis la „internaciajn lingvojn“ en artefaritajn projektojn unuflanke kaj esperanton aliflanke. Poste li uzis *artefarita lingvo* por la klingona.⁶⁶⁴

listigis kion oni nomas *artefarita lingvo* en la faka literaturo:

- „1. Reguligita kaj normigita literatura lingvaĵo, tiel diferencigita de dialektoj [...].
2. Etnaj lingvoj, altgrade reguligitaj por teni ilin je certa evolua stato (sanskrita, eklezia latina) aŭ por modernigi ilin (moderna hebrea, Bahasa Indonesia, Landsmal).
3. Konscie kreitaj lingvoj por faciligi internacian komunikadon [...], tio estas planlingvoj.
4. Senredundancaj, formulaj, aŭ simbolaj lingvoj por faciligi sciencan pensadon (ekz. la simbola sistemo de logiko, matematiko, kemio). Tiuj esence estas idealigitaj fermitaj kodoj [...].
5. Porprogramaj lingvoj por komputiloj, ekzemple Algol, Cobol, PL/1 [...].
6. Maŝinaj lingvoj por aŭtomata tradukado.“⁶⁶⁵

Ne nur pro la konfuzebleco *ĝi* ne taŭgas kiel termino por esperanto-informado;

precipe estas malbone, kiam esperanto estas nomata kune ekzemple kun komputilaj „lingvoj“.

En la komenca epoko Zamenhof kaj aliaj nomis esperanton *artefarita lingvo*, emfazante ke artefariteco estas helpa por tia lingvo. Dietterle ekzemple apologiis tiel: li kontraŭas la aserton ke lingvo estas organismo, sed tion klarigi daŭras tro longe, kaj tial li uzas metaforojn por la boneco de artefaritaj aferoj: kiam ne haveblas rivero por transporti varojn, tiam oni konstruas kanalon; iam oni asertis ke artefarita io ne povus anstataŭi la forton de ĉevalo, sed nuntempe ja ekzistas aŭtomobiloj. ⁶⁶⁶

Aliaj informantoj eĉ tute transprenis la biologiisman koncepton: „Esperanto rilatas al la tute libere kreskintaj lingvoj ne alie ol kulturplanto, gajnita per [konscia selektado], servanta por specialaj celoj, rilatas al siaj fontaj plantoj“, skribis iam GEA. ⁶⁶⁷ William Auld: „Same kiel kanalo estas planita rivero, Esperanto estas planita lingvo.“ ⁶⁶⁸

Postaj aŭtoroj kontraŭis la dividon inter „naturaj“ kaj „artefaritaj“ lingvoj mem, kaj fine oni eĉ difinis esperanton kiel naturan lingvon, kiu estas komparebla kun la naciaj lingvoj. John C. Wells citas la lingviston Sanders: „Homa, aŭ natura, lingvo estas nefinia [nelimigita] aro da pariĝoj de sonoj kaj signifoj, kiu povas esti uzata por homa komunikado fare de la anoj de iu homa socio“, kaj Wells konkludas ke ja ekzistas homoj kiuj tiel uzas esperanton kaj ke sekve la difino de Sanders validas ankaŭ por esperanto. ⁶⁶⁹

Informanto certe renkontos la esprimojn *artefarita* kaj *natura lingvo*, kaj malfacilos forigi ilin el la kapo de interesatoj aŭ ĵurnalistoj; ni devas toleri tion. Ili foje eĉ ne komprenas ĝuste kial ni esperantistoj tiom kontraŭas la terminon *artefarita lingvo*. Ĝenerale, en tiu kunteksto eblas atentigi ke lingvoj havas kaj biologian flankon, ĉar homoj uzas cerbon kaj parolorganojn por lingvo, kaj ankaŭ kulturen flankon, ĉar lingvoj dependas de diversaj kulturoj kaj konvencioj. Tiu ambigueco validas por naciaj lingvoj same kiel por esperanto, do por la homaj lingvoj entute.

ĉ) Planlingvo

La terminero *plan-* uziĝis eble unuafoje en la esprimo „laŭplana komuna lingvo“

de Hugo Schuchardt en 1909.⁶⁷⁰ Sed la terminon *planlingvo* enkondukis nur Wüster en 1931.⁶⁷¹ Poste li klarigis ke li volis anstataŭigi la terminon *konstruita lingvo* de Jespersen. La difinoj de *artefarita, konstruita* kaj *planlingvo* estas relative similaj. De Blanke venas difino de *planlingvo* nuntempe ofte citata: „Planlingvoj estas [...] de homoj laŭ certaj kriterioj konscie kreitaj lingvoj, kiuj servu por internacia komunikado.“⁶⁷² Oni povas alivorte klarigi *planlingvo* kiel lingvon ĉe kies komenco ekzistis baza plano. Per la posta komunikado, orientiĝanta je tiu plano, estiĝis la planlingvo.

Kvankam tiu esprimo jam pli-malpli venkis kiel termino en esperanta interlingvistiko, ĝi ankoraŭ ne estas tute akceptata en la esperantista mondo. La ĵurnalisto kaj GEJ-prezidinto Thomas Bormann timis prave ke *planlingvo* povus esti komprenata kiel *planata* aŭ *planota*, aŭ precipe kiel lingvo por plani ion.⁶⁷³ Per si mem *plan* ne devas havi negativan kromsignifon, sed en kombino kun lingvo tio povas facile okazi.⁶⁷⁴ Duliĉenko opiniis: „verŝajne ne precipe fortuna elekto“, sed li taksas ĝin akceptebla, por distigni planlingvojn de la kibernetikaj artefaritaj lingvoj.⁶⁷⁵ Gold emfazis ke ankaŭ multaj etnaj lingvoj enhavas planitajn elementojn: „La angla estas pli planita ol la keĉua, sed la moderna hebrea estas pli planita ol la angla kaj esperanto estas pli planita ol la moderna hebrea“.⁶⁷⁶ Tiu atentigo ĝustas kaj povas helpi en informado, kvankam ja tamen je la komenco de la angla kaj la (moderna) hebrea ne ekzistis plano, malsame je esperanto. Simile oni sin gardu je tro simplismaj komparoj inter Zamenhof kaj ekz. Martin Luther, kiu estis grava katalizatoro en la longdaŭra evoluo de la moderna germana lingvo, sed ne ĝia kreinto.⁶⁷⁷

7. Resumo de planlingvoj sen mitoj

Ekzistas ĉ. mil planlingvaj projektoj, sed nur tre malmultaj el ili trovis parolantojn. Esperanto sendube estas la plej sukcesa el ili. Ĝi apartenas al tiu grupo de projektoj kiuj orientiĝas je jam ekzistantaj lingvoj sed ne sklave imitas ilin (aŭtonoma aposteriora projekto). En informado oni ne ĉiam devas mencii la aliajn projektojn, sed ĉiukaze oni ne simple ridindigu kaj primoku ilin. Ni devas toleri ke multaj neesperantistoj tamen volas pluuzi la pli konatajn esprimojn kiel *artefarita lingvo*.

Por la konscie kreitaj lingvoprojektoj estis elektitaj multaj diversaj terminoj. El ili ekz. *universala*, *artefarita* aŭ *monda* lingvo estas certe malrekomendindaj. La fakvorto kiu ŝajnas ĝenerale akceptiĝi en la literaturo estas *planlingvo*, sed en la publiko *internacia lingvo* eble pli taŭgas, ankaŭ ĉar planlingvo ne estas tradukebla al kelkaj naciaj lingvoj.

Literaturon pri planlingvoj vidu jam [fine de la antaŭa ĉapitro](#).

VI. Zamenhof sen mitoj

1. Zamenhof en informado

„Por la propagandistoj de la nova lingvo internacia ... Esperanto estas ia nova Korano dum doktoro Zamenhof estas Mahometo.“

(Blondel, 1904⁶⁷⁸)

Normalas ke la esperantistoj scivolemas pri la fondinto de ilia komunumo. Simile aliaj lingvo-komunumoj konservas la memoron pri elstaraj samlingvanoj, kiuj foje eĉ konsiderinde influis la lingvon. Tio estas parto de lingva kulturo kaj kaŭzis ke ankoraŭ nuntempe Ŝekspiro estas la unua persono pri kiu oni pensas demandite pri fama angla verkisto, aŭ ke la eksterlandaj lingvo-lernejoj de la germana ŝtato nomiĝas Goethe-institutoj. Kaj Ludoviko Zamenhof certe meritas atenton kaj interesiĝon flanke de la esperanto-parolantoj. Fariĝas malaprobinde nur kiam la interesiĝo kaj honorigo pri famulo transiras certajn limojn, kiam la orientiĝo je li kaj liaj ideoj katenas la evoluon eĉ jardekojn post lia morto, kaj kiam estiĝas trompoj kaj legendoj pri vivo kaj verko.



Ludoviko Zamenhof ne nur enmondigis lingvon, sed havas ankoraŭ senteblian aktualecon en la lingvo-komunumo. En informado tio povas kaŭzi problemojn, kiam informadanto ne taksas ĝuste kiel aŭ kiom multe oni prezentu la varsovian kuraciston. Ofte eĉ malgrandaj informiloj mencias lin, kaj kelkfoje oni eĉ uzas la sektece sonantan *kara Majstro*, pri kiu Zamenhof mem opiniis: „La tro honora titolo de majstro, kion vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia

kaŭzo ne estas simpatia“.⁶⁷⁹ Alia titolo, la ankoraŭ multe trovebla „genio“, strangas en informado, precipe kiam ĝi rolas kiel tro simpla klarigo por la relativa sukceso de esperanto: inventaĵo de genio ja nepre devas esti genia kaj tial sendisputeble supera al konkurencaj projektoj, ĉu ne?

Alispeca informbroŝura troigo, kiun Germana Esperanto-Asocio ripetis ankoraŭ en 2001, koncernas Bjalistokon: „Kontraŭ tiu etoso de agresado kaj apartigo de la rasoj Zamenhof batalis jam kiel lernanto.“⁶⁸⁰ Tia priskribo havas sencon nur se oni komprenas judojn, polojn, rusojn kaj germanojn kiel malsamajn rasojn, sed tion la verkinto certe ne volis esprimi.

Ne nur ke Zamenhof estas prezentata ofte malĝuste – tia personkulto damaĝas en informado. Pro la emfazo ke esperanto estas „lingvo inventita de iu certa persono“, povas krome esti ĝi la negativa impresoj ke Zamenhof elpensis ĉiun detalon. Unufolia informilo de Thomas Pusch prave eĉ tute ne mencias lin, ĉar ĝi temas nur pri la lingvo,⁶⁸¹ dum iom dika broŝuro kompreneble povas dediĉi tutan paĝon al li.

Ŝajnas ke la Zamenhof-kulto ricevis impulsojn precipe dum krizaj periodoj: dum kaj post la Ido-krizo, militoj kaj persekutoj, aŭ kiam la membro-nombroj de asocioj malkreskas. Ekzemple en la malfacilaj 1930aj jaroj, Lins skribis, okazis „revekigo de la 'interna ideo'“ kaj „ripetigis la trajtoj de la antaŭmilita Movado, kiam Majstro-kulto kaj nebula ideismo servis por kamuflaj seriozajn disputojn“.

⁶⁸² Se en tiu ĉi libro Zamenhof estas priskribata foje sufiĉe detale, tiam certe ne ĉar ĉio same aperu en informiloj. Male, salutindus pli kaj pli da liberiĝo de la Zamenhof-kulto, kiu estus por la komunumo same freŝa vento kiel la liberiĝo el la katenoj de la Biblio en la 19a jarcento. Sed ĉi tie indas pritrakti tion kion oni povas trovi pri Zamenhof en la propagando-literaturo, kaj pri kio tre-interesatoj foje demandas.

Por illustri la kulton, jen fine ekzemplo de absurda Zamenhof-adorado, kombinita kun severa sinteno rilate al lingvaj normoj, el la jaro 1910:

„Zamenhof elektis 'alumeto' [en la unua libro], Grosjean-Maupin elektas 'alumedo' [en nova vortaro]. Unu el ili eraras. Kiu? Jen la demando.

Por ĝin solvi, ni konsideru ambaŭ personojn, ilian valoron, kleracon kaj kompetentecon.... s-ro Grosjean-Maupin estas lerninto de la Supera Normala Lernejo, kiu estas, kiel scias multaj, kovejo de kleruloj; li estas profesoro de la

Franca Universitato, kies alta valoro estas tutmonde ŝatata; [jam nur laŭ liaj titoloj] oni rajtas aserti ke li estas viro inteligenta, instruita kaj posedanta pri lingvaj [...] aferoj nediskuteblan kompetentecon. D-ro Zamenhof estas modesta kuracisto, kiu grandan parton de sia vivo dediĉis al la studado de la okulaj malsanoj [...].

Ŝajnas, ke povas ekzisti nenia dubo!... Kaj se mi decideme elektas la okuliston, tio simple pruvas, ke mi estas memvola blindulo. / Era

[Noto de la redaktinto:] Feliĉe ekzistas multaj, tre multas 'blinduloj', kiel estas nia Era, kiuj pli alte ŝatas genion de modesta okulisto, ol klarecon de iu 'plibonigema' instruisto. ⁶⁸³

2. La persono Zamenhof

„Zamenhof estis judo kaj la eksteraj specialaĵoj de lia raso karakterizis ankaŭ lian aspekton. Estante malgranda kaj maldika li havis palan vizaĝon kun okulvitroj, grizajn hararon kaj barbon. Lia aspekto estis nepostulema kaj alloga.“

(Wilhelm Ostwald ⁶⁸⁴)

Zamenhof naskiĝis la 3an de decembro 1859 en la urbeto Bjalistoko en la gubernio Grodno (Rusio), kiel filo de lingvoinstruisto. Laŭ la nova gregoria kalendaro la dato estas la 15a de decembro, laŭ la juda kalendaro la 19a de ĥislev (la tria hebrea monato). ⁶⁸⁵ Pri sia nacieco resp. etneco li ne lasis dubon:

„Supre mi diris, ke *vastan* publikan paroladon pri mia nacieco mi trovas en la nuna tempo neoportuna, ĉar mi devas nun eviti ĉion, kio senbezone donus kaŭzon al grandaj disputoj; sed *kaŝi* mian naciecon mi tute *ne* deziras; kaj se Vi parolos pri mia nacieco, volu diri, ke mi nomas min Ruslanda *hebreo*.“ ⁶⁸⁶

Li permesis esti nomata filo de Pollando, ĉar ĝi estas ja lia hejmlando, kie li laboras kaj kie estas enterigitaj liaj gepatroj. Tamen li ne volis esti nomata „polo“, por ke neniu asertu ke li surmetas maskon de alia popolo. ⁶⁸⁷

Hebreo estis uzita en Rusio por distingi la religianon *judo* de la etnano *hebreo*, sed ĉar tiu distingo estas farata malmulte ekster orienta Eŭropo, ĉar PIV nomas la esprimojn sinonimoj kaj ĉar en esperanto *hebreo* estas uzata kutime por ano de la Biblia popolo, preferindas nuntempe ĝenerale la vorto *judo*. Sed se Zamenhof uzis por si mem *hebreo*, oni iom respektu tion.

Multaj aŭtoroj nomas lin polo, ruso aŭ rusiano, ⁶⁸⁸ sed nur rusiano ĝustas. Kvankam Zamenhof tre bone konis kaj ŝatis la rusan (sian patran lingvon), li ne vidis sian identecon en ruseco. La rusiaj judoj estis dividitaj en diversajn grupojn. Zamenhof apartenis al la t.n. „litvanoj“, kiuj sentis sin alia etna grupo ol ekzemple la polaj hebreo, kiuj simpatiis kun polaj kulturo, patriotismo kaj separatismo. ⁶⁸⁹ Gold klarigis, kio estas litvano. Litovio nuntempe estas sendependa respubliko, la ĉefa etno estas litovoj, kiuj parolas la litovan. Sed Litvo, jide *lite*, ne rilatas al la etnaj litovoj, sed nur al la hebreo, la litvanoj. En la jida lingvo ili nomis sin *litviŝe jidn* (litvaj hebreo) aŭ *litvakes / litvikes*.

Kiam Zamenhof diris ke „Litovujo“ estas lia patrujo, tiam li supozeble pensis pri *lite*.⁶⁹⁰ Zamenhof do estis rusia ŝtatano de hebrea nacieco.

a) Nomoj

Ĉu vi sciis ke la fama Maurice Lafontaine nomiĝis iam Moritz Wasserstrahl? – Aĥ, mi konas lin eĉ el la tempo kiam li estis ankoraŭ Mojŝe Pisser.⁶⁹¹

Pri la deveno kaj origina signifo de la nomo Zamenhof ne estas klareco. Eble la Samenhof-familianoj kunportis sian nomon el Germanio, eble ili ricevis ĝin desupre en Rusio. Maimon kaj Gold konsideras la eblon ke ĝi estas nekutima kombino de germanaj *Hof* „korto“ kun *Samen* „semo, greno“. Tiel ekzistas ja ankaŭ *Kirchhof*, malnova vorto por nuna *Friedhof*, tombejo, kaj *Schulhof* (*Schul* signifas ĉi tie juda preĝejo), sed ili ne certas pri tio.⁶⁹² En vortaro pri judaj nomoj troveblas la klarigo ke *Samenhof* / *Zamenhof* estiĝis el *Zamenov*, kio signifas ruse „filo de Sam“, kun *Sam* kiel mallongigo de Samuel.

Laŭ Zamenhof mem la nomo de la familio estis origine *Samenhof*. La germana *S* komence de silabo prononciĝas kiel esperanta *z*. Zamenhof ŝanĝis ĝin al *z*, ĉar en la plej multaj lingvoj la dezirata sono estas skribata tiel.⁶⁹³ *Samenhof* li uzis nur en germanlingvaj tekstoj, kaj tiutempaj germanaj esperantistoj transprenis tion. Sed nuntempe ankaŭ en Germanlingvio *Zamenhof* estas la normala formo.

La persona nomo de Zamenhof estis *Eliezer*, en la jida *Lejzer*, kiel ĝi aperas ankaŭ sur la naskiĝo-dokumento Poste li elektis, por vivi inter la „gojoj“ (nejudoj), la nomon *Ludwik* aŭ en esperanto: *Ludoviko*. Li iam ekpreferis la mallongigon *L. L. Zamenhof*, por distingiĝi de sia frato Leono. Oni kutime ne asimilu la nomon, kio estas ankoraŭ ofte farata: *Louis-Lazarre* en la franca, *Ludwig Lazarus* en la germana. Plej taŭgas eble la formo *L.L.Zamenhof* (*d-ro Lejzer Ludwik Zamenhof*).

D-ro Esperanto estis la pseŭdonimo de Zamenhof, kiam li publikigis en 1887 „Lingvon Internacian“. Pseŭdonimon li uzis ne pro la cenzuro, kiu ja konis la veran nomon; la ideo ke temas pri „modesteco“ estas supozeble nur posta invento de aliuloj.⁶⁹⁴ Li timis mokon, kiu estus danĝera por la reputacio de juna kuracisto.⁶⁹⁵ Baldaŭ oni diris „la lingvo de Esperanto“ kaj fine sole „esperanto“,

kaj Zamenhof ĉesis uzi la pseŭdonimon. Leksikonoj kaj gazetoj ŝatas sciigi pri la tradukita signifo de „esperanto“, sed eble ne rekomendindas plidisvastigi tion, ĉar „la esperanta doktoro“ povas jene impresi al interesato: „Aĥ, li esperis ke ĉiuj homoj parolos lian lingvon, sed tio restis nur espero“. Fakte, *esperi* ne nepre estis elektita de Zamenhof en sia pseŭdonimo ĉefe pro espero. Liaj pseŭdonimoj ofte havis iun rilaton al lia vera nomo, ekz. *Gofzamen*. La *-hof* oni prononcas mallonge, ne kiel en la germana *Hof*, korto, sed kiel en *hoffen*, esperi. Laŭ la vortoj de Maimon, „la nomo de la Majstro enestas“ en la vorto esperanto.

[696](#)

b) Profesio

„Esperanto estis kreita fine de la 19a jarcento de la pola okulkuracisto Zamenhof, por venki la lingvajn barilojn inter siaj internaciaj pacientoj.“

(Belga gazeto, 2002 [697](#))

Ankaŭ la profesio de la lingvo-fondinto estas menciata en multaj informiloj. Zamenhof studis en Moskvo (1879-81) kaj Varsovio (1881-85) medicinon, ricevis sian kuracistan diplomon en 1885 kaj poste specialiĝis pri okulmedicino finstudante duonan jaron en Vieno, 1886. Ĝis la unua mondmilito, kiam li malsaniĝis, li fakte laboris kiel okulkuracisto. Tio ne estas tute identa kun *oftalmologo* (termino foje trovebla informile) ĉar oftalmologo povas esti ankaŭ sciencisto kiu okupiĝas pri okuloj, sed eble ne laboras praktike kiel kuracisto. Daŭris multajn jarojn ĝis li povis sin kaj sian familion vivteni per sia profesio. Li laboris fine en malriĉa juda kvartalo de Varsovio, ne nepre pro speciala sin-oferado por povraj samreligianoj, sed ĉar estante hebreo estis malfacile trovi laboron aliloke. Tamen oni scias pri oftaj ekzemploj ke la kompatema kaj sentema Zamenhof senpage kuracis malriĉajn hebreojn. [698](#)

Kelkaj propagandistoj asertas aŭ komprenigas ke Zamenhof estis lingvosciencisto. Faldfolio de Aŭstralia Esperanto-Asocio skribis pri „D-ro Zamenhof, talenta lingvisto“, kio donas eĉ la impreson kvazaŭ Zamenhof estis filologia doktoro. Certe, en multaj landoj la sciencoj estas liberaj kaj ĉiu rajtas nomi sin lingvisto, dum ekz. bakisto aŭ dentisto devas havi diplomon kaj oficialan aprobon. Tamen Zamenhof ne estis profesia lingvisto nek havis diplomon pri tia edukiĝo. La propagandistoj ja volas kaŝi ke Zamenhof estis lingvistika amato. Sed tio ne aŭtomate diskvalifikas lin por lingvoplanado, kaj

kuracisteco havas altan prestiĝon kaj vekas simpatian, tial en informado tiu profesio certe ne damaĝas. Nur ne necesas ĉiam eksplicite informi pri la detalo ke li estis kuracisto ĝuste *pri okuloj*. Bonŝanco por nia informado ke li ne estis dentisto aŭ ginekologo, ĉar vizitoj ĉe tiuj estas normalkaze pli malagrablaj ol ĉe okulisto.

c) Lingvoj

„Zamenhof estis nek lingvisto nek genio [...]; li estis nur diletanta poligloto, kaj da ili svarmis miloj en Orient-Eŭropo de la 19-a jarcento.“

(Bernard Golden ⁶⁹⁹)

La avo kaj patro de Lazaro Zamenhof estis influitaj de la *Haskala*, la juda klerismo, kaj precipe la patro Mordeĥaj Zamenhof serĉis la asimiliĝon al rusaj lingvo kaj kulturo. Tion atestas jam lia prefero nomi sin ruse *Marko*, aŭ germane *Markus*. Lia filo Lejzer lernis de li la rusan. La jidan Lejzer havis de la patrino, kiu nur malbone regis la rusan, de la juda kvartalo en Bjalistoko kaj de la bazlernejo. La ĉefa hejma lingvo estis laŭ pluraj aŭtoroj verŝajne la rusa. ⁷⁰⁰ Krom la polan li lernis jam junaĝe la francan kaj germanan. La franca estis tiutempe la internacia lingvo, proksimume kiel nun la angla, kaj la uzo de la germana estis disvastigita en tuta orienta Eŭropo kiel trafika lingvo. Supozeble Zamenhof studis multe per germanlingvaj libroj, kaj estis same normale studi almenaŭ kelkan tempon en Germanlingvio. En la kazo de Zamenhof tio estis Vieno.

Foje oni ŝatas nomi lin (kiu estis „nur“ kuracisto, sed ne lingvisto) poligloto, multlingvulo, kaj listigas lingvojn kiujn li parte konis nur iom. Hölscher asertis eĉ ke li „regis ne malpli ol dek du lingvojn“, kaj ke li ne inventis lingvon arbitre sed kreis „lingvan sintezon“. ⁷⁰¹ Tio ne nur aspektas kiel fanfaronado pri Zamenhof, sed krome povas krei la miskomprenon ke esperanto estas miksaĵo el la konkrete listigitaj lingvoj. Zamenhof mem skribis pri siaj lingvaj scipovoj en letero al Michaux:

„Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukita, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun la plej granda plezuro [...]. Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la buŝo, tial mi libere *parolis* nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en

diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.“ [702](#)

Pro nesciebla kialo li ne menciis la jidan, ĉu ĉar li hontis pri ĝi, ĉu ĉar li taksis ĝin ne sufiĉe propra-lingveca. La orienteŭropa jida estas ĝermana lingvo, tre parenca al la mezepoka germana. En la epoko de Zamenhof oni kutime nomis ĝin „jud-germana“, la parolantoj mem diris *dajĉ* aŭ *jidiŝ*. La orienteŭropaj judoj, kiuj venis en la 19a jarcento al Germanio, provis paroli la germanan, efektive parolante miksaĵon el la germana kaj la jida, kio parte kontribuis al la malbona bildo pri la jida. Zamenhof mem havis tre pozitivan rilaton al la jida kaj eĉ verkis gramatikon por ĝi. Gold montris jenan evoluon ĉe la esprimoj, kiujn Zamenhof uzis por la jida: en li 1905 li skribis „tiu ĵargono“, en 1907 „tiel nomata ĵargono“, kaj en 1909 ke *iĥ lib hejs dem zaoj-gerufenem „ĵargon“*, mi varmege amas la tiel nomatan ĵargonon. [703](#)

3. Bjalistoko kaj Varsovio


La urbo Bjalistoko (pole *Białystok*, ruse *Bielostok*) kaŭzis multe da konfuzo en la esperanto-komunumo. Multaj informantoj nomas ĝin urbo en tiam ruse okupata Pollando. Fakte Bjalistoko situis longan tempon en litva parto de la litva-pola regno; la litova nomo de la urbo verŝajne estas la originala, *Balstogé*, la blanktegmenta. Tiu regno malaperis de la mapo sekve de la tri polaj dispartigoj en 1772, 1775 kaj 1795. Bjalistokon okupis unue prusaj trupoj, sed jam en 1807 Prusio malvenkis kontraŭ la franca armeo. Napoleono prenis de Prusio la konkeritajn orientajn teritoriojn, kreis el la plej granda parto la novan grandduklandon Pollando kaj donis la bjalistokan distrikton al Rusio. Kiam en 1815 la Viena Kongreso nove aranĝis la mapon de Eŭropo, oni instalas Reĝolandon Pollandon. Sed tiu „kongresa Pollando“ ne fariĝis sendependa, ĉar kiel polan reĝon la kongreso nomumis la caron de Rusio. Post ribelo en Varsovio Pollando fariĝis rusa provinco (1832), kaj post nova pola ribelo oni disdividis ĝin en dek guberniojn (1864). Pollando nomiĝis nun „grandgubernio Varsovio“. Apude, do ekster la pola reĝolando, situis la grandgubernio Vilno kun la distrikto Bjalistoko, kiu en 1843 fariĝis parto de la gubernio Grodno. ⁷⁰⁴

Pri la judaj enloĝantoj de Bjalistoko troveblas jenaj nombroj i.a. en diversaj judaj enciklopedioj: ⁷⁰⁵

jaro	tuta loĝantaro	judoj	en procentoj
1856	13.787	9.547	69 procentoj
1857	12.936	9.547	73,8 procentoj
1860	16.544	11.288	68,2 procentoj
1889	56.629	48.552	85,7 procentoj
1895	62.993	47.783	75,6 procentoj
1913	89.700	61.500	68,6 procentoj
1921	76.748	39.602	51,6 procentoj
post 1945		1.085	
1997	282.500		

En 1897 okazis popolnombrado laŭ kiu en Bjalistoko vivis 66 procentoj da

judoj, 18 procentoj da poloj, 8 procentoj da rusoj, 6 da procentoj germanoj kaj 2 procentoj da belorusoj. ⁷⁰⁶



Se oni listigas la etnajn grupojn, oni atentu la ĝustan vicon, kiu ja indikas la grandecon resp. proporciecon de la unuopaj etnaj grupoj. Multaj informiloj metas la judojn al la fino, kiel same faris Zamenhof en la letero al Borovko, ĉar li volis malemfazi la judecon de sia devenurbo.

Esperantistoj ŝatas priskribi la lingvan situacion en Bjalistoko iom stereotipe. Sapl jam en la 1920aj jaroj klarigis ke tie „ĉiu parolis sian propran idiomon kaj neniu komprenis la lingvon de la aliulo, tiel ke ili pro miskomprenoj kontraŭbatalis unu la alian“, kaj simile esprimis sin multaj aliaj aŭtoroj. ⁷⁰⁷ Oni ne bagateligu etnajn konfliktojn, sed plurlingveco tie oftis kaj la disputoj havis pli profundajn kialojn ol simplan lingvan miskomprenadon. La stereotipo iel rememorigas je *Monty Python*-skeĉo, en kiu oni malliberigas la ŝerceman eldoninton de fuŝa angla-hungara vortaro pro semado de konfliktoj. Krome, „Bjalistoko“ rilatas al enlandaj etnaj problemoj, dum en esperanto-informado oni parolas kutime pri internaciaj kontaktoj, tial la bjalistoka ekzemplo iom maltrafas.



Louis Zaleski-Zamenhof kun la aŭtoro

Z. Adam skribis en 1912 ke Bjalistoko „kuŝas ankoraŭ en pola etnografia

teritorio“.⁷⁰⁸ Sed la urbo mem estis „pola etnografia teritorio“ nur ĝis la komenco de la 19a jarcento, ĉar dum la industria epoko kreskis la juda loĝantaro de Bjalistoko, pro la konstruo de fabrikoj por teksado. Denovaj pogromoj kaj kruelaĵoj dum la unua mondmilito (1914-18) kaj precipe dum la rusa-pola milito (1918-21) kaŭzis ke la nombro de judoj malkreskis. Ĉar laŭ la Hitler-Stalin-pakto de aŭgusto 1939 la regiono de Bjalistoko apartenis al la sovetia hegemonia sfero, la nacistaj trupoj invadis ĝin nur la 27an de junio 1941. Maimon skribis pri la nacistisma tempo: teroro jam estis okaze de la invado, poste multaj judoj mortis post ribelo en la bruligita getto (juda kvartalo), la cetero estis transportita al la homdetruo de Treblinka. Entute sesdek mil judoj el Bjalistoko estis murditaj.⁷⁰⁹ Ankaŭ Zamenhof-familianoj estis murditaj. Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de la iniciatinto de esperanto, transvivis kaj loĝas nun en Francio, dum alia branĉo de la familio jam en la 19a jarcento estis elmigrinta al Ameriko.

Ni eble recerbumu pri Bjalistoko en nia informado. Zelazny atentigis ke Zamenhof vivis pli longe en Varsovio ol en Bjalistoko, kiam li verkis la faman leteron al Borovko (ĉ. 1894), kaj ke liaj lingvo kaj ideologioj estis „infanoj“ de Varsovio. Ankaŭ la naskiĝtaga festo kun la kanto en la *Lingwe Universala* (1878) okazis jam en Varsovio.⁷¹⁰

Ankaŭ Varsovio konsistis grandparte el judoj. La varsovia juda komunumo en 1882 petis siajn membrojn deklari sin en la loka popolnombro „poloj“ – pro la ĵus okazintaj pogromoj. Sekve nur 2,7 procentoj el la varsovianoj deklaris sin anoj de juda resp. hebrea nacieco. Alie estis en 1897, tiam oni demandis pri la gepatra lingvo: 28,3 procentoj el la varsovianoj indikis la jidan. Tio estis 84 procentoj el la judoj, dum 14 procentoj nomis la polan sia gepatra lingvo. El tiuj lastaj multaj supozeble apartenis al la asimiliĝemuloj. Du procentoj de la varsoviaj judoj indikis kiel sian gepatran lingvon la rusan. Tio montras ke gepatralingveco kaj nacieco ne simple kongruas.⁷¹¹ Zelazny skribis ke „fine de la 19a jarcento“ en Varsovio vivis 40 procentoj da judoj, 8 procentoj da rusoj, 3,5 procentoj da francoj, germanoj, italoj, 3 procentoj da aliaj, la cetero estis poloj.⁷¹² La procentaĵo de judoj kreskis inter 1864 kaj 1914, precipe post 1890, de 33 procentoj al 38 procentoj.⁷¹³

En niaj varbiloj ĉefrolas Bjalistoko, sed estas pli ĝuste, kiam oni foje devas detale priskribi la vivmedion de Zamenhof, eble mencii ambaŭ urbojn, kaj

Bjalistokon kaj Varsovion, aŭ nur Varsovion. Nacilingve ni uzas kutime la polan (nunan) varianton *Bialystok*, sed kiam Zamenhof vivis tie, la nomo estis *Bielostok*, kion uzis ankaŭ Zamenhof.

4. Zamenhof kiel polo

„Ni, unuflanke, ne troigu la judecon de Zamenhof nek la rolon kiun havis aliaj judoj en la esperanto-movado, nek ni, aliflanke, provu malpligrandigi lian judecon aŭ ilian rolon.“

(David L. Gold ⁷¹⁴)

Zamenhof neniam nomis sin polo, en leteroj eĉ neis esti polo, lian hejman landon li nomis „Litovujo“, do Litvo, kaj la politika unuo, en kiu li vivis, estis por li Rusio. Tamen nia *ruslanda hebreo* (PIV) fariĝis en tre multaj esperanto-verkoj – kaj en informiloj – *polo* aŭ almenaŭ *pollandano*. ⁷¹⁵ Tion ne kaŭzis hazardaj eraroj. La plej multaj nunaj esperantistoj certe nur simple transprenas la fuŝan informon, fidante al la legitaj libroj. Sed la inventintoj de „pola Zamenhof“ havis kialon por la misprezento, nome kaŝi lian hebreecon.

a) Antisemitismo

Antisemito: Je ĉio kulpas nur la judoj!

Judo: Kaj la biciklistoj!

Antisemito: Kial la biciklistoj?

Judo: Nu, kial la judoj?

La judoj kiel religie aparta komunumo renkontadis jam dum jarcentoj malamon de siaj kristanaj najbaroj. Ankaŭ en la 19a jarcento, kiam en pli kaj pli da landoj judoj ricevis civitanajn rajtojn kaj kiam pli kaj pli da judoj strebis asimili sin al la samlandanoj, la antisemitismo ne malaperis. Eĉ male, al la tradiciaj religia kaj kultura malamkaŭzoj aldoniĝis la rasisma antisemitismo, kiu malakceptis eĉ baptitajn eksjudojn. Ĝi kulminis en la t.n. holokaŭsto, la murdo de milionoj da judoj fare de la nacistoj dum la dua mondmilito. Sed eĉ post tio antisemitismo restis, ankaŭ en komunisma orienta Eŭropo, kie ankoraŭ vivis konsiderinda parto de judoj en la mondo. La kaŝvorto estis „anticionismo“. Kaj kiam Stalin nomis la esperantistojn „etburĝaj kosmopolitoj“, tio estis almenaŭ

parte aludo al judeco.

Al ĉio ĉi la planlingva afero havis origine neniun rilaton. John Wilkins, kiu en la 17a jarcento cerbumis pri filozofia lingvo, estis angla episkopo, la kreinto de volapuko katolika pastro. Certe pluraj esperanto-pioniroj estis judoj, kaj Zamenhof skribis ke li ne estus iniciatinta esperanton se li ne estus estinta judo el la getto, kiu volis eliri el ĝi. Sed entute planlingvoj aŭ esperanto ne estas „juda afero“, kion poste asertis la antisemitoj nur pro la judeco de Zamenhof. Pro la antipatioj, kiujn povis havi ankaŭ ne tre eksplicite antisemitaj homoj, multaj – ankaŭ judaj – esperantistoj emis kaŝi lian judecon. Kiam en 1905 la juda franco Emile Javal informis al Zamenhof ke ekde la unua Universala Kongreso aperis sepcent gazetartikoloj pri esperanto, li emfazis ke nur unu artikolo menciis la Zamenhof-an hebreecon: „Ni bezonis admirindan disciplinon por kaŝi al la publiko vian originon. Pri tiu punkto akordiĝis ĉiuj amikoj de Esperanto, kaj ni devas plu kaŝi la aferon, tiel longe kiel la granda batalo ne estas gajnita.“ ⁷¹⁶

Pro timo je antisemitismo Zamenhof eble eĉ falsis ion en la *Lingvaj Respondoj*: tie li klarigis la devenon de la radiko *edz*- per parto de la germana *Prinzessin* (reĝidino). Tamen, fonologie kaj semantike tio estas sufiĉe neverŝajna. Maimon supozis ke la radiko fakte venas de la jida *rebecin*, edzino de la rabeno, ⁷¹⁷ sed la etimologia vortaro de Vilborg neas ankaŭ tiun eblon, ĉar la ĝusta jida formo devus esti *rabetsn*. ⁷¹⁸

Oni ne kontentiĝis simple silenti pri lia judeco. En 1920 la judo Jakobo Ŝapiro informis en la revuo *Esperanto* pri „La naskiĝdomo de Doktoro Zamenhof“: laŭ lokaj samideanoj la domo situis „en angulo de Zamenhofa (antaŭe Zielonaja) kaj Brudna stratoj.“ ⁷¹⁹ Do kiam Zamenhof naskiĝis en 1859, la strato nomiĝis „verda strato“, kion oni povas legi ankaŭ en *Historio de Esperanto* de Edmond Privat kaj en la bjalistoka artikolo en la *Enciklopedio de Esperanto*, verkita de E. Wiesenfeld. ⁷²⁰ Sed kiam Maimon informiĝis pri tiu strato ĉe la usona *Bialystok Center* li eltrovis ke la naskiĝdomo de Zamenhof staris en vero ĉe *ulica z'ydowska*, tio signifas juda strato, ⁷²¹ do la informadantoj falsis eĉ stratnomon.

Ĉiuj polaj esperantistoj kiuj poligis Zamenhof ankaŭ kaŝis lian hebreecon. Escepto estis nur la judo Wiesenfeld, kiu tamen en 1939 asertis ke „eĉ dum la rusa reĝimo Zamenhof konsideris sin polo ... lia hejmlingvo estis ĉiam la pola.“

⁷²² Antisemitismo „mankis“ ankaŭ ne inter esperantistoj. En 1939 en la gazeto *Esperanto Internacia* aperis: „Esperanto ... estas kunmetita de judo. Ni ne timu tion konfesi. *Spite de tio* ĝi estas mirinda instrumento ...“. ⁷²³ Ulrich Lins skribis ke „Pola Radio ekde la fino de la 60-aj jaroj havis instrukcion ne menci la judecon de Zamenhof. Mi mem spertis, ke esperantisto, kiu tradukis tekston mian en sian nacian lingvon, arbitre forstrekis aludojn pri la fortaj ligoj de Zamenhof al judismo.“ ⁷²⁴

Privat skribis ke „hejme sur vespera tablo estis teo kun tranĉaĵo de ŝinko“, kio signifas ke Zamenhof ne bone respektis la judajn ritojn, ĉar judoj ne rajtas manĝi porkviandaĵon. ⁷²⁵ Ĝustas ke Zamenhof ne estis ortodoksulo, li obeis nur kelkajn judajn regulojn, ekz. ne havis porkviandaĵon en la hejmo, sed ne disigis la manĝaĵojn laŭ laktaĵoj kaj viandaĵoj. Lia kuracistejo estis fermita sabate kaj festtage, sed private li por esperanto plulaboris. ⁷²⁶ Plej verŝajne li ne respektis la malpermeson uzi fajron sabate, ĉar li estis forta fumanto.

b) Cionismo

Kaj la Sinjoro demandis al Moseo, kiun landon Li donu al la izraelidoj. Moseo volis diri „Kalifornio“, sed pro sia langoproblemo respondis: „Ka...kaa...kaka...“ La Sinjoro mirante: „Ĉu Kanaan? Kial tiun senesperan pecon da dezerto? Sed bone, se vi volas Kanaan, vi ricevu Kanaan...“

Cionismo estas juda naciismo, kies adeptoj ekde la fino de la 19a jarcento propagandis fondi judan ŝtaton en Palestino, tiam parto de la Osmana Regno kaj post la unua mondomilito brita mandato de la Ligo de Nacioj. Ne nur la indiĝenaj araboj kaj pro ili la brita administrado, sed ankaŭ multaj judoj kontraŭis la ideon; ĉu ĉar ili preferis siajn eŭropajn patriojn, ĉu pro la jud-ortodoksa persisto, ke nur la Mesio kaj ne politika movado gvidu la judojn reen al Palestino. La utopio fariĝis realo: en 1948 judoj sukcesis starigi sian propran ŝtaton kaj defendi ĝin ĝis nun. Kiam ekde la 1960aj jaroj anticionismo gajnis simpatian inter okcidentaj maldekstruloj, la plej ofta motivo estis certe kompato al senrajtigataj araboj kaj la supozo pri imperialisma komploto. Sed sub anticionismo povas sin kaŝi ankaŭ rekta antisemitismo. Ekzemple la sovetia anticionismo en karikaturaj uzis la samajn stereotipojn (longa nazo, diketa korpo) kiel la tradiciaj antisemitoj, ofte kun svastiko apud la davida stelo.

Kiam en 1980 iraka ĵurnalo „publikigis longan artikolon, kiu nomis la esperanto-

movadon 'kaŝita vizaĝo de cionismo'“, ⁷²⁷ la verkinto uzis verŝajne nur tipan akuzon, sen scii ke la supozo ne tute maltrafis. Zamenhof estis aktiva cionisto dum la unua ondo de tiu movado komence de la 1880aj jaroj. Post la pogromoj de 1881, li fondis grupon, ellaboris kaj disvastigis statuton, aranĝis renkontiĝojn kaj varbis adeptojn. ⁷²⁸ . La solvon por la rusiaj judoj Zamenhof vidis en la elmigrado al Palestino: „Ĉiu forto, forsendita tien, estos gajno por la nacia afero, ĉiu familio, ekloĝinte tie estos paŝo antaŭen al intime kara celo.“ Ŝajne li ne vidis problemon pro la fakto ke Palestino ja ne estis senhoma kaj koloniigema peco da tero: „Vi pagu al arabo duoble kaj trioble kaj li vendos teron al vi, kiom al vi estos necese; per oraj ŝlosiloj vi facile malfermos ĉiujn turkajn kancelariojn.“ ⁷²⁹ Zamenhof seniluziiĝis: en 1882 li plendis pri la „nenifarado“ de lia cionista grupo, kiu laŭ li lobbies en Konstantinopolo kaj kolektas monon, sed ne vere komencas la koloniadon. Junuloj ne batalu nur per plumoj. La bildoj, per kiuj li esprimis tion, montras la ligitecon de klerisma kaj okcidentema hebreo al Berlino, la prusa „Ateno apud la *Spre*e-rivero“:

„Ve al tiu popolo, kies Aĥilo prikantas venkitan Trojon, kaj kies Homeron oni sendas interbatiĝi kun Hektoro. En la oficejoj sidadu la maljunaj Bismarkoj, kaj por la patrujo bataladu la junaj Kernerroj. Tiuj havas la ardon, la flamantan, kleran patriotismon.“ ⁷³⁰

En 1901 Zamenhof kontraŭis la cionisman revon kaj malrekomendis la ideon al aliaj judoj. ⁷³¹ Li eĉ rifuzis membriĝi en juda esperanto-asocio (en 1914), argumentante ke li ne volas ligi sin al la idealoj de certa popolo aŭ religio kaj ke ĉiu naciismo malbonas, ankaŭ tiu de popolo malforta kaj subpremita. ⁷³² Esperantistoj en arabaj landoj do povas, se tio helpas, atentigi ke Zamenhof estis *eksa* cionisto, kiu taksis la cionismon speco de malaprobinda ŝovinismo; tamen tiu prezento povas esti maljusta kontraŭ tiuj cionistoj, kiuj ne kondutas ŝovinisme.

En 1894 la ĵurnalisto Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863-1913) havis, tiel supozis Ludovikito, la ŝancon aperigi en la eldonejo *Posrednik* broŝuretojn pri esperanto, kaj „kiel parton por tiaj broŝuretoj, ludoviko verkis artikolon 'pri la deveno de esperanto', en tiu formo de letero al borovko“ ⁷³³ La plano ne realiĝis, tamen oni publikigis la tekston en 1896 en la gazeto *Lingvo Internacia*. Ĝi famiĝis kiel la „letero al Borovko“. Ĉar ĝi ne estis privata letero respektive ne por privataj celoj, Zamenhof „intence evitis eĉ etan aludon al sia agado en la cionisma movado“, kaj tial li mensogis ke li vivis dum siaj studo-jaroj tre

malgaje kaj izole.⁷³⁴ Oni konsideru ke la caraj aŭtoritatoj vidis en cionismo kontraŭ-rusian agadon, kiu en 1903 eĉ oficiale malpermesiĝis. Zamenhof havis do tre bonan kialon prisilenti sian studentan engaĝiĝon. Nur en vere privata letero en 1905 Zamenhof malkaŝis ke „en la koro“ cionismo „restis por mi ĉiam kara, kiel agrabla, sed neplenumebla revo.“⁷³⁵ Waringhien, kiu ricevis la leteron de la alskribito Michaux mem, sendis komence de la 1930aj jaroj la tekston al la redaktantoj de la *Enciklopedio de Esperanto*. Pro la kontraŭjuda sinteno en Hungario la redaktantaro cenzuris la tekston tiel ke ĝi estis nur kriple publikigita. Tial la letero kun la cionisma konfeso de Zamenhof fariĝis konata nur en 1948, kiam Waringhien eldonis la *Leterojn de Zamenhof*.⁷³⁶

c) Miskompreno kaj simpligo

La pli grava motivo poligi Zamenhofon nuntempe eble ne plu estas antisemitismo, aŭ pola naciismo, sed la kredo ke la judeco estis nur la religio de Zamenhof. Tial informantoj nomas lin *pola* aŭ *juda-pola*. Sed li komprenis sin, same kiel multaj aliaj judoj en tiu regiono, ano de propra juda gento kun propraj lingvoj (hebrea kaj jida), kulturo, komunumoj k.t.p. Plia kialo por la „poliĝo“ de Zamenhof estas tre simpla apliko de la nacia koncepto, laŭ kiu homo loĝanta en Rusio estas resp. estu ruso, homo loĝanta en Pollando polo. Sekve, la informiloj antaŭ la unua mondmilito nomis Zamenhof ĉiam *ruso* aŭ *rusa hebreo*, kvankam oni sciis ke li loĝis en Varsovio. Nur post kiam Pollando aneksis la bjalistokan distrikton (1921) la jam mortinta Zamenhof estis nomata *polo*, *pola kuracisto*, *pola hebreo*, naskita en tiam *Rusia Pollando*.⁷³⁷

Kiam oni ne tre detale priskribas la devenon de Zamenhof, tiam sufiĉas *varsoviano*. La esprimoj *kosmopolito* kaj *mondcivilitano* estas tro malklaraj kaj riskas konfuzi. Kiel dirite, tute ĝusta estas „ŝtatano de Rusio kun juda etneco“, sed eble multaj homoj, depende de la lando, ne komprenas ke judeco resp. hebreeco povas esti etneco. En 2002 germana gazetartikolo evidentigis denove kiom malfacilas la afero al ĵurnalistoj: „polo de rusa deveno“.⁷³⁸

En kelkaj landoj oni havas en esperanto-informado apenaŭ problemojn pro la judeco de Zamenhof, foje eĉ male; sed en aliaj landoj ankoraŭ nuntempe grandas antisemitismo kio necesigas bone pripensi la informadon. La ĝusta strategio en tia situacio ne estas falsi la biografion de Zamenhof – la persekutintoj, kiel ekzemple la nacisocialistoj, ja tamen eksciis pri lia judeco. B. Golden atentigis

ke oni malemfazu la dependecon de esperanto de sia fondinto, ne prezentu la lingvon kiel la produkton de unusola viro. ⁷³⁹ Oni ja povas uzi aferon sen nepre ŝati la iniciatoron. La akraj reagoj al ĉi-rilata, parte eble ne sufiĉe klara, artikolo de B. Golden en *tejo tutmonde* (1995) montris kiom tikla tiu ĉi temo ankoraŭ estas en Esperantio.

5. Internacia Lingvo

„Kara amiko!

Mi prezentas al mi kian vizaĝon vi faros post la ricevo de mia letero. Vi rigardos la subskribon kaj ekkrios: ‚ĉu li perdis la saĝon?! Je kia lingvo li skribis? Kion signifas la folieto, kiun li aldonis al sia letero?’ Trankviliĝu, mia kara! Mia saĝo, kiel mi almenaŭ kredas, estas tute en ordo.“

(el la Unua Libro ⁷⁴⁰)

Zamenhof jam kiel knabo spertis ke ankaŭ la diverseco de lingvoj povas kontribui al malpaco inter la homoj. Li opiniis ke por fina paco sur tero estas bezonataj unuflanke komuna lingvo kaj aliflanke komuna religio/ideologio. La unua ideo fariĝis *Internacia Lingvo*, la alia *homaranismo*, tolerema kaj – laŭ Zamenhof – por ĉiuj homoj akceptebla monda religio. ⁷⁴¹ Privat asertis ke esperanto ‚ĉiam estis sola kaj tuta vivcelo“ de Zamenhof, ⁷⁴² sed oni rajtas dubi, ĉu la lingva demando vere tiom superregis lian tutan vivon. Almenaŭ dum certa tempo li multe aktivis por cionismo, kaj ankaŭ poste la lingva demando restis nur unu elemento en lia idearo.

Kiel gimnaziano en sia lasta lerneja jaro en Varsovio Zamenhof festis sian naskiĝtagon la 17an de decembro 1878. Tiam li parolis kun kelkaj kunlernantoj sian planlingvan projekton *Lingwe Uniwersala*. Sed la aliaj junuloj baldaŭ forgesis la aferon, kaj dum Zamenhof studis en Moskvo, lia patro Marko forbruligis la skizojn. (Unu el tiuj ses aŭ sep junuloj, Aleksandro Waldenberg, cetere poste lernis ankaŭ esperanton. ⁷⁴³)

ДРЪ ЭСПЕРАНТО.



МЕЖДУНАРОДНЫЙ
ЯЗЫКЪ.

ПРЕДИСЛОВІЕ

и

ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.

por Rusoj

Чтобы языкъ былъ всемірнымъ, не
достаточно назвать его таковымъ.



Цѣна 15 копѣекъ

ВАРШАВА.

Типо-Литографія Х. Кельтера, ул. Новолінье № 11.

1887.

Unua Libro, por Rusoj

Zamenhof eklaboris por nova planlingva projekto, kiu estis preta pli-malpli en 1885. Post du jaroj da serĉado por eldonisto Zamenhof mem eldonis la projekton. Por tio li uzis parton el la doto por sia edzino Klara Zilbernik, do de mono celita por fondi familion, kio povas esti kritikata kaj ankaŭ pro detaleco ne

